

# ***Beletra Edeno***

**neregula beletra bit-revuo n-ro 12 (januaro 2025)**

---



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

**Kontribuis** Luiza Carol, Laimundas Abromas, Evgeny Khvalkov, Miaohui, Sergei Isakov, Detlef Karthaus, Bardhyl Selimi, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, R. Platteau, Leming Lin, Long Dong, Guozhu, Vejdo, Mikaelo Bronŝtejn, Tiberio Madonna, Maria Nazaré Laroca, Liven Dek, Ulrich Matthias, Feri Floro, Erika Godó, Jadaranka Miric, Ardo, Viktoro Li, Przemysław Paweł Grzybowski, Rovere Emanuele, Eto, Jouko Lindstedt, John Huang  
AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Alain Roza Courbou

# Enhavo

## Originala prozo

|                                                    |     |
|----------------------------------------------------|-----|
| Luiza Carol: La parolantaj ŝuoj.....               | 003 |
| Laimundas Abromas: “La lasta hundo”.....           | 005 |
| Evgeny A. Khvalkov: Alrond kaj la magia vulpo..... | 009 |
| Miaohui: Rankoro inter patro kaj filo.....         | 015 |

## Tradukita prozo

|                                                                                   |     |
|-----------------------------------------------------------------------------------|-----|
| Maksim Bočkarev: Malhela (trad. Sergei Isakov).....                               | 017 |
| Oscar Wilde: La modela milionulo (trad. Detlef Karthaus).....                     | 044 |
| Iljet Alička: La rakonto pri Bardho (trad. Bardhyl Selimi).....                   | 049 |
| Fratoj Grimm: pajlotigo, karbo kaj fabo (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser)... | 054 |
| Henri Barbusse: Patrino (trad. R. Platteau).....                                  | 062 |
| Aronima: La kordono de la profesoro k.a. (trad. Leming Lin).....                  | 066 |
| Wa Xijie: Mi preferas ordinaran vivon (trad. Long Dong).....                      | 070 |
| Chen Yongquan: Forto de patrino amo (trad. Miaohui).....                          | 073 |
| Xue Yusi: La tria ino de Banqiao-gastejo (trad. Guozhu).....                      | 074 |
| Chiung Yao: En profunda korto (12) (trad. Vejdo).....                             | 076 |
| Chiung Yao: La lastaj vortoj de Chiung Yao (trad. John Huang).....                | 084 |
| Chiung Yao: Kiam neĝeroj flirte falas (trad. John Huang).....                     | 085 |

## Originala poezio

|                                                         |     |
|---------------------------------------------------------|-----|
| Mikaelo Bronŝtejn: Al Tatjana Georgievna Loskutova..... | 087 |
| Tiberio Madonna: La soldateto kaj la dancistino.....    | 090 |
| Maria Nazaré Laroca: Konkero k.a.....                   | 092 |
| Liven Dek: Sola sub la steloj.....                      | 095 |
| Ulrich Matthias: Aŭtuna vespero.....                    | 096 |
| Feri Floro: La vento de aŭtuno k.a.....                 | 097 |
| Erika Godó: Oktobro k.a.....                            | 101 |
| Jadranka Miric: Dankokiso k.a.....                      | 106 |

|                                              |     |
|----------------------------------------------|-----|
| Vejdo: Sindefendo kontraŭ ŝtelistoj k.a..... | 108 |
| Ardo: Primaveraj elegioj k.a.....            | 113 |
| Viktoro Li: Lanc' kaj ŝildo k.a.....         | 114 |

### Tradukita poezio

|                                                                                  |     |
|----------------------------------------------------------------------------------|-----|
| Henryk Zbierzchowski: La laŭdo al libro (trad. Przemysław Paweł Grzybowski)..... | 117 |
| Rovere Emanuele: La ĉielo en unu ĉambro k.a.....                                 | 118 |
| Qu Yuan: Vojaĝo al la foro (trad. Eto).....                                      | 124 |

### Recenzeto

|                                                |     |
|------------------------------------------------|-----|
| Jouko Lindstedt: Iom pri "Poemo de Utnoa"..... | 131 |
|------------------------------------------------|-----|

### Eseo kaj martikolo

|                                                    |     |
|----------------------------------------------------|-----|
| John Huang: Turisma vojaĝo trans Tanzanio (3)..... | 132 |
|----------------------------------------------------|-----|



**John Huang**, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por tri sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022, 2023 kaj 2024. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis en multaj Esperanto-agadoj en la sekvaj jardekoj.



*Karikaturoj esperantigitaj de Alain Roze Courbou (Francio)*

Foto sur la kovrilo: La Granda Muro de Ĉinio

## Luiza CAROL (Israelo)



### La parolantaj ŝuoj

Mi estis proksimume kvin jaraĝa, kiam mi ricevis fascinan paron da ŝuoj. Ili havis la helan koloron de maturaj dolĉaj ĉerizoj, kaj ili estis tre molaj kaj komfortaj. Tuj kiam mi eligis ilin el la pakaĵo, la ŝuoj ekbrilis laŭ aparta maniero kaj poste komencis paroli kun mi. Iliaj voĉoj estis agrablaj kaj ili ambaŭ parolis samtempe. La maldekstra ŝuo havis delikatan voĉon de soprano kaj la dekstra havis tenoran voĉon. Kiam ili parolis kune, ili ŝajnis kanti. Ili diris al mi, ke ili estas senditaj de

*aŭtorino, Luiza Carol*

feino, por akompani min ĝis mia privata loĝejo en Fabelmondo kaj reen, kiam ajn mi volas. Mi estis tre kontenta, kompreneble, ĉar ĝis tiam mi kutimis rajdi tre malkomfortan eksmodan balailon, pri kiu mi jam enuis.

Do, ekde tiam, la ruĝaj ŝuoj ekakompanis min al Fabelmondo regule. Mia fabelloĝejo tiutempe troviĝis en trankvila valo, proksime de sorĉa arbaro ĉirkaŭanta magian lagon. Ĝi estis blanka dometo, provizita per pufmaiz-aparato kaj afabla roboto. La roboto zorgis pri ĉio koncerne kuiradon kaj dompurigadon. Mi ne havis gefratojn kaj mi ne vizitadis infanĝardenon, tial mi ne konis infanojn kiujn mi povintus inviti tien por ke ni ludu kune. Kutime, mi invitis tien nur mian pianon kaj mian pupon. Kaj kompreneble, multaj protagonistoj el fabeloj vizitis nin tie, kiel eble pli ofte...

Kiam la ruĝaj ŝuoj fariĝis tro malgrandaj por miaj piedoj, mi jam estis vizitanta la bazlernejon. Mi metis la ŝuojn sur mian skribotablon kaj uzis ilin por konservi kolorajn kraĵojn. Mi komencis havi malpli kaj malpli da tempo por babili kun ili. Mi ne rememoras kiam kaj kiel ili malaperis el mia vivo. Ĉiuokaze, kiam ili malaperis, mi jam kapablis migri al Fabelmondo tre facile sen ilia helpo, ĉar mi jam scipovis legi flue kaj eĉ komencis skribi miajn proprajn fabelojn...

\*\*\*

70 jaroj pasis ekde kiam mi eligis la tute novajn ruĝajn ŝuojn el iliaj pakaĵo. La apartamento en kiu mi loĝas nun troviĝas en blanka konstruaĵo, relative proksima de eta parko ĉirkaŭanta malgrandan marĉon. Dum la vintro, la marĉo aliformiĝas en malgrandan lagon. Mi ja havas pufmaiz-aparaton, du robotojn uzeblajn

por dompurigado kaj multajn elektrajn ludilojn uzeblajn por kuirado. Antaŭ kelkaj semajnoj... mi revidis la ruĝajn ŝuojn, en montrofenestro. Nu, temis pri nova versio de la malnova paro, kompreneble, sed mi ja povis rekoni ilin. Ankaŭ ili rekonis min, kvankam ankaŭ mi estas nova versio de mi mem... Neniu restas ekzakte la sama dum 70 jaroj, ĉu ne? Ilia koloro estas malpli hela nun, fakte ĝi estas tenera nuanco de dolĉa ruĝa vino. Ili havas platajn flekseblajn plandumojn, kaj estas sufiĉe larĝaj por akcepti bonegajn internajn plandumojn. Ili estas faritaj el silka sintezita materialo kaj... jes, ili kapablas paroli. Iliaj du voĉoj restis neŝanĝitaj!

Mi aĉetis ilin kaj prenis ilin hejmen. Kiam ili elpakaĵiĝis, ili ekbrilis samkiel ili faris antaŭ longe. Ili komencis rigardi ĉirkaŭe. Ili ĝojis renkonti denove miajn maljunajn pianon kaj pupon, aŭ pli ekzakte iliajn nuntempajn anstataŭantojn. Mi diris al la ŝuoj, ke mi malpacienas konatigi ilin kun miaj familianoj kaj geamikoj. Ili demandis:

— Al kiu mondo vi deziras ke ni konduku vin nun?

— Fakte, mi venigis vin ĉi tien precipe ĉar estas ĉiam agrable babili kun malnovaj amikoj. Krome, mi despere serĉis ŝuojn, kiuj estu samtempe komfortaj kaj elegantaj. Tio estis malfacilege trovi, ĉar por mi la ŝuoj kun altaj kalkanumoj estas malkomfortaj, eĉ malsanigaj...

— Prave! Laŭ ni, tiuj ŝajnas eĉ malbelaj! Ni pensas ke sano estas belo kaj belo estas sano...

— Ho, miaj karaj spritaj ŝuoj! Vi estas la plej belaj kaj sanigaj ŝuoj kiujn mi vidis iam ajn! Mi invitas vin resti kun mi ĝuste en tiu ĉi mondo kiel eble pli longe, kaj provi alporti al ĝi kiel eble pli multan belon kaj sanon...

— Sed ni esperas, ke ni tamen ja vizitos Fabelmondon kelkfoje...

— Kompreneble!



esperantigita de *Alain Roze Courbou* (Francio)

## Laimundas Abromas (Litovio)



### “La lasta hundo”

Sabaton mi pasigis hejme kaj rimarkis, ke mia virinaĉo Ingrida kondukis la hundon por promenigi eĉ trifoje, sed min – nek unu fojon. Hundon ŝi vokis manĝi. Mi iomete atendis, supozante, ke ŝi vokos ankaŭ min. Ho ve! Tamen ne. Poste, ŝajnigante min indifera, kvankam pro la doloro fendigis mia koro, mi ankaŭ pene iris en kuirejon. Al la hundo ŝi donis manĝaĵon, al mi – ne. Verdire, ŝi ne pelis min for de la tablo. Poste hundo kuŝaĉis sur la sofo kaj Ingrida ofte gratis ĝiajn flankojn

aŭtoro, Laimundas Abromas

kaj karesis kapon. Sed min ŝi nek gratis, nek karesis.

Antaŭ kelkaj tagoj nia najbarino demandis mian virinaĉon Ingrida: „Kion el la animaloj oni preferas vivteni hejme? Ĉu viron aŭ hundon?“. Ĉu vi scias, kion ŝi repondis?: „Ĉu vidis vi, ke hundo, eĉ kun altdevena dokumento, kuŝaĉus antaŭ la televidilo, senhumore vagadus de angulo al angulo aŭ kuradus por eltrinki? Kaj kiajn funkciojn nuntempe viroj plenumas hejme? Tio estas nure la eta individua entrepreno, tralaboranta bieron al urino. Sed kiu bezonas tion? La plej bonaj amikoj estas kvarpieduloj. Pro tio iuj viroj revenas hejmen kvarpiede.“

„Iru vi...!“ – mi pensis, finante ruslingve. Virinaĉo..., Bombo..., Fulmotondro... Kiaj teruraj vortoj! Ni ŝajnigas, ke amas unu la alian. Tio ne estas ege malfacila afero. Plej gravas ne subiĝi al emocioj. Mia virinaĉo ekridas. Mi serioziĝas. Tiaj pensoj ne kondukas al bono.

Ofte la homo, sed ne hundo, ekkoleras, kiam oni nomas lin „hundo“. Tamen mi ne komprenas, kial homo, precipe proksima, parolas ion ajn kaj ankoraŭ ridas.

„Mikaelo!“ diras al mi Ingrida, mia virinaĉo, post kiam mi el vendejo alportas hejmen panon, kolbason kaj ovojn, sed ne alportis fromaĝon, oleon kaj buteron, ĉar simple mi forgesis, „vi estas lasta hundo!“ „Lasta hundo!“ Jes, tio ion signifas! Kion signifas tiu „lasta“? Ĉu tio signifas, ke, post kiam mi mortos, kun mi finiĝos la hunda specio? Neniel! Ĉar, verdire, mi ne estas hundo... Tio ĉi estas specifa epiteto, kaj nur. Kaj estas aplikata ekskluzive al vilaĝanoj. Pro kio al vilaĝanoj? Pro tio, ke vilaĝanoj scipovas interparoli kun la hundo samkiel kun la homo. Kaj tion mi mem vidis... sekve tio estas tre agrabla proceso de ekzistado...

Ĉu vi ne kredas? Jen konvinkantaj ekzemploj. Iam revenis hejmen ebriiĝinta ĝardenisto Tadeo. Li renkontis ĉe la sojlo de sia domaĉo atendantan hundon. La hundo ĝojis pro tiu afabla renkontiĝo, tiel ĝojis. Ĝi sciis, ke, enirinte sian fraŭlan loĝejon, Tadeo renkontos neniun vivan estajon. Hundo kuŝiĝis surdorse... Tadeo surgenuiĝis. Li gratis bruston de la hundo kaj, ferminte la okulojn, flustris: „Mia amo..., mia amo...” kaj fluigis du larmojn, po unu el ĉiu okulo. Li rememoris sian unuan kaj lastan fordrinkitan amon...

Similaj interparoloj kun hundoj en vilaĝoj abundas. Jen mia Ingrida, kutime ripetas al nia hundo Ĉipo, kiu kutime kuŝas sur la sofo apud ŝi: „Ajajaj, Ĉipo, ajajaj. Kiel doloras miaj gamboj! Mi scias, kio atendas min estontece... Nun ĉiuj homoj estas bestigintaj kaj brutigintaj... Ajajaj, Ĉipo, ajajaj!”

Jen, Petro, tute ebria, kuŝas en la ĉaro kaj fordonas ĉiujn fortojn por lasta atentigo, kiu estas adresata al Granto, la germana ŝafhundo: „Grant... hik... ti...ĉeval.. hik... pelu!”. Kaj ĉevalo subiĝas al bojanta Granto. Kaj ĉaro kun viva kadavro finfine alveturas necesan korton.

Vi, kara leganto, verŝajne scivolas, ĉu mi ankaŭ interparolas kun nia hundo? Kompreneble mi interparolas kun ĝi. Jen, hieraŭ, kiam mia Ingrida foriris vizite al najbarino, nia hundo Ĉipo kuŝiĝis apud mi. Kaj mi parolis al ĝi: „Ho, Ĉipo, Ĉipo, kiel tedis al mi tiu vilaĝo! Kiel mi laciĝis. Mi ĉion lasos kaj revenos al la urbo... Diversaj pensoj penetras en mian kapon. Mi mem demandas min, pro kio mi ne estas milionulo? Kio kulpas, ĉu mia kapo aŭ la koloro de la okuloj de miaj gepatroj? Mia samklasano Johano, nazmukulo, gapulo kaj pigrulo, nun estas membro de la klubo de milionuloj, sed mi? Mi estas nenio!”

Mi eĉ ne eksentis, kiel mi piedbatis la ŝrankon. Ĝia piedo rompiĝis. Nun necesis urĝe ripari ĝin. Mi ekblasfemis kiel ruso! Hundo levis la kapon kaj ekrigardis min. „Kio okazas, mastro? Pro kio vi nervoziĝas?” – demandis min Ĉipo.

„Se ci, Ĉipo, vivus mian hundan vivon, ci eĉ pli kolere flamus“, mi respondis kolere.

„Mi vivas mian hundan vivon kaj estas malvarma, kiel glacio, do mi estas pacienca.“

„Pro tio, ke ci satas, varmas, pro tio pacienas... Tamen mi volas fuĝi de ĉi tie...”

„Do, pro kio vi ne fuĝas?”, scivolis hundo.

„Bona demando... Ci komprenu, mi ne povas tiel subite, abrupte... Fekinte — do oni returnas sin por ekrigardi... Mi venis al Ingrida nur por unu tago, sed mi pasigis kun ŝi tutan nokton, mielan monaton, poste jaron kaj tiel pasis eĉ dudek jaroj... Mi ne povas lasi Ingrida-n, kiel lavtukon, kvankam ŝi nomas min „lasta hundo“,” mi parolis emociiĝinte.

„Ho, mastro, vi estas ridinda kiel eta infano... Vi scipovas la hundan lingvon aŭ almenaŭ komprenas ĝin?“

„Sed kiu instruis min? Mi eĉ homan lingvon malbone scipovas, kaj blasfemadas kutime nur ruslingve, ĉi mem aŭdis, ĉu ne?“

„Tiam vi scias nenion... En nia hunda lingvo epiteto „lasta hundo“ signifas „lasta amo“... Jen estas la konfeso de mastrino, publike, sen iu honto plenumita... Kaj nun vi pripensu mem, ĉu indas fuĝi de tie ĉi, aŭ resti... ? Mi jam decidis kaj nenien fuĝos...“

Mi tre miris, ke Ingrida lernis hundan lingvon... Eble ŝi eldiras nur tiun solan frazon? Kaj ŝi eĉ ne scias, kion ĝi signifas en ĝenerala kaj emocia lingvoj?

„Ĉipo, mi suspektas cin...“

„Jes, mastro, mi estas instruisto de mastrino“.

„Mi volas, ke ci instruu ankaŭ min“.

„Volonte, mia mastro. Sekve ĝi ne estos la supera scienco. Bakalaŭron vi ne ricevos...“

„Mi jam havas du bakalaŭrojn“, fieris mi.

„Majstro, kiam vi finos mian lernejon, vi estos dungata profesoro“.

„Ho! Similas, kiel „dungata murdisto“... Sed kiu min dungos?“

„Kompreneble, via edzino Ingrida...“

„Ĉipo, mi suspektas...“

„Ho, jes, majstro, mastrino jam estas profesorino.“

„Ĉipo, se Ingrida jam mem estas profesorino, pro kiu celo ŝi bezonas dungatan profesoron? Interalie, Ĉipo, kion mi perlaboros, kiom granda estos mia salajro?“

„Ĉi tio estos la afero de interkonsento, sed, laŭ mia opinio, pri mono eĉ ne indas paroli...“

„Do, kia mi estos dungata profesoro? Plej verŝajne mi estos senlaborulo...“

„Eble tiel, sed kie estas du profesoroj, mia majstro, tie oni rajtas fondi hejman Sciencon Akademion kaj elekti Prezidanton.“

Min senlime ravis tiu ĉi ideo.

„Kiun?“ , scivolis mi.

„Vin, kompreneble...“

„Mi dubas, sed, tamen... Ĉiĉjo, ci estas por mi lasta hundo...“

„Kaj vi por mi, mia majstro“, respondis Ĉipo.

Ni ekspiris laciĝintaj kaj ambaŭ ekdormis.

Sed kiam revenis mia virino Ingrida, min inundis duboj. Ĉiuj pensoj koncernis fromaĝon, oleon kaj buteron... Do, tie ĉi estis farita mia hunda eraro, pro tio, ke mi ne aĉetis tiujn ĉi nutraĵproduktojn. Pro tio Ingrida esprimis sin hunde. Mi prenis

listojn de papero kaj notis ĉiujn aĉetindajn varojn. Poste mi diris al mia edzino: „Ingrinjo, mi iras al vendejo, kion bongustan aĉeti por vi?“

„Nenion“, respondis ŝi, kaj tio signifis, ke mi devas aĉeti multe, multe, — komencante de fromaĝo, butero kaj finante per kukoj kaj bombonoj „Birda lakto“ kaj aliaj dolĉaĵoj. Mi kun Ĉipo iris al vendejo kaj tie, aĉetitajn varojn, metis en grandan bazarkorbon. Ĝi pleniĝis kaj iĝis tiom peza, ke mi apenaŭ sukcesis porti ĝin. Reveninte hejmen mi estis tute malseka, kiel soldataj ŝtrumpoj.

„Ĉu pluvas?“ ekmiris Ingrida. „Televidilo ĵus informis, ke en la korto frostas ĝis dek gradoj. Mensoguloj!“

„Eĉ frostu ĝis tridek gradoj!“ respondis mi koleriĝinta, sed samtempe ĝojis, ke portis hejmen tiun eksterordinaran ŝarĝon. Mi purigis tablon kaj komencis elkorbigi ĉiujn portitajn aĉetaĵojn. Kvankam mi estas pedanto, tamen mi ne intencas laŭnome nomumi ĉiujn varojn. Mi nur diros, ke Ingrida, ĉion tion ekvidinte, ameme ekrigardis min kaj starante komencis manĝi. Tio daŭris unu horon, malinkluzive trinkadon de kafo. Tiam Ingrida sidiĝis sur la sofion, manojn siajn metis sur la ventron kaj ekronkis. Dum unu horo ŝajnis, ke ŝi estas mortinta, nur ŝiaj vangoj pufis pro ruĝeco.

Mi kun Ĉipo sidiĝis por legi gazetojn kaj legante ankaŭ ekdormetis. Sed abrupte mi ekaŭdis krion de Ingrida: „Miĉjo! Kie vi kaŝas vin?“

Nun Ingrida manĝis sidante ĉe la tablo. Ŝi mansvingis kaj invitis min sidiĝi apude. Al Ĉipo ŝi pugnominacis.

„Mi suspektas, kion parolis al vi tiu hundo... Vi ne kredu eĉ unu ĝian vorton... Vi kredu nur min... Kion mi diros tio estos sankta. Miĉjo, vi povas esti bona homo, se vi volas“, ŝi ĉirkaŭbrakis min kaj flame ensorbiĝis kiel hirudo per ŝiaj pufaj lipoj al miaj lipoj. „Miĉjo, mia plej bona kaj plej bela birdeto... Ho, kiel bonguste mi manĝegis, oni eĉ priskribi ne povas... Mi amas vin kaj ĉiam estos via!“



esperantigita de **Alain Roze Courbou** (Francio)

## Evgeny A. Khvalkov (Rusio)



### Alrond kaj la magia vulpo

Ĉu vi aŭdis la historion de Aronld kaj la magia vulpo? Mi povas rerakonti ĝin al vi.

Ja magiaj vulpoj ankoraŭ vivas en iuj lokoj en la mondo ĝis hodiaŭ. Estas preskaŭ neeble kapti ilin, ĉar ili estas tre fortaj en magio. Kaj foje, kiam tia vulpo kuras tra la arbaro kaj tuŝas la

*aŭtoro, Evgeny A. Khvalkov*

branĉojn kaj arbustojn per sia vosto, fajreroj flugas de la vosto al la ĉielo, kaj tiam falas reen al la tero; homoj nomas ĉi tiujn fajrerojn falsteloj. Tamen kelkfoje magiaj vulpoj aperas inter la homoj. Jen kion rakontos nia historio.

Iam estis maljuna kavaliro loĝanta ĉe Kabo Bertoari, kaj li havis tri filojn. Kiam la maljunulo mortis, la plej aĝa filo heredis la kastelon kaj ĉiujn bienojn; laŭ kutimo, la meza filo heredis la vilaĝan paroĥon kaj la postenon de pastro, kaj la plej juna, Alrond, ricevis nur la glavon de sia patro kaj maljunan ĉevalon. La pli aĝa frato donis al Alrond panon kaj ŝinkon por la vojaĝo, kaj diris al li foriri por serĉi sian riĉaĵon aliloke.

Alrond pretiĝis por la vojaĝo kaj pensis pri irado al Adtiarn al la kortego de reĝo Taravon. Li, homoj diras, dece pagas la kuraĝajn kaj lertajn nobelulojn. Kaj Alrond iris al la urbo Adtiarn.

Iom da tempo pasis, Alrond laciĝis kaj malsatis, kaj sidiĝis por manĝi ĉe la arbara rando. Jen, vulpa vizaĝo elŝoviĝis de malantaŭ arbusto viburna. La vulpo rigardis Alrond, kaj Alrond rigardis la vulpon. Kaj la vulpo diris al li:

"Bonan posttagmezon, junulo! Bela ŝinko, kiun vi havas tie. Ĉu vi dividus pecon?"

Kaj kvankam Alrond ne havis alian manĝaĵon krom tiuj pano kaj ŝinko, li estis bona ulo, do li donis al la vulpo peceton da ŝinko, kaj rakontis al li, kiel liaj fratoj traktis lin, kaj ke li iras al Adtiarn al la kortego de Reĝo Taravon.

– Vidu, – diris la vulpo, – eble mi akompanu vin por ke ankaŭ mi provu mian ŝancon? Vi estas bonulo, mi vidas, sed vi estas tre simpla, kaj mi bone spertas ĉiajn ruzojn, kaj eble mi ankaŭ povas servi vin. Kaj kiam ni alvenos al Adtiarn, vi aliĝos al la gardistaro de reĝo Taravon, kaj mi estos interpretisto por la kanceliero Berengar. Mi scias ĉiajn lingvojn: *garegin*, *adelnian*, kaj eĉ la lingvon de la Igerulds.

– Nu, – diris Alrond, – estas pli amuze dumvoje kune. Venu kun mi!

Kaj ili iris al la urbo Adtiarn. Post ilia alveno, Reĝo Taravon prenis nian Alrond kiel sian personan gardiston, ĉar la kapitano de la gardistoj estis malnova amiko de la forpasinta patro de la junulo, kaj Alrond similis sian patron laŭ vizaĝo, kuraĝo kaj inteligenteco. Kaj la vulpo ekloĝis ĉe la kancelierejo kaj surprizis ĉiujn per sia scipovo de lingvoj: la skribistoj, la konsilistoj, la kanceliero kaj la reĝo mem estis surprizitaj kaj mirigitaj de la saĝo de la vulpo.

La reĝo havis edzinigeblan filinon. Tuj kiam ŝi vidis Alrond, ŝi freneze ekamis lin; ankaŭ la junulo ne estis indiferenta al la princino. Sed estis kutimo en la regno, ke ne nur la princino povis elekti la viron, al kiu ŝia koro inklinis, laŭ sia propra bontrovo, sed eĉ la patro-reĝo mem ne povis, kiel okazas en preskaŭ ĉiuj regnoj, svati la filinon laŭ sia propra opinio: devis esti granda konkurso, kaj kiu ajn venkis en ĝi, tiu devis ricevi la manon de la princino. Kaj ĉar la princino estis en edziniĝa aĝo, kaj la sola filino de reĝo Taravon, kaj la reĝo mem jam estis en sia maljuneco, la kanceliero kaj la konsilistoj komencis ĝeni lin, por ke li baldaŭ aranĝu konkurson por decidi kiu edziĝos kun la princino.

– Ni volas – ili diris – havi taŭgan posteulon por vi: gloran, kuraĝan, inteligentan kaj ĉiel indan princon aŭ kavaliro; ni ne bezonas alian specon de reĝo!

La reĝo devis cedi kaj aranĝi konkurson. Alrond revenis hejmen malĝoja post la servo, kaj la vulpo demandis lin:

– Kial vi estas tiel malĝoja, mia amiko? Kial vi lasas vian nazon pendi?

– Kiel mi povus ne lasi ĝin pendi! – respondis Alrond. – La reĝo deklaris konkurson, kaj kiu gajnos ĝin, tiu ricevos la manon de la princino, kaj mia amatino iros al fremda princo aŭ kavaliro.

– Kial vi ne partoprenas en la konkurso? – diris la vulpo. – Kvankam via patro estis malriĉa kavaliro, kaj vi estas eĉ pli malriĉa, tamen via familio estas nobela kaj via genealogio ne estas pli malalta ol tiu de la reĝoj. Cetere vi estas viro forta kaj eltrovema!

– Vere, diris Alrond, – sed mi sentas, ke la elprovoj tie ne estos la kutimaj: ne batali per lancoj, pafi per pafarko kaj batali per glavo.

– Sed vi havas min! Mi helpos vin tra la reĝaj provoj – diris la vulpo.

Alrond ripensis kaj konsentis. Kaj la vulpo svingis sian voston, kaj oraj sparkoj falis sur la junulon – kaj kvankam Alrond jam antaŭe estis bela, kaj aŭdaca kiel malmultaj, nun li brilis per magia lumo, kaj li havis la fortan de tridek fortaj viroj.

Kiam venis la tempo por la konkurso, reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj de la tuta okcidenta marbordo, kaj iuj eĉ de la insuloj de la arkipelago, venis al Adtiarn. La unuaj tri tagoj pasis per turniroj, ĉasado kaj festeno; kaj Alrond estis antaŭ la aliaj en ĉiuj aferoj: en lancbatalo, glavbatalado, arkpafado, kruĉpafado

kaj dancado, kaj li kondutis tiel ĝentile – kiel vera svatanto por princino! Sed la reĝaj procedoj estis pli malfacilaj ol la kortegaj dancoj.

Estis tempo por la unua elprovo. Kaj la reĝo diris:

– La duko Larhelm de Moremont donis al mi pasintjare mirindajn semojn, kiuj produktas rikolton de kvincent, kaj pano farita el tiu tritiko havas tiel mirindajn ecojn, ke unu malgranda peco sufiĉas por nutri plenkreskulon. Miaj kamparanoj semis ĉi tiun miraklan grenon en la kampoj, kaj efektive, la rikolto estis senprecedenca. Tamen estas malfeliĉo: iu venas nokte kaj manĝas la tritikon. Kaj kiam mi sendas la gardistojn por kapti la nekonatan ŝteliston, ili ĉiuj endormiĝas. Kiu el vi, gloraj kavaliroj, protektos miajn kampojn de la mirinda tritiko, kaj samtempe kaptos la misteran rabiston kaj venigos lin al mi?

Ĉiuj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj estis perpleksaj, same kiel Alrond. Li venis hejmen kaj rakontis al la vulpo pri la reĝa misio. Kaj la vulpo diris:

– Mi scias, kiu ŝtelas la tritikon – ĝi estas la rostra monstro. Aŭskultu min, satdormu nokte, kaj ni iru rigardi la ŝteliston nokte. Nur ne forgesu ŝtopi viajn orelojn.

Tiel ili faris. Kaj kiam nokte ĉiuj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj eliris por gardi la kampon, la rostra monstro venis al ĝi kaj faris sonon per sia rostro – tiam ĉiuj ekdormis. Alrond kovris siajn orelojn, kiel la vulpo diris al li, kaj ne ekdormis. Tuj kiam la ŝtelisto komencis paŝtiĝi sur la reĝaj kampoj, Alrond kaj la vulpo ekprovis kapti la rostran monstron. Longe ili ne sukcesis, ĝis la vulpo saltis sur la monstron kaj ĵetis ŝnuron sur ĝin.

Matene Alrond alportis la rostran monstron al la reĝo. La reĝo surpriziĝis kaj laŭdis kaj dankis Alrond. La eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj enviigis: ili dormis la tutan nokton dum Alrond kaj la vulpo kaptis la monstron! Kaj ili konspiris kontraŭ Alrond, sed ili ne montris tion.

Estis tempo por la dua elprovo. Kaj la reĝo diris:

– Pasintjare Reĝo Aethelstan de Damirio donis al mi aron da oraj ŝafoj. Nun estas tempo por tondi ilin. Ilia lano estas pura oro, sed mi devas diri, ke ĉi tiuj ŝafoj estas tre aĉaj, kaj ĝis nun neniu sukcesis tondi ilin. Kiu el vi, gloraj kavaliroj, povas tondi la ŝafojn kaj kolekti la oran lanon kaj alporti ĝin al mi?

Ĉiuj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj estis perpleksaj, same kiel Alrond. Li venis hejmen kaj rakontis al la vulpo pri la reĝa misio. Kaj la vulpo diris:

– Tio ne malfacilas, mia amiko Alrond. Aŭskultu min, satdormu nokte, kaj morgaŭ ni iros tondi la orajn ŝafojn.

Matene la pretendantoj je la mano de la princino ekkaptis orlanajn ŝafojn, sed la ŝafoj estis tre rapidaj kaj kuraĝaj kaj neniu sukcesis fortondi de ili pecon da ora lano. Finfine venis la vico de Alrond. Tiam la vulpo, lia fidela amiko, sidiĝis sur monteto,

kie paŝtigis la ŝafoj, elprenis sian fluton kaj ekludis. Ho, se vi nur povus imagi, kia muziko ĝi estis! Ĉiuj ŝafoj kolektiĝis ĉirkaŭ la vulpo kaj aŭskultis la magian muzikon kvazaŭ ensorĉitaj, kaj nun estis facile por Alrond pritondi ilin.

Kaj ne nur la ŝafoj estis sorĉitaj! La klara sono de tiu muziko ravis la reĝon, la korteganojn, la sekvantaron kaj ĉiujn, kiuj estis tie; ili ĉiuj eksilentis kaj aŭskultis kvazaŭ konsternitaj. Sovagaĵ arbaraj bestoj eliris el siaj truoj kaj nestoj por aŭskulti la mirindan muzikon de la vulpo. La leono, la reĝo de ĉiuj bestoj, ne kuraĝis grumbli, por ke li ne interrompu la mirindan muzikon, la lupo forgesis sian ululon, kaj la uro forgesis sian muĝon. Eĉ la maljuna Greta, kiu loĝas ĉe la Remparbreĉo kaj estas fama pro sia malbonega karaktero (ŝi ne povas esti kun aliaj eĉ minuton sen riproĉado), do eĉ maljuna Greta mem eliris kaj aŭskultis la muzikon. La melodio, kiun la vulpo produktis per sia fluto, faris ĉion templo de muziko.

La Reĝo raviĝis pri tio, ke Alrond plenumis la duan taskon, kaj duoble ravis lin, ke li aŭdis tian magian muzikon. Li sincere dankis Alrond kaj la vulpon, kaj la eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj preskaŭ krevis de envio kaj kolero. Kaj unu el ili, reĝo Gerneb de Lothirod, diris:

– Se ĉi tiu kavaliro trapasos la trian provon, li havos la principon, kaj ni foriros sen rekompenco kaj eĉ sen honoro, kaj iu kompatinda soldato estos pli alta ol ni, kronitaj kapoj! Ni embuskos lin morgaŭ matene antaŭ la tria provo kaj mortigos lin, kaj tiel ni ne devos suferi malhonoron.

Ili ĉiuj decidis fari tion. Sed ili ne sciis, ke la vulpo tiam staris malantaŭ la kurteno kaj aŭdis ĉion. Li venis hejmen kaj rakontis al Alrond pri la insidaj planoj de la fremduloj.



– Kion mi faru do? – diris la junulo.

– Fidu min, – la vulpo respondis, – sed nur memoru, ke ni ambaŭ devas venki niajn malamikojn morgaŭ kaj trapasi la lastan provon!

Estis tempo por la tria kaj fina elprovo. Kaj la reĝo diris:

– Mi volas, ke mia estonta bofilo regalu min per luksa vespermanĝo en sia propra kastelo, kaj ĉi tiu akcepto devas esti reĝa! Mi ne lasos mian filinon edzigi almozulon. La eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj alarmiĝis. Kompreneble ili havis grandiozajn palacojn kaj kastelojn en sia regiono – sed vi ne povas venigi reĝon tien en unu tago, nek vi povas alporti ĉi tiujn palacojn kaj kastelojn al Adtiarn, kiom ajn vi klopodus! La kvar plej riĉaj reĝoj tamen dungis po cent masonistojn, kaj ordonis al ili konstrui kastelojn proksime al la ĉefurbo tuj – sed vi ne povas konstrui kastelon en unu tago! Ankaŭ Alrond aspektis malĝoja, sed la vulpo puŝetis lin kaj diris:

– Mi iros akiri al vi kastelon por la reĝfesto, kaj kiam vi nun ĉasos, tenu vin for de la fremduloj!

Kaj la vulpo kuris direkte al Kastelo Kromorgan. Kaj mi devas diri, ke ĉi tiun kastelon posedis terura trolo, tre malbona kaj malestiminda, tre kruela. Multaj vojaĝantoj, kiuj preterpasis la kastelon Kromorgan, trafis inter la dentojn de tiu malbela ogro. Sed la trolo manĝis homojn kaj ne vulpojn, do nia ruzulo havis nenion por timi; cetero la trolo ne estis hejme tiutempe – li eliris por ĉasi. Unue la vulpo decidis forigi la servistojn de la trolo, kiuj gardis la kastelon; tiuj estis gnomo Graw, koboldo Grow kaj gremlino (*angle: gremlin*) Grahaham. Li kuris al la pordego kaj kriis:

– Alarmo! Eskapu! Jen venas la reĝo kun sia armeo kaj kunportas cent sorĉistojn: ili forbruligos vin ĉiujn per fulmo!

La servistoj de la trolo alarmiĝis. Kion ili faru? Kaj la vulpo diris al ili:

– Kaŝu vin rapide; eble la reĝo kaj lia armeo kaj sorĉistoj ne rimarkos vin!

La servistoj de la trolo estis malkuraĝaj, do ili forlasis siajn gardistajn postenojn sen momenta prokrasto. La gnomo Graw kaŝis sin en biervazo, la koboldo Grow kaŝiĝis en vinbarelo, kaj la gremlino Grahaham kaŝis sin en barelo de kalvadoso (*angle: calvados*) (la trolo tre ŝatis kalvadoson). Tiam nia vulpo enfermis ĉiujn, rulis ilin sur la fortikaĵan muron kaj faligis ilin en la ĉirkaŭfosajon – lasu ilin naĝi tie!

Dume la malbona trolo, la mastro de la domo, revenis, kaj tute surpriziĝis, ke liaj servistoj malaperis, kaj ke stranga vulpo aperis de nenie en lia propra kastelo. Sed nia vulpo estis ege ĝentila sinjoro, do li ne havis malfacilecon ĉarmi la trolon. Sciante, ke la trolo tre ŝatas flatadon, la vulpo komencis ĉiamaniere priskribi la meritojn de la trolo kaj la famon, kiun li ĝuas en ĉiuj ĉirkaŭaj regnoj.

Kaj mi devas diri, ke ĉi tiu trolo havis du kapojn kaj ili ofte kverelis inter si. Kaj jen elpensis la vulpo – li plurfoje donis pli kaj pli buntajn komplimentojn al unu aŭ alia kapo, ĝis fine ili tiel multe kverelis, ke ili enfermiĝis en mortiga batalo. Tiam la vulpo mallaŭte ŝteliris al la loko, kie la trolo havis siajn akrajn kaj kurbajn sabrojn, kiel tiuj, kiujn kamelistoj uzas en la dezerto por batalo, kaj per lerta bato fortranĉis

ambaŭ malpacajn kapojn de la malbona trolo. Kaj de tiam, neniu iam ajn kaptis aŭ mortigis vojaĝantojn en tiuj lokoj!

Dume, reĝo Taravon ĉasis kun siaj korteganoj, sekvantaro kaj eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj, kiuj, kiel vi memoras, konspiris mortigi Alrond. Por serĉi la cervon, Alrond liberiĝis de la tuta sekvantaro kaj restis sola, kaj tiam la fremduloj komencis postkuri lin. Iliaj glavoj estis eltiritaj, iliaj arbalestoj ŝarĝitaj, kaj tio estus la fino de la junulo, se li ne havis sian vulpon!

Kaj la vulpo, ekposedinte la grandiozan kastelon de la fiula trolo kaj ordoninte pretigi veran reĝan regalon tie, rapidis al la arbaro, kie la ĉaso okazis. Tiutempe estis tre malnova kaduka ponto en ĉi tiu arbaro. Do, kiam la malamikoj persekutis Alrond kaj pafis al li per arbalestoj, la vulpo (finfine li ja estis magia vulpo!) nelonge transformis sian amikon en vulpan formon kaj kaŝis lin en truo, kaj la vulpo mem transformiĝis en junulon, similan kiel Alrond, vi eĉ ne distingus inter ili! La eksterlandaj reĝoj, princoj, dukoj, grafoj, baronoj kaj kavaliroj rapidis post li, kaj la vulpo en la alivestiĝo de Alrond saltis de sia ĉevalo kaj kuris trans la malnovan ponton al la alia flanko. La fremduloj, pensante, ke ilia viktimo estas en iliaj manoj, rapidis post li al la kaduka ponto, kaj la ponto kolapsis, do ili ĉiuj pereis.

Dume, la reĝo malsatis kaj atendis vespermanĝon. La vulpo redonis Alrond al sia homa formo kaj sin al sia vulpa formo, kaj ili revenis al la reĝo.

– Via Moŝto, – la vulpo diris ĝentile, – Sinjoro Alrond havas la honoron inviti vin vespermanĝi ĉe lia kastelo.

La reĝo surpriziĝis.

– Kiel, Alrond? La kastelo de via patro estas dek tagojn da veturo de ĉi tie, kaj ĝi apartenas al via pli aĝa frato laŭ la rajto de la rekta heredo.

– Mi certigas vin, Via Moŝto, – la vulpo rapidis diri, – ke kavaliro Alrond havas kastelon, kaj plej grandiozan.

Kaj la vulpo kondukis Alrond, la reĝon kaj la tutan sekvantaron de la reĝo al la kastelo Kromorgan, kiu iam apartenis al la malbona trolo, kaj nun ĝi apartenis al la amiko de la vulpo, la kavaliro Alrond. Kiam ili atingis la kastelon, la reĝo tre ĝojis, ĉar la kastelo Kromorgan estis tiel bona kiel reĝa palaco, kaj la akcepto, kiun la vulpo kaj Alrond disponigis por la reĝo kaj lia sekvantaro, estis vere reĝa. La reĝo estis tre ĉarmita, kaj en la sama vespermanĝo anoncis la gefianĉigon de Alrond kaj la Princino, kaj nomumis Alrond heredonto de la trono.

Kio pri la magia vulpo? Kaj la vulpo, kiam la geedziĝo finiĝis, adiaŭis kaj forkuris en la arbaron; finfine li ankoraŭ estis sovaĝa besto, kvankam poste li foje vizitis sian amikon.

Jen ĉio, miaj amikoj! Alrond ne domaĝis doni la lastan aferon, kiun li havis, al la vulpo, kaj fine li fariĝis reĝo.

# Miaohui (Ĉinio)



## Rankoro Inter Patro kaj Filo

Jen reala rakonto okazinta en mia hejmloko. Estas vilaĝo nomata Ŝtona Kaverno. La vilaĝo estas fama pro la mistera kaverno en la vilaĝo. Estis onidiro, ke foje antaŭ longa tempo okazis prezentado de teatraĵoj en la vilaĝo, kaj en la tagmezo iu aktoro enkaverniĝis kun sia hundo por sin amuzi. Post

*aŭtoro, Miaohui*

nelonge, li eliris por prepari la posttagmezan ludon, sed ne plu povis trovi sian teatran teamon. Demandinte, li informiĝis, ke antaŭ kvin jaroj okazis prezentado de teatraĵoj en vilaĝo, sed iutagmeze aktoro kaj lia hundo iris en la kaverton, kaj ne plu eliris. Tio mirigis la aktoron, kaj li denove iris en la kaverton kun la hundo, kaj ĝis nun li ankoraŭ ne eliris.

Tamen alia okazaĵo mirinda sed vera des pli famigis la malgrandan montaran vilaĝon.



Iam malriĉulo plantis akvomelonon ĉe Rivero Klara Akvo fluanta el Wutaishan-montaro. Foje okazis foiro ekster la montaro, do iu forlasis sian hejmon por fari aĉeton en la foiro. Kiam li preterpasis la kampon de akvomelono, li haltis kaj aĉetis melonon grandan kaj dolĉan por mildigi sian lacecon kaj soifon. Tiam la vendanto de la akvomelono vidis, ke la pasanto portas multe da arĝento, do li ekhavis malbonan ideon. Dum la pasanto dronis en ĝuado de la akvomelono, li subite mortigis lin per tranĉilo, kaj haste enterigis lin ĉe la kampo. Post tio, li ĉirkaŭrigardis, kaj trovis neniun estanta krom ŝtona statuo de budho Ŝakjamunio ĉe la bordo de la

rivero. Do li iris al la budho, genuiĝis kaj preĝis, ke la budho ne malkovru lian krimon al la aliaj. Strange li aŭdis respondon: "Ne timu, ke mi parolas, se vi mem ne parolos." Li pensis: "Estos sufiĉe bone, ke vi ne malkaŝos min. Kiel mi povos malkaŝi mian mortigon per mi mem?" Kontente li revenis hejmen, kaj senprokraste translokiĝis pli profunden en la montaro por eviti danĝeron. Per la mono de la mortigito li konstruigis novan domon, aĉetis kampojn, prenis edzinon kaj baldaŭ havis filon. Li ekzaltiĝis pri tio, pensante: "La sortodivenistoj profetis, ke mi restos seninfana dum mia tuta vivo. Sed nun mi havas brilan filon. Eble tio signifas, ke mia feliĉo venis de mia malbona konduto. ĉar proverbo diras, ke ju pli oni fikondutas, des pli li riĉiĝas. Verŝajne la budhisma teorio pri la kaŭzoj kaj efektoj estas erara."

Forpasis 15 jaroj. Foje li kondukis sian filon al la foiro okazanta ekster la montaro. Ili laciĝis kiam ili trapasis la lokon, kie li plantis akvomelonon kaj mortigis homon, do ili sidiĝis ĉe la ŝtona statuo por ripozi. Dum la ripozo li babilis sencele kun la filo. Li subite levis la kapon kaj hazarde vidis la ŝtonan statuon. Li diris al la filo: "Jen estas mirinda statuo. Ĝi eĉ povas paroli." "Paroli? Ŝtona statuo? Tute ne eble!" refutis la filo. Aŭdinte tion, li do ekrakontis detale pri sia antaŭa sperto pri riciĝo. Apenaŭ li menciis la mortigitan pasanton, lia filo subite rememoris sian antaŭan vivon kvazaŭ vekiginte el sonĝo. Li estis neniŭ alia krom la pasaĝero mortigita de sia nuna patro.

Plena de kolero, la filo decidis sin venĝi. Vidinte tion, la maljunulo ekkuregis por eskapi la danĝeron dum la filo postkuris. Kurinte longan distancon, la maljunulo estis trafita de saĝa ideo. Li haltis kaj diris al sia filo: "Vere pravas la budhisma proverbo 'Kion oni semas, tion li rikoltos'. Antaŭe sortodivenistoj antaŭdiris, ke mi ne havos filon. Sed post mia mortigo, mi eksteratende havis vin. Tio ĝojigis min, kaj faris min decidi, ke mi faru pli da malhonoraĵo. Mi tute ne atendis, ke por vin venĝi, vi eĉ renaskiĝis kiel mia propra filo. Pripensu, ke vi fariĝos mia filo nur pro mia mortigo al vi. Do se vi antaŭe ne mortigus vin, kiel mi povus mortigi vin en tiu ĉi vivo? Krome, se vi vere vin venĝos kontraŭ mi, ĉu vi povus garantii, ke mi ne fariĝos via filo por min venĝi? Do ĝis kiam ni intermortigos senĉese? Estus pli bone, ke ni iru al Wutaishan-montaro por fariĝi monaĥoj anstataŭ daŭrigi la rankoron inter ni. Tio helpas al ni likvidi nian rankoron, kaj donos al ni eternan pacon." La filo opiniis, ke la patro diras prave. Do la patro kaj filo iris en Wutaishan-montaron kaj vere fariĝis monaĥoj. Ili praktikis budhismon tre diligente kaj ambaŭ fariĝis eminentaj majstroj budhismaj.

Kiam mi estis juna, mi ofte vizitis monaĥejon de Ŝtona Kaverno kaj restis tie iom da tempo por ĝui la trankvilecon kaj belajn pejzaĝojn. Do karaj amikoj, se vi havos ŝancon viziti Ĉinion, vi estas bonvena en la monaĥejo por sperti trankvilecon kaj pacon.※

# Maksim Bočkarev



## Malhela

### Parto 1

La vilaĝo nomiĝis "Malhela", kaj estis iel nekutime legi tian nomon, netipan por rusaj vilaĝoj, sur la ŝildo ĉe la enirejo. Jen vilaĝojn "Helajn" - Arkaŝa konis plurajn, sed

*aŭtoro, Maksim Bočkarev*

ĉi tiu estis la unua fojo, ke li vidis ion similan al la Malhela. Kaj por esti honesta, ĝi estis timiga, sed ankaŭ interesa samtempe.

Arkaŝa estis verkisto, kaj lia kreiva naturo konstante postulis ŝanĝon de medio. Kaj nun, li venis al ĉi tiu vilaĝo por, unue, estadi en silento, kaj due, li delonge serĉis lokon, kie li povus verki ian timigan romanon, plongante en la taŭgan etoson.

Arkaŝa staris kaj ridetis pro siaj pensoj: "Ĝuste kiel en klasika hororfilmlo, filmita en lando malamika al ni!"

Sed Arkaŝa, dank' al Dio, estis rusa verkisto kaj li ne toleris terurajn filmojn. Male, li volis skribi pri sia propra, pri sia familia. Eĉ se temas pri io timiga, temas pri io, kio estas persona. Tial li venis ĉi tien, al la loko, kiun liaj amikoj rekomendis al li.

Post tio, kion li aŭdis de ili, estus krimo ne veni ĉi tien. Liaj amikoj, Ivan kaj Serjoga, estis ĉi tie antaŭ unu monato, ĉe la komenco de la somero. Pli precize, ne tute ĉi tie, en ĉi tiu vilaĝo, ili estis sur la lago, kiu estas tre proksime de ĉi tie.

Mi devas diri, ke liajn amikojn, Ivanon kaj Sergeon, estis tre, tre malfacile timigi per io ajn. La uloj estis akirintaj sperton dum vivo, saĝaj kaj, plej grave, kun eksterordinara sento de humuro. Sed eĉ ili ĉesis ŝerci, kiam ili parolis pri la nokto, pasigita sur la lago. Eĉ ne estas nokto; laŭ ili, ili forkuris je la tria aŭ la kvara matene, lasante kelkajn el siaj aĵoj sur la bordo.

Kaj la amikoj rakontis jenon - ili alvenis al la lago, kiel kutime, je la tagmanĝo, malrapide aranĝis sin sur la loko, fritis viandon kaj eĉ provis naĝi, sed la fontoj bobelantaj ĉe la fundo estis tiom glaciaj, ke tuj malaperis iu ajn deziro eniri la akvon, ne helpis eĉ "fajra akvo", kunportita en multaj kvantoj. Kial du homoj bezonas "multan kvanton"? Ĉio estas tre simpla, ili atendis, ke kvin pliaj homoj venos al ili.

Sed neniu venis. Kaj la amikoj restis duope. Sed ili ne tro malĝojis, ĉar ili ne ofte eliras en la naturon. Ili sidis apud la fajro, kantis kantojn kaj eĉ ne aŭskultis la sonadon de la sonoriloj ĉe la fiŝkaptiloj.

Serjoga estis la unua, kiu sentis, ke io misas. Li komencis aŭskulti kaj periode premis la kordojn de la gitaro de Ivano per sia manplato, kio nekredeble incitis la ebrietan bardon.

Ivano ŝercis pri Serjoga kaj ĉiufoje kiam tiu komencis aŭskulti, li proponis al li drinki. Sed iam mi konstatis, ke mia amiko ne ŝercis. Io periode susuris en la najbaraj arbustoj. Kaj ĉiufoje ĝi fariĝas pli kaj pli laŭta. Je tiu ĉi momento Ivano ĉesis ŝerci, ĵetis pli da ligno en la fajron kaj komencis turni la kapon kiel gufo.

Mi diros denove, miaj amikoj estis malproksimaj de malkuraĝuloj kaj al la aĝo de kvardek jaroj ili multon vidis. Sed estis io alia ĉi tie, timo ŝteliris sur senkonscia nivelo, ĝi ne povis esti klarigita. Ja du plenkreskuloj komprenis perfekte, ke meloj povas vivi en la arbareto ĉirkaŭ la lago, kaj vulpo povas ĉasi muson nokte, kaj ajna alia vivanta estaĵo. La hundo, finfine, el najbara vilaĝo. Sed la timo estis tiel glueca, ke la tuta racieco elflugis el iliaj kapoj kiel seka folio en venta vetero.

Ili ambaŭ jam staris kun lanternoj kaj, sen diri eĉ unu vorton, ili lumigis tiun lokon, de kie venis la bruoj. Sed neniu aperis, la susuraj bruoj malaperis, kaj la amikoj komencis iom trankviliĝi. Ebrio, sufiĉe strange, elflugis el iliaj kapoj, kvazaŭ ili estus trinkintaj kompoton la tutan vesperon. Kaj ili decidis korekti ĉi tiun miskomprenon. Verŝinte fajran akvon en la kruĉojn, ili estis tintontaj glasojn, kiam grandega porko elkuris el la arbustoj mem, kiujn ili briligis ĵus per siajn poŝlampoj. Ĝi kuris rekte al ili, sed en la lasta momento, malobeante ĉiujn fizikajn leĝojn, la porko turniĝis akre dekstren kaj kuris laŭ la bordo al alia bosketo.

Ivano kaj Sergej ne palpebrumis kaj ne spiris. Timo plenigis ilin ĝis la finoj de iliaj haroj. Ne, ne la porko mem timigis ilin, sed la fakto, ke ĉi tiu grandega besto, klare pezanta preskaŭ tricent kilogramojn, kuris tute silente. Kaj amikoj, sen diri eĉ unu vorton, komprenis tion.

Ili staris tie kun siaj kruĉoj etenditaj kaj kontemplanis la silente kurantan grandegan porkon. Ivano estis la unua, kiu ekparolis: "Verŝajne la raso nomiĝas 'blanka'!"

"Landraso!" - respondis Sergej. Kaj ili denove eksilentis.

Ili staris iom pli, sidiĝis sur faldseĝojn kaj fine ekparolis. La esenco de ilia dialogo estis ke ili trovis klarigon por la susuro de la arbustoj. Sed tiam aperis alia demando: kiel ĉi tiu "koloso" povis kuri tiel silente? Drinkinte kaj manĝinte, ili komencis rekonsciiĝi. Ili eĉ ridis unu pri la alia, kiel ilin povis tiel timigi ordinara porko.

Post ĉirkaŭ tridek minutoj, ili preskaŭ trankviliĝis kaj eĉ komencis paroli pri kiel ne malutilus kontroli la fiŝkaptilojn. Sed post interkonsiliĝo, ili decidis ke ili ne

difektos la ferion mortigante fiŝojn. Ridinte pri la ŝerco, ili denove aŭdis laŭtan susuradon kaj eĉ krakon de la arbustoj, en kiujn elkuris la “senbrua” porko.

Nun ne estis plu tiel timinde. Male, aperis ia ĉas-ekscito. Kaj la amikoj sen ia timo, rigardis al la arbustoj, scivolante kien iros la porko. La alkoholo denove atingis la kapon, kaj ili ŝercis pri kiom da ŝaŝlikaj spadetoj fariĝus el ĉi tiu porko. Sed ili ne sukcesis longe ŝerci.

Tuj kiam la krakado en la arbustoj ĉesis, ili vidis oldulinon elirantan el la arbareto. Ili certe ne atendis ĉi tion. Sergej poste rememoris, kiel ŝajnis al li, ke lia ĉapo leviĝis super lia kapo. La apero de la maljunulino el la arbustoj estis tiel neatendita. Ŝi marŝis al ili. Ŝi marŝis memfide, trankvile, kaj ĉi tio estis pli timiga ol la plej granda porko.

La oldulino proksimiĝis pli kaj pli, jam eblis distingi la trajtojn de ŝia vizaĝo, trakrucita de sulkoj kaj la plej terura — ŝia rigardo. Ŝi rigardis la amikojn sen palpebrumi, kaj estis neklare ĉu ŝi ridetas aŭ malicas.

La ebrio denove elflugis el la kapoj de la malbonŝancaj fiŝkaptistoj. Tiam ili rememoris, ke ili estis katenitaj de tia teruro, ke ne estis eble moviĝi. Kaj la maljunulino iris kaj iris. Kaj eterneco ŝajnis ŝiaj movoj.

Fine ŝi preskaŭ alproksimiĝis. Ŝi staris kaj silente rigardis unue al Serjoga, poste al Ivano. Ili, siavice, ankaŭ silentis. La maljunulino estis la unua, kiu ekparolis: “Ĉu vi ripozas, infanoj? Eble el urbo vi venis? Neniu vizitas nin delonge?”

Sergej estis la unua, kiu ellasis: „Saluton, avinjo! Kial vi promenas sola nokte? Verŝajne porketon perdis?”

Ankaŭ Ivano vekigis el ĉi tiuj vortoj, nu, almenaŭ iom da klarigo por tia nekutima fenomeno.

“Jes, jes! Mi perdis mian porketon!” - respondis la maljunulino kaj fie ekridis.

Tia ridado laŭvorte malvarmigis la sangon en la vejnoj de la amikoj. Kaj la maljunulino daŭrigis: “Kaj mi serĉas mian nepinon - ŝi iris al la lago por naĝi, kaj ne estas ĝis nun! Ĉu vi ne vidis ŝin? Mia nepino estas bela, tre bela!”

La amikoj balancis la kapojn. Ili ne povis eldiri ajnajn vortojn. “Nu, bone, estas malfrue, mi iros!” Se vi ekvidos mian nepinon, diru al ŝi ke ŝi vespermanĝu kaj iru hejmen!” — diris la maljunulino kaj ekiris sur la kampon, al la vilaĝo.

Ivano kaj Sergej longe rigardis al la foriranta maljunulino. Ŝi impresis ilin miloble pli ol ŝia perdita porko. Ambaŭ kaptis sin pensante, ke ne nur fiŝkapti, ili tute ne volas resti ĉi tie. Ili denove sidiĝis, sed antaŭ tio ili unuanime enĵetis pli dikajn bastonoj en la fajron por krei la efikon de protekto.

Ili decidis, ke ne plu trinkos alkoholon hodiaŭ kaj pendigis kaldronon sur la fajron. Ili sidis kaj silentis, estis malfacile paroli, ĉiu digestadis tion, kio okazis, en si. Post ĉio, fakte, nenio terura okazis. Sed de kie venas ĉi tiu besta hororo ene, de kie venas

“Kial vi preterpasas, Matveičjo? Ĉu vi dubis la tutan tagon, ĉu mi venis aŭ ne! Ja speciale post la barilon eliris por certigi, kaj kiam estis certa, eĉ ne venis por saluti!” — la gastino preskaŭ kveris per dolĉa, insinua voĉo. Dum la tuta tempo alĝustigante la jam perfekte konvenajn manumojn de malnovmoda bluzo. Longa jupo de malnova tajlo tuŝis la herbon kaj susuris, kiam la malnova amikino de Matveič faris movojn per siaj manoj. Ŝiaj gestoj estis evoluigitaj ĉe la plej alta nivelo. Kvazaŭ ŝi dum sia tuta vivo estis televida prezentisto aŭ instruistino. La aspekton de la maljuna gastino kompletigis grandega ruĝa broĉo alpinglita sur la dekstra flanko de la brusto.

Matveič rigardis al ĉi tiu broĉo kaj rememoris, kiam li vidis ĝin la unuan fojon. Tio okazis en malproksimaj sovetiaj tempoj. Matveič, tiam jam vidvo, sola edukis filon. Kaj tiam ŝi aperis en ilia kampara lernejo. Inteligenta, saĝa, klare de nobla sango. Ŝi gajnis lian koron, kiel oni diras, unuavide. Matvej neniam renkontis tiajn virinojn — ŝi ŝajnis esti el alia mondo.

Ili eĉ havis amaferon, de kiu Matvej simple perdis la kapon. Kaj li eĉ volis edziĝi kun mirinda urba instruistino, kiu tiutempe jam rolis kiel lerneja direktoro. Ĉar la maljuna direktoro subite malsaniĝis je nekonata malsano, oni kondukis lin al la distrikta hospitalo kaj eĉ, ŝajne, resanigis. Sed kiam li revenis al sia naskiĝvilaĝo, li denove malsaniĝis. Do li kun familio foriris ien suden, ŝanĝante la klimaton laŭ rekomendo de kuracistoj.

Kaj la nova direktoro komencis montri sin "en sia tuta gloro". La dolĉa, inteligenta virino kvazaŭ demetis la maskon kaj montris sian veran aspekton. Kaj la instruistaro kaj lernantoj timis ŝin kiel fajron. Ĉiuj sciis, ke kiam ŝia humoro komencis plimalboniĝi, tiam atendu malbonon. Ŝi certe donus teruran riproĉon, sed post tio, ĉiam ekestis trankvila fazo, kaj ĉiuj elspiris trankvile.

Krom ŝia abomena karaktero, kiel evidentigis, la nova direktoro kunportis alian malfeliĉon al la lernejo. La infanoj komencis malsaniĝi multe pli ofte kaj la loka sukuristo simple dismovis siajn manojn, ne povante trovi klarigon pri tio. La instruistoj, sen kaŝi sin, timis la novan aŭtoritaton kvazaŭ fajron. Estante inteligentaj homoj, ili elpensis unu leĝon - ĉiu, kiu venis en konflikton kun ŝi, tuj komencis tre malsani. Tial, ĉiuj eltenis ĝin sen plendo, kaj ili eĉ ne provis plendi al la distrikta lerneja registaro.

Matveiĉ, enamiĝinta al Anfisa Efsentievna, nenion el tio rimarkis. La unuan fojon en sia vivo, la sperta batalanto kontraŭ malbono lernis kio estas amo. Li edziĝis al sia forpasinta edzino, iel pro inercio aŭ io. Jes, li respektis ŝin, sed ami ŝin... verŝajne ne.

Li perdis la kapon de Anfisa. Liaj samvilaĝanoj, kiuj profunde respektis lin, estis perpleksaj. Matvej estis inspirita kaj blindigita. Kaj kiam li ekkomprenis, kio okazas kaj kiu ŝi estas, tiu ĉi Anfisa Efsentievna, estis preskaŭ tro malfrue. La lernejo duonmalplenis - la lernantoj ne ĉesis malsaniĝi, kaj la instruistoj malrapide forkuradis.

Li neniam forgesos, kiel ŝi ridis en lian vizaĝon. Ne plu kaŝante sian naturon. Kiel ŝi mokis lin, parolante pri tio, kiel ŝi trompis — tiun faman Antipovon! Kies genro dum centjaroj defendas la bonon! Kaj tiam li ne povis rezisti kontraŭ la unua urba jupo kaj eĉ ne povis protekti la infanojn!

Tian honton Matveiĉ ne povis forgesi. Li, kompreneble, tiam faris ĉion por igi Anfisan forlasi la Malhelan, sed ŝi, ĝenerale, ne multe rezistis. Ŝi plenumis sian taskon, la celon fiksitan de ŝia onklino, ŝi plene plenumis ĝin.

Kaj nun ŝi denove staras antaŭ li. Matveiĉ ĉion komprenis, lia onklino denove vokis sian nevinon por helpo. Kaj ĉi tiu helpo estis konduki lin, la gardiston, en malekvilibron, forpreni lian pacon kaj per tio malfortigi lin.

Li ridetis kaj diris: "Vi aspektas bone! Verŝajne, vi trovis lokon kie vi povas reŝargiĝi?"

"Certe! Kiam mi malsatis? Vi ja konas min!" - respondis ridante lia pasinta amo.

"Mi zorgas pri flegejo por olduloj en la regiona centro! Ne lernejo, kompreneble, sed io estas pli bona ol koaguli sangon al vilaĝanoj en la bazarlo! Vi scias, mi ŝatas timon en ĝia pura formo! Kaj iuj maljunuloj tre timas la morton, precipe tiuj, kiuj sukcesis bone "spuri" en sia juneco!" - sen kaŝi ion ajn, Anfisa dividis kun Matveiĉ.

"Je-es, la jaroj pasas, sed vi ne ŝanĝiĝas!" - malgaje respondis al ŝi la avo.

"Bonega komplimento! Estas precipe agrable aŭdi ĉi tion de vi! Ho, kaj vi estis varmega en nia aĝo! Eble ni sidu, trinku teon? Mi vidas, ke vi ne ĉesis bridi la abelejon. Ĉu vi regalos vian malnovan amon per mielo?" - demandis Anfisa dolĉe ridetante.

"Ni kun vi formanĝis nian mielon! Ĝis nun restis amara gusto en mia buŝo! Kion vi volas?" - demandis Matvej sen kaŝi sian koleron.

"Nu, ĉar ne estas antaŭludo, do aŭskultu! Mia onklo speciale vokis min por paroli kun vi. Vi ne povas dialogi kun ŝi. Donu lin al ni, mi promesas, ke li elvivos! Estas nokto hodiaŭ, vi scias kia ĝi estas!" — transiris al la senco la neinvitita gastino.

"Sed kial nome li? Nu, timigu iujn vagabondajn fiŝkaptistojn! Kial vi alroĉiĝis al ĉi tiu ulo? Li estas mia gasto! - Matveič decidis tiri tempon.

Anfisa ekridetis mistere kaj respondis: "Vi mem komprenas ĉion, kial vi ruzas? Vi neniam sciis kiel mensogi aŭ hipokriti. Tial ni respektas vin!"

Matveič silentis kaj, kiel eble plej bone, ŝajnis, ke li ne komprenas, pri kio temas. Anfisa daŭrigis: "Vi ja supozas, ke li estas el familio de kronikistoj. Li diris al vi, ke li estas verkisto. Kaj en ilia familio, vi mem konas la potencon de vortoj. Se li skribus nun, ke la helaj venkis, denove estos ondo da mensogoj, denove la eta popolo ekpensus, ke ili estas ĉiopovaj. Kaj se li skribos, ke ni akiris la superecon, denove estas distordo, vi scias. La pesilo povas esti disbalancita nur provizore, sur tio staras la mondo. Kaj ni tiom timigos lin, ke li forgesos kiel teni plumon en la manoj. Jen ĉio! Kaj ĉiuj estas kontentaj! Kiel oni diras: kaj por nia, kaj por via!"

"Kial vi do tiel alarmiĝis, nu, el la familio de kronikistoj, nu, li verkos sian libron, vi mem diras, ni povas nur provizore klini la pesilon. Kio malbonas en tio? Ne-e! Vi kaŝas veron! Nu, denove, memoru, kiam mi memvole donis al vi personon por disŝiri? Ĉu vi frenezas proponi ĉi tion al mi?"

"Jes, kion tie rememori!" - Anfisa laŭte ridis. Kaj ŝi decidis fini Matveič: "Vi donis al mi ne nur unu personon, vi donis al mi la tutan lernejon sen batalo!"

La celo de la malheluloj estis atingita. Ili faris ĉion por malekvilibrigi la maljunulon. Anfisa rigardis post nervoze foriranta Matveič kaj kun pure virineca melankolio rememoris, kia li estis tridekjara...

Arkaŝa vekigis kiam jam malheliĝis. Liaj kolo kaj dorso estis tiel rigidaj, ke li ne povis tuj ellitiĝi. La tuta korpo doloris, kvazaŭ ĝi estus batata per bastonoj. Pene leviginte, li sentis nekredeblan angoron. Lia memoro alportis al li ĉiujn ĝojojn de la pasinta nokto, kaj lia imago bildigis la venontan.

Avo Matvej per io bruis en la koridoro kaj laŭte blasfemis. La maljunulo klare estis en malbona humoro. Ĉi tio ne aldonis optimismon, kaj Arkaŝa komencis rigardi preter la barilo. Ĉio estis kvietita kaj tre suspektinda.

Sur la verando aperis Matveiĉ, tenante en la mano antikvan pafilon Berdanka. Li alproksimiĝis al Arkaŝa kaj etendis al li la rarajon. “Ĉu vi scias uzi ĝin,” demandis la avo. Arkaŝa englutis salivon kaj kapjesis.

“Vidu, mi havas nur unu kartoĉon; mi trarigardis ĉion, estis alia skatolo, mi ne povas trovi ĝin! La nepo verŝajne uzis ĝin kaŝe dum la ferioj!” — grumblis la avo kaj denove ĉirkaŭrigardis trans la barilon.

“Kiam vi ekvidos, ke la porko arogas, pafu tuj!” - li instruis al Arkaŝa.

“Sed vi kion faros?” - Arkadij ne povis reteni sin.

“Kion, kion! Mi dormos, kaj vi pafu nelaŭte, por ne veki min!” - Avo estis nervoza.

“Pardonu min, maljunulon, pro grumblado. Simple miaj planoj ĵus miksiĝis kaj ŝajnas ke ni batalos sur du frontoj hodiaŭ!” - pardonpetis Matveiĉ. Li paŭzis kaj daŭrigis: “La ĉefa afero estas, ne lasu timon plene ekposedi vin. Tion ili atendas! Kiel timo transprenos vin ĝis la fino, tiam ili venkos. Mi komprenas, ke ĝi sonas strange - ne timi. Sed vi komprenu, ili nutras sin per homaj timoj kaj malvirto dum sia tuta ekzistado. Estis afero, kaj mi trafis sub ilia sorĉo...”

Avo, laŭ Arkaŝa, parolis per plenaj enigmoj. Kiel ne timi? Kiuj aliaj ĉarmoj? Jen engluiĝis! Se mi refoje ankoraŭ ien iros! Estas pli bone tute ne skribi! Kaj tiam li kaptis sin je penso, ke li ne povas ne verki. Jen ĉio, kion li ne povas ne fari! Estas kvazaŭ iu forto en la sango malhelpas lin forlasi ĉi tiun vojon. Kaj tiam li rememoris, ke lia praaŭo, estante direktoro de fromaĝfabriko, verkis libron pri io simila. La libro eĉ estis presita, sed ne atingis la leganton — tia estis tempo... Kaj la avo mem post iom da tempo malaperis sen spuro. Ne estis kutime ke ilia familio parolu pri tio, kio okazis al li, estis tia tempo...

Arkaŝa tiom maltrankviliĝis, ke en iu momento iĝis indifera. Tedis al li ĉi tiuj vilaĝaj kvereloj! “Morgaŭ, kun la unuaj kokoj, mi piediros al la regiona centro! Mi mendos aŭtotransportilon kaj ĉio - hejmen!” — li pensis.

La tempo proksimiĝis al noktomezo. La mallumo estis nepenetrebila, kaj la fajro ŝajnis pli hela ol iam ajn. Avo staris ĉe la rando de la cirklo kaj rigardis trans la barilon. Estis kvazaŭ iu forto logis lin. Kaj subite, el la nepenetrebila mallumo en la lumon de la fajro, paŝis virina figuro. Arkaŝa surprizite ektremis kaj kaptis la fusilon. Ŝi estis tute ordinara virino, ĉirkaŭ tridekjara. Ŝi estis vestita tre malmoderne, sed ĉi tio tute ne difektis ŝin, sed eble male, donis ian specialan ĉarmon al ŝia beleco. Kaj ŝi estis vere tre bela kaj la subtila aromo de franca parfumo ŝprucis el ŝi tra la tuta barilo, ĝi miksiĝis kun laodoro de absinto kaj kapturnigis.

Arkaŝa eĉ forgesis pri ĉio, li langvore fermis la okulojn kaj enspiris ĉi tiun magian aromon. Kiam la delico liberigis lin, li vidis la jenan bildon - avo Matvej, ridetante kiel la lasta idioto, forlasis la korton, klare metinte la brakon ĉirkaŭ la talion de la

nokta gastino. Ŝi metis sian kapon sur lian ŝultron, kaj ili marŝis malrapide en la nepenetreblan mallumon de la senluna nokto.

Arkadij, por diri milde, estis konsternita! Kia gardanto! Ili ŝtelos lian pordon kaj li eĉ ne rimarkos! Je-es, tio estas olda bastardo! Vilaĝa flirtemulo! Arkaŝa insultis, kaj en lia subkonscio finfine konfirmiĝis, ke li certe volas esti kiel tiu ĉi avo en sia maljuneco.

La avo kun neatendite aperinta amatino malaperis en la mallumo de la nokto. Arkaŝa povis fidi nur sin mem. Li volis voki la hundon por almenaŭ paroli kun ĝi, sed Griza malaperis ie.

Restis nur timece ĉirkaŭrigardi. Estis sonora silento, rompanta nur de la krakado de la fajro. La nepenetrebla mallumo ĉirkaŭe estis deprima. Li volis, ke ĉio jam komenciĝu, sed estis kviete, kaj ĉi tio centoble pli timigis.

La nervoj de Arkaŝa komencis malfortiĝi; lia kolo jam doloris pro konstante turnado de la kapo. Sed ĉio estis kviete. Subite aŭdiĝis susuro en la arbustoj malantaŭ la barilo, kaj ĉio denove trankviliĝis. Arkaŝa rapide aldonis pli da ligno al la jam "pionira" fajro.

La susura sono ripetiĝis, kaj grandega porka muzelo aperis el la mallumo en la lumon de la fajro. La porko staris kaj rigardis al Arkaŝa. Ĝi atente rigardis sen palpebrumi. Kaj de ĉi tiu rigardo Arkaŝa preskaŭ freneziĝis. La okuloj de la porko estis tre similaj al homaj okuloj.

Li komencis senti naŭzon pro teruro. Kaj Arkaŝa estis preta ĵuri, ke la porko rikanis kontente. El tio Arkadio tuj kovriĝis per glueca ŝvito. La porko proksimiĝis al la salikbranĉoj kaj marŝis ronde, kvazaŭ serĉante trairejon. Atinginte la muron de la domo, ĝi returniĝis kaj iris reen. Plurfoje marŝinte tien kaj reen, ĝi denove haltis en la mezo kaj rigardis al Arkaŝa. Li staris fiksiĝinta al la loko, timante moviĝi.

Kaj subite la porko eksaltis surloke kaj komencis fosi trairejon sub la branĉoj. Ĝi faris ĝin sufiĉe bone, kvazaŭ ĝia tuta porka korpo estus adaptita por fosi sapeojn. Arkaŝa sincere esperis, ke la branĉoj falos en la tunelon kaj la porko ne povos trairi. Sed, ve, ĝi fosis profunde kaj iel nenature rapide. En normala vivo, ĉi tio estas klare neebla, sed Arkaŝa ne plu estis surprizita de io ajn.

Kaj interne de la cirklo, en la loko, kie la tunelo estis fosita, la tero komencis enfali, kaj unue ekbrilis malpura, grandega rostro, kaj poste aperis abomena porka muzelo, nigrita de la tero.

Arkaŝa senhezite prenis la fusilon de sia ŝultro kaj preskaŭ sen celi pafis. La sono de pafotratranĉis la silenton de la nokto kaj daŭriĝis per korŝira, surdiga kriego. La porko subite rekuris, detruante la tunelon kaj, ŝprucante sangon, forkuris en la mallumon de la nokto.

Metinte la nun senutilan pafilon sur la teron, Arkaŝa sidiĝis apude. Liaj kruroj tremis kaj rifuzis teni. Li metis la kapon en la manojn kaj komencis balanciĝi de flanko al flanko. Kiam ĉi tio finiĝos?

"Kial vi turmentas vin?" — eksonis voĉo. Estis junulino staranta sub la pomarbo, la rando de ŝia robo estis malseka, kvazaŭ ŝi promenis en akvo. Arkaŝa saltis kvazaŭ risorto. Li rigardis la gastinon sen palpebrumi.

"Se vi elirus el la aŭto hieraŭ, kaj el la rondo. Mi trinkus vian sangon kaj lasus vin iri!" — parolis la knabino per velura voĉo.

"Mia avino nutras sin de viaj timoj kaj malvirtoj, abortojn faris, kiam estis multe da homoj en la regiono; kaj mi trinkos iom da sango de vi kaj ĉio! Kial vi avaras?" - daŭrigis ŝi, farante senkulpan vizaĝon.

"Vi nenion rememoros poste! Nur havos kapdoloron dum unu horo kaj jen ĉio!" - kveris la vampirino.

Kaj Arkaŝa rimarkis, ke la fajro, kiu antaŭe flagris, komencas estingiĝi, kvazaŭ la oksigeno ĉirkaŭ ĝi elĉerpiĝas. En tiu momento estis tia penso en lia kapo — sincere, se mi skribos ĉion tian, kia ĝi estis, neniu kredos! Oni sendos min en frenezulejon! Sed mi skribos! Se mi vivos, mi skribos ĉion kiel ĝi okazis! Ĉi tio donis al li kuraĝon kaj eĉ ian arogantecon. Oni promenas ĉi tie! Trinki sangon! Mia eksedzino ja trinkis sufiĉe da sango de mi, sed jen ĉi tiu sangosuĉa lutro!

Sed memorante la striktajn instrukciojn de la avo Matvej, li ne subtenis dialogon. Li staris kaj silentis. Sed la gastino ne ĉesis: "Eble vi kaj mi povas promeni? A? Jen la avo, centjara je la tagmanĝo, kaj li kuris post mia onklino kiel juna kapreto!"

Arkaŝa silentis kaj provis ne rigardi la knabinon. Li estis terurita ĝis naŭzo. Li mallevis la kapon kaj staris, iomete balanciĝante.

Subite bruanta maljunulina voĉo aŭdiĝis de la barilpordeto: "Mi diris al vi, ni estos kalkulitaj!" Kaj estas neniu por defendi vin! La Antipova raso ĉiam estis tenta al ina voko!"

En la lumo de la fajro, apud la trafalinta tunelo, staris la sama maljunulino, kiun li preskaŭ transveturis hieraŭ. Nur sub la koltuko estis videbla sanga blanka bandaĝo. De ĉi tiu bildo eĉ pli ektimis Arkaŝa, kvankam ŝajnis, ke pli ne eblas.

Li staris kaj rigardis alterne la nepinon kaj la avinon. Ili rabe ridetante, marŝis laŭ la rondo, poste, en ajna momento, ili prenis la manojn unu de alia, fermis la okulojn kaj komencis ion balbuti. Post iom da tempo, Arkaŝa ekvidis, ke la salikbranĉoj kuŝantaj apud ili komencis nigriĝi kaj iliaj folioj defali.

Arkaŝa komprenis kaj mense kaj subkonscie, ke tio estas la fino. Li fermis la okulojn, li estis netolereble tiritaj sidiĝi sur la teron, sed li firme decidis, ke li akceptos morton staranta, kiel viro.

Lia kapo turniĝis kaj bulo formiĝis en lia gorĝo. Kaj li ne tuj ekaŭdis, ke iu eniris la rondon kaj stariĝis ĝuste antaŭ li.

Estis avo Matvej, kaj lia kapo estis sanganta, sed li staris kun rekta dorso, levinte la brakojn flanken, kaj ankaŭ ion murmuris. Estis neeble distingi la vortojn, kaj Arkaŝa ĉesis aŭskulti kaj decidis ekrigardi el malantaŭ la dorso de la avo. La avino kaj la fraŭlino ellasis reciproke la manojn kaj staris rigardante Matveič el sub la brovoj, dum ili kolere siblis tiel, ke blanka, naŭza ŝaŭmo aperis sur ambaŭ iliaj lipoj. Arkaŝa ne sciis, kiom da tempo tiel pasis. Kaj denove, la sono, kiu fariĝis por li plej agrabla, eltiris lin el la vualo de la forgeso. Ie en la vilaĝo kriis koko.

Tagiĝis, kaj la avo denove, kvazaŭ nenio estus okazinta, elprenis la pordon el la domo kaj almetis ĝin al la kruroj. Kaj li komencis prepari la tablon. La samovaro denove fumis, kaj ĉiuj hororoj de la nokto ŝajnis malproksimaj kaj neverŝajnaj.

Arkaŝa nenion demandis, sciante, ke se la avo ekvolos, li mem rakontos ĉion. Matveič malrapide verŝis la teon, metis la tason da mielo pli proksime al Arkaŝa kaj diris: "Tiel ja okazas! Malnova amo neniam rustiĝas. Mi amis ŝin en mia juneco, ne sciante kiu ŝi estas. Kaj vi vidas, kiel fariĝis, ŝi preskaŭ trompis min denove, la maljunan malsaĝulon! Ili havas enorman potencon super ni, virinoj ja. Sed vi bravulo! Mi ne cedis al ili!"

Avo trinketis teon kaj daŭrigis: "Pardonu min! Mi trompis vin! Ĉi tiu pordo estas la plej ordinara. Mi nur volis provi vin, ĉu vi havas la forton konservi la sekreton kaj ne interŝanĝi ĝin kontraŭ via vivo? Mi vidas, ke vi estas solida ulo, ne tenu koleron al mi!"

Arkaŝa eĉ ne pensis ofendiĝi. Li eĉ ne havis tiajn pensojn. "Sed tamen, mi skribos pri ĉio ĉi!" - li diris, ridetante al avo.

"Eble mi klarigos ion alian al vi. Vidu, Arkadio, estas multe da aferoj en la mondo, kiuj estas neklarigeblaj por ordinaraj homoj, sed memoru unu aferon por ĉiam. Homaj timoj kaj malvirtoj estas la plej potencaj koagulaĵoj de potenco, tio estas, energio! Jen, virino volis sekretan aborton, estis timo, ke iu ekscios, kaj - la peko de murdo mem, kaj nur poste - sento de kulpo por la tuta vivo. Kaj ĉi tiu virino nutras tiajn malbonajn maljunulinojn dum sia tuta vivo per sia timo! Kaj multaj estas tiaj ekzemploj! Sed plej grave, timo estas ankoraŭ forto en si mem! Ni diru, se vi imagis, ke ili mortigos vin, tio estus okazonta, kaj mi ne havus tempon fari ion ajn! Anstataŭe, vi sukcesis fermi vin de ili, kvankam vi preskaŭ prifekas viajn pantalonojn!" — la maljunulo finis sian monologon en sia karakteriza maniero.

Arkaŝa sidis kaj malzorge ridetis, li komprenis ĉion.

Avo eksaltis: "Sed kioma horo estas? Mi ne volis ĝojigi vin anticipe, hodiaŭ la manĝvara aŭtobutiko venos al ni laŭplane! Mi bone konas ilin, bonuloj, ili prenos vin! Vi venos tien en la budo, nenio timiga!"

Arkaŝa preskaŭ falis de ĉi tiu novaĵo. Hej avo! Tuta surprizo, sed ne homo! Li ne povis reteni siajn emociojn kaj forte brakumis la avon.

La aŭtobutiko staris kontraŭ la domo de Matveiĉ. La ŝoforo ne rapidigis la gaston, bone sciante, ke oni ne ofte vizitas la maljunulon.

“Mi venos al la regiona centro kaj sendos aŭtotransportilon ĉi tien. Mi mem ne revenos! Pardonu, avo! - diris Arkaŝa ridetante.

“Jes, mi komprenas! Kaj ankoraŭ, Arkadij, bonvolu mendi ŝildon kun la surskribo “v.Hela”, estas tempo ŝanĝi la nomon denove. Kaj en la regiona centro, kiel veterano, mi solvos ĉi tiun aferon, estu trankvila! Vidos, homoj denove revenos ĉi tien, niaj lokoj estas riĉaj! Kaj vi revenu post unu jaro, mi atendos vin!” - admonis avo Matvej Arkaŝon.

“Bone, avo! Mi faros tabelon kaj sendos ĝin per aŭtotransportilo! Eĉ ne pensu proponi al mi monon por ĝi! Ĉi tio estas mia donaco al vi!” - respondis Arkaŝa, kaj li kaj avo brakumis.

Arkaŝa veturis en la budo, ĉirkaŭita de laodoro de freŝa pano kaj pensis: "Sed ĝi estos bona libro, multaj legos ĝin, sed ĉu oni kredos?"



*elrusigis Sergei Isakov (Rusio)*

## Oscar Wilde (1854-1900)



### La modela milionulo

Krom se oni estas riĉa, li ne taŭgas esti ĉarmulo. Amaferoj estas la privilegio de riĉuloj, ne la profesio de senlaboruloj. Malriĉuloj devus esti praktikaj kaj prozaj. Pli bonas havi regulajn enspezojn ol esti fascina. Tiuj estas la grandaj veroj de moderna vivo, kiujn Hugêo Erskin neniam ekkomprenis.

aŭtoro, Oscar Wilde

Kompatinda Hugêo! Intelekte, ni devas agnoski, li ne tiom gravis. Li neniam diris ion brilantan aŭ malbon-humoran en sia tuta vivo. Sed aliflanke li estis ege bel-aspekta, kun sia krispa, bruna hararo, sia ĉizelita profilo, kaj siaj grizaj okuloj. Li estis tiom populara kun viroj, kiom kun virinoj, kaj li havis ĉiujn talentojn krom tiu de mongajnado. De lia patro li heredis kavalerian glavon kaj la *Historion de la Duoninsula Milito* en dek kvin volumoj. Hugêo pendigis la unun super la spegulo, kaj metis la alian inter la sport- kaj ĉeval-gazetoj *Ruff's Guide* kaj *Baily's Magazine*, kaj li vivis per du cent pundoj jare, kiun maljuna onklino spezis al li. Li jam provis ĉion. Li estis je la borso dum ses monatoj; kompreneble li kapturniĝis inter haŭsieroj kaj basieroj! Dum iomete pli da tempo li komercis kun teo, sed baldaŭ laciĝis de fermentitaj kaj nefermentitaj teoj. Poste li provis vendi nedolĉan ŝereon. Tio ne kontentigis; la ŝereo estis iomete tro nedolĉa. Rezultis ke li fariĝis nenio. Li restis plaĉa, nekapabla viro kun perfekta profilo kaj sen profesio.

Des pli malbone, li estis amanto. La knabino, kiun li amis estis Laura Merton, filino de emeritiĝinta kolonelo, kiu ĵus estis perdinta sian bonhumoron kaj bonan digeston en Hindujo kaj neniam retrovis nek la unun, nek la alian. Laura adoris lin, kaj li pretis kisi ŝiajn ŝulacojn. Hugêo kaj Laura estis la plej bela paro en Londono, sed ne posedis unu pencon kune. La kolonelo tre ŝatis Hugêon, sed ne estis alparolebla pri eventuala fianĉiĝo. "Venu al mi, mia knabo, kiam vi havos dek mil pundojn de via propra mono kaj ni priparolos la aferon," li ĉiam diris; kaj Hugêo aspektis tre malgaja en tiu epoko, kaj devis iri al Laura por konsolo.

Iun matenon, kiam li estis survoje al Holland Park, kie loĝis la familio Merton, li haltis por viziteti grandan amikon sian, Alano Trevoron. Trevoron estis pentristo. Certe, malmulte da homoj, nuntempe, ne estas pentristoj. Sed li ankaŭ estis artisto, kaj artistoj estas sufiĉe raraj. Miaopinie li estis kruda strangulo, kun lentuga vizaĝo kaj ruĝa taŭzita barbo. Tamen, kiam li prenis la penikon, li estis vera majstro, kaj liaj pentraĵoj estis avide postulataj. Li estis tre allogita de Hugêo unue, oni devas agnoski, tute pro lia persona ĉarmo. “Pentristo,” li diradis, “devas koni nur homojn malsaĝajn kaj belajn; tiel estas plezuro rigardi ilin, kaj intelekta ripozo paroli kun ili. Viroj, kiuj estas dandoj, kaj virinoj kiuj estas ĉarmulinoj regas la mondon, almenaŭ ili devus regi ĝin.” Tamen, ekkoninte Hugêon pli bone, li preskaŭ ŝatis lin egale pro lia lerta, entuziasma spirito, kaj lia malavida, sendisdisciplina naturo, kaj donis al li daŭran aliron al sia studio.

Enirinte, Hugêo trovis Trevoron meti la lastajn peniko-tuŝojn al mirinda naturgranda pentraĵo de almozulo. La almozulo mem staris sur altigita tabulo en angulo de la studio. Li estis velka viro maljuna, kun vizaĝo simila al sulkigita pergameno, kaj kompat-elvoka esprimo. Super liaj ŝultroj estis dejetita bruna mantelo, ĉifona kaj deŝirita; sur liaj dikaj botoj videblis la flikaĵoj, kaj per unu mano li apogis sin sur kruda bastono, dum per la alia mano li eltenis sian eluzitan ĉapelon almozpete.

“Kia miriga modelo!” flustris Hugêo, dum li salute manpremis lian amikon.

“Miriga modelo?” kriis Trevoron plej laŭte; “Mi certe kunsentas! Tian almozulon, oni ne trovas ĉiutage. Estas feliĉa trovaĵo, mia amiko; estas vivanta Velasquez! Ho ĉielo! kian skizon Rembrandt estus farinta de li!”

“La kompatindulo!” diris Hugêo, “kiom mizera li aspektas! Sed mi supozas, ke por vi pentristoj, lia vizaĝo estas fortune?”

“Certe”, respondis Trevoron, “vi ja ne volas ke almozulo aspektu feliĉa, ĉu?”

“Kiom modelo gajnas por modeli?” Hugêo demandis, eksidante sur komfortan sidlokon sur divano.

“Unu ŝilingon hore.”

“Kaj kiom vi ricevos por la bildo, Alano?”

“Ho, por ĉi tiu mi ricevos du mil!”

“Pundoj?”

“Gineoj. Pentristoj, poetoj, kaj kuracistoj ĉiam ricevas gineojn.”

“Nu, mi opinias ke modelo devus ricevi procenton,” kriis Hugêo, ridante; “li laboras tiom forte kiel vi.”

“Sensencaĵo, sensencaĵo! Pripensu la ĝenon nur pri aplikado de farbojn kaj tuttaga starado antaŭ la stablo! Estas facile por vi paroli Hugêo, sed mi certigas al vi ke estas

momentoj en kiuj la arto preskaŭ atingas la dignon de manlaboro. Sed vi ne devas babili; mi estas tre okupata. Fumu cigaredon kaj silentu.”

Iom da tempo poste, servisto eniris, kaj diris al Trevorro ke kadrismo volis paroli kun li.

“Ne forkuru, Hugêo,” li diris elirante, “mi tuj revenos.”

La olda almozulo profitis de la foresto de Trevorro por ripozi dum momento, sur ligna benko malantaŭ li. Li aspektis tiom forlasita kaj mizera ke Hugêo povis nereteneble kompati lin, kaj palpis siajn poŝojn por vidi kian monon li havis. Li trovis nur pundan ormoneron kaj kelkajn kupro-monerojn. “La kompatindulo,” li pensis en si mem, “li bezonas ĝin pli ol mi, sed tio signifas ke mi ne kaleŝos dum duonmonato”; kaj li transiris la studion kaj glitigis la ormoneron en la manon de la almozulo.

“Dankon sinjoro,” li diris, “dankon.”

Tiam Trevorro alvenis kaj Hugêo adiaŭis, ruĝiĝinte iomete pro tio, kion li estis farinta. Li pasis la tagon kun Laura, kiu ĉarme skoldis lin pro lia tromlavaremo, kaj devis hejmeniri piede.

Tiu vespere li promene eniris la Paletran Klubon je ĉirkaŭ la dek unua, kaj trovis Trevoron sidanta sola en la fumantejo trinkante germanajn blankvinon kaj mineralakvon.

“Nu, Alano, ĉu vi sukcesis fini la pentraĵon?” li diris, dum li ekbruligis cigaredon.

“Finpentrita kaj kadrita, mia knabo!” respondis Trevorro, “kaj parenteze vi faris konkeraĵon. Tiu maljuna modelo, kiun vi vidis, ege ŝatas vin. Mi devis rakonti pri vi – kiu vi estas, kie vi loĝas, kiom vi enspezas, kian estontecon vi havas—”

“Mia kara Alano,” kriis Hugêo, “li verŝajne atendas min kiam mi iros hejmen. Sed certe vi nur ŝercas. Kompatinda mizerulo! Se mi nur povus fari ion por li. Estas terure, mi kredas, ke iu ajn devas esti tiom mizera. Mi havas amason da uzitaj vestaĵoj hejme – ĉu vi pensas ke li ŝatus havi iujn el ili? Nu, liaj ĉifonoj estos disfalantaj.”

“Sed li aspektis belege en ili,” diris Trevorro. “Mi nenial pentrus lin en neformala kompleto. Ĉifonoj por vi estas romantikismo por mi. Kio ŝajnas povra al vi, ŝajnas pitoreska al mi. Tamen, mi sciigos lin pri via oferto.”

“Alano,” diris Hugêo serioze, “vi pentristoj estas senkoruloj.”

“La koro de artisto estas en lia kapo,” respondis Trevorro, “kaj krome, nia afero estas bildigi la mondon laŭ nia vido, ne reformi ĝin laŭ nia kono. Ĉiu havas sian funkcion. Nu rakontu al mi kiel fartas Laura. La maljuna modelo tre interesiĝis pri ŝi.”

“Ne diru al mi, ke vi parolis al li pri ŝi?” diris Hugêo.

“Certe mi parolis. Li scias ĉion pri la necedema kolonelo, la aminda Laura, kaj la dek mil pundoj.”

“Vi parolis al tiu olda almozulo pri ĉiuj miaj privataj aferoj?” kriis Hugĉo, ruĝe kaj kolere.

“Mia kara knabo,” diris Trevoro ridetante, “tiu olda almozulo, kiel vi diras, estas unu de la plej riĉaj homoj en Europo. Li povus aĉeti tutan Londonon morgaŭ sen depreni tro multe de lia konto. Li posedas domon en ĉiu ĉefurbo, manĝas de orranditaj teleroj, kaj povas malebligi ke Rusio militos, se plaĉas al li.”

“Kion diable vi volas diri?” kriis Hugĉo.

“Ekzakte tion kion mi diras,” respondis Trevoro. “La oldulo kiun vi vidis hodiaŭ en mia studio estas Barono Haŭsberg. Li estas bona amiko mia, aĉetis ĉiujn miajn pentraĵojn k.s., kaj antaŭ monato komisiis al mi pentri lin kiel almozulon. Kion mi aldonu? Estas fantazio de milionulo! Kaj mi devas diri ke li aspektis splenda en siaj ĉifonoj, aŭ en miaj ĉifonoj kiuj estis malnova kompleto kiun mi akiris en Hispanujo!”

“Barono Haŭsberg!” kriis Hugĉo, “Ho ve! Mi donis al li ormoneron!” kaj li sinkis en brakseĝon tute konsternita.

“Donis al li ormoneron!” kriis Trevoro, kaj laŭte ekridis. “Nu mia kara knabo, vi neniam revidos ĝin. Lia metio estas akiri la monon de la aliaj.”

“Eble vi estus informinta min, Alano!” paŭtis Hugĉo, “ke mi ne tiel arlekenu.”

“Nu, unue Hugĉo,” diris Trevoro, “neniam venis al mia kapo, ke vi ĉirkaŭirus disdoni almozon tiel malprudente. Mi povas kompreni se vi kius belan modelon, sed doni ormoneron al malbelan – per Jovo, ne! Krome, fakto estas ke mi ne ricevis gastojn hodiaŭ; kaj kiam vi eniris mi ne sciis ĉu ĝenus al Haŭsberg menci la nomon. Vi scias ke li ne estis laŭrange vestita.”

“Kian sentaŭgulon li devas taksi min!” diris Hugĉo.

“Tute ne. Li estis en ege bona humoro post via foriro; li ridklukadis al si mem frotante siajn maljunajn sulkigitajn manojn. Mi ne povis malkovri kial li tiom interesiĝis pri viaj aferoj; sed nun mi komprenas ĉion. Li certe investos vian ormoneron, Hugĉo, kaj pagos al vi interezon post ĉiu ses monatoj, kaj havos rakontindan anekdoton post tagmanĝo.”

“Mi estas malfeliĉulo,” grumbliis Hugĉo. “Plejbone mi enlitiĝos; kaj mia kara Alano, vi ne devas rakonti tion al iu ajn. Mi ne aŭdacus montri mian vizaĝon en la societo.

“Sensenĉaĝo! vi meritas la plej altan krediton pro via filantropia spirito. Kaj ne forkuru. Prenu alian cigaredon, kaj vi rajtas paroli pri Laura tiom, kiom vi volas.”

Tamen, Hugĉo ne restis, sed piediris hejmen malfeliĉe, dum Alano Trevoro ridegis neregeble.

Venontmatene, dum li matenmanĝis, la servisto portis supren al li karteton, sur kiu estis skribita, ‘Monsieur Gustave Naudin de la part de M. le Baron Haŭsberg’. “Mi supozas ke li venis por postuli pardonpeton,” diris Hugĉo al si mem; kaj ordonis la serviston enirigi la vizitanton supren.

Maljuna sinjoro kun oraj okulvitroj kaj griza hararo eniris la ĉambron, kaj diris, kun leĝera franca akĉento, “Ĉu mi havas la honoron alparoli Monsieur Erskine?”

Hugĉo klinis sin.

“Mi venas de Barono Haŭsberg,” li daŭrigis. “La Barono—”

“Mi petas vin, sinjoro, ke vi ofertu al li mian plej sinceran pardonpeton,” balbutis Hugĉo.

“La Barono,” diris la maljuna sinjoro ridete, “komisiis al mi porti tiun leteron al vi”; kaj li transdonis sigelitan koverton.

Sur la ekstero estis skribita, “Nuptodonaco al Hugo Erskine kaj Laura Merton, de maljuna almozulo,” kaj ene estis ĉeko por dek mil pundoj.

En la geedziĝfestoj Alano Trevoro estis la nuptoatestanto, kaj la Barono solene paroladis ĉe la nupta matenmanĝo.

“Milionulaj modeloj,” rimarkis Alano, “estas sufiĉe raraj; sed per Jovo, modelaj milionuloj eĉ pli!”



elangligis **Detlef KARTHAUS** (Kanado)

## Iljet Aliĉka (Albanio)



### La rakonto pri Bardho

Jen kiel Bardho venis en la malliberejon.

*aŭtoro, Iljet Aliĉka*

Estis vespero. Tre laca Bardho ĵus revenis de vilaĝo al Tirana.

En tiu vilaĝo li laboris kiel instruisto en la popol-lernejo. Ĉiutage je la kvina matene li petveturis al sia laboro kaj ĉiutage vespere rehejmiĝis ankaŭ petvete.

Li jam ne estis juna kaj tia veturado tre lacigis lin. Sed li eltenadis tion pro la edzino, ĉar kiel li diris: „se mi ne estus revenanta hejmen, la edzino turmentegus min per ĉiaj suspektoj.”

Por la ĉiutagaj veturoj Bardho pagis eĉ ne lekon. Kiel ano de la volontula trafikservo li havis specialan atestilon, subskribitan de la ministro pri internaj aferoj, kaj la ŝoforoj – vole-nevole – devis veturigi lin senpage.

Reveninte post sia laboro, kutime ĉirkaŭ la sesa vespere, Bardho trinkis kafon, ĉiam en la sama kafejo.

Tiun vesperon li venis duonhoron pli malfrue. Komence en la kafejo li ne turnis atenton al elegantulo, kiu insultis la agrablan kaj ĝentilan kelnerinon, ke ŝi donis al li kafon el tro bruligitaj grajnoj.

La kelnerino provis afable klarigi al la gasto, ke ŝi ne kulpas, ĉar ĝuste tian kafon ŝi ricevis, sed la viro ne akceptis la klarigon.

Fine li furioziĝis tiel, ke li sakris la kelnerinon kaj nomis ŝin putino.

Bardho ne eltenis. Li ne povis toleri la arogantan konduton turnitan kontraŭ la damo. Do, li kriis indigne:

– Hontu! Li surmetis nigran jakon kaj pensas, ke li povas ofendi la honestan virinon! El kiu vilaĝaĉo alvenis la estimata kamarado? – (tiel li riproĉis al la kverelulo la nordan dialekton, en kiu li sakris la kelnerinon).

Sed la krudeco de la kafoŝatanto ne havis limojn. Li kriegis al Bardho:

– Nu, kion! Vi havas la nazaĉon kiel pioĉo, do ne enŝovu ĝin en fremdajn aferojn!  
– (Efektive, la nazo de Bardho estis pli longa ol kutime kaj ĉe multaj agloj ĝi povus vekti envidadon).

Bardho sentis, ke li furioziĝas, sed li ekregis sin kaj nur diris:

– For de ĉi tie, dupo.

Li ne dirus tion, se li sciis, ke la „dupo” estas deputito en la Popola Ĉambro kaj – kompreneble! – havas la imunecon.

– Ĉu vi scias, al kiu vi parolas tion, ci stulta maljunulaĉo?! – ekkoleregis la deputito.

Li elkuris el la kafejo, vokis la plej proksiman policiston, diris, kiu li estas, kaj ordonis forpreni Bardhon al la policejo, pro la publika ofendo de la popol-deputito.

Bardho iris kviete post la policisto, firme konvinkita pri la senkulpeco. Kaj certe la okazaĵo finiĝus per severa admono, se ne la devo observata en la policejoj, ke oni kontrolas tion, kion en la poŝoj havas civitano venanta – indiferece pro kiu ajn kaŭzo.

Kiam inter diversaj objektoj, elprenitaj de Bardho el la poŝoj, oni trovis la dokumenton pri senpaga vojaĝado, kiun subskribis la ministro pri internaj aferoj, la policistoj stariĝis respektoplene. Sed kiam ili ekvidis panikon ĉe Bardho, ili rigardis atente la permesilon kaj rekonis, ke la subskribo de la ministro pri internaj aferoj estas falsita, kaj la stampajlon oni elprenis per kvinleka monero.

Sen rezisti longe, Bardho, diris, ke li mem falsis la dokumenton „pro financaj malfacilaĵoj”.

Oni tuj arestis lin.

Bardho esperis, ke li estos kondamnita pro ordinara falsado.

Sed la falsadon de skribaĵoj de la ministro pri internaj aferoj oni juĝadis laŭ eksterordinaraj, tre severaj leĝoj. Do, Bardho ricevis kvar jarojn, kaj antaŭ ol iri al malliberejo, li restadis longe en la arestejo, ĉar ankoraŭ estis serĉataj la aliaj dokumentoj, kiujn povis fari „tiu ruzega falsisto”.

Bardho pravigis sian faron per la monomanko kaj malfacilaĵoj dum la ĉiutagaj veturoj al la lernejo. Sed oni lasis ĉi vortojn preter la oreloj. Oni devas aldoni, ke Bardho ne tuj malkaŝis la veran kaŭzon de siaj ĉiutagaj revenoj (kiuj postulis de li teruran sindonemon). Sed tion ne permesis lia vira naturo.

Bardho pasigis kvar jarojn en la malliberejo digne kaj lia konduto estis modela. Li apartenis al tiuj, kiuj scias, kiel alkitimiĝi al ĉio kaj venki ĉiajn malfacilaĵojn. Li suferegis nur kiam li pensis, kion dum tiu ĉi tempo faras lia edzino, kiu en la unua jaro kontentigis sin per kelkaj vizitoj al li, poste ŝi perdiĝis ie, kaj du aŭ tri monatojn antaŭ ol Bardo eliris la malliberejon, ŝi sendis du skatolojn kun plej bonaj cigaredoj (li estis tiel kortuŝita, ke li pensis ankoraŭ pli sopire).

Iun aŭtunan posttagmezon mi renkontis Bardhon post kiam li ĵus eliris la malliberejon. Li magriĝis kaj lia nazo estis ankoraŭ pli longa. Kompreneble, li estis forpelita el la lernejo, ĉar „la eksa malliberulo ne povas edukadi la junan generacion”. Li vivis per la salajro de sia edzino, kiu laboras en nutraĵvendejo, kaj li atendis, ĝis kiam venos la emerita pensio.

– Tiu deputito estis kanajlo! – mi tuj diris al Bardho, kiam ni salutis unu la alian.  
– Sufiĉis unu stulta kverelo por malliberigi vin dum kvar jaroj.

Bardho suspiris enspensigeme.

– Eĥ, tia estas la vivo. Sed ne okazis tiel simple, kiel povus ŝajni.

Mi ekpensis, ke Bardho riproĉas al si la falsadon.

– Milfoje – li daŭrigis – mi konsideris tion en mia ĉelo, ĉar kion alian mi povus fari? Do, estis multege da kaŭzoj por mia aresto, mi dirus.

– Ĉu vere? – mi ekmiris. – Mi ne scias.

– Tio estas longa historio, ni ne perdu tempon ...

– Kia historio?! – mi interrompis – vi ricevis kvar jarojn, ĉar vi ofendis tiun deputiton, kaj en la policejo oni trovis vian dokumenton kun falsita subskribo de la ministro pri internaj aferoj.

Pro tio mi sidis en la malliberejo. Sed ĉu mi estus kondamnita, se tiun tagon mi estus veninta al la urbo kiel kutime, se mi ne estus unu horon malfruiĝinta kaj trinkanta kafon ĝuste tiam, kiam ankaŭ trinkis kafon tiu deputito, kiu vere estis kanajlo, kiel vi diris!

– Nu, jes, sed ...

Bardho ne aŭskultis, li enspiris cigaredfumon.

– Tiun vesperon mi venis preskaŭ unu horon pli malfrue ol kutime! Ĉu vi scias, kial?

– Ne!

– Tiun tagon unu el miaj lernantoj ne skribis hejme taskojn pri aritmetiko kaj mi haltigis lin post la lecionoj, ke li skribu ĉi taskojn. Nur poste mi reheimiĝis. Se tiu lernanto estus skribinta hejme siajn aritmetikajn taskojn, mi estus forveturinta kiel kutime, mi ne estus trinkanta kafon kun tiu deputito-impetulo, do mi ne estus kondukita al la policejo, ili ne estus trovintaj la falsitan dokumenton kaj sekve mi ne estus malliberigita. Kaj eble ne tiu bagatela malfruiĝo estis la kaŭzo de mia aresto, sed juglandoj?

– Kiaj juglandoj! – mi interrompis.

– Ĉar tiun tagon, kiam mi eliris la lernejon, haltigis min la patro de unu el miaj plej malbonaj lernantoj kaj insistis, ke mi prenenu du kilogramojn da juglandoj donace. Al lia filo minacis, ke li restos ankoraŭ unu jaron en la sama klaso. Mi konsentis, sed mi devis atendi longe, ĝis li alportis retsakon da juglandoj (kiujn cetere mi neniam formanĝis). Do, se mi ne estus preninta ĉi juglandojn, eble pli frue mi estus irinta al la kamioneto aŭ eble mi estus sidanta en la kamioneto, kiu povus veturi pli rapide aŭ pli malrapide ol tiu, kiu transportis min al Tirana en la momento, kiam la deputito trinkis kafon kaj kriegis „putino”, do ...

– Do, vi ne estus malliberigita pro la falsaĵo – mi finis.

– Ĝuste! – konsentis Bardho.

– Bone, Bardho – mi provos fini – estas tiaj hazardoj, koincidoj. En via situacio plej gravaj ne estis juglandoj, nek ĉi taskoj pri aritmetiko aŭ Dio scias, kio ankoraŭ – sed tiu falsita dokumento. Ĉu vi pensas, ke se iu estus doninta al mi juglandojn, mi estus malliberigita por kvar jaroj?

– Ho, ne, mia kara! – oponis Bardho. – Dum kvar jaroj en la malliberejo ĉion mi pripensis detale. Diru: se revenante al Tirana, mi ne estus kaptinta tiun kamioneton kun ligno, per kiu mi vere alvenis, sed kamionon kun kromo, ĉu mi estus malliberigita? Kompreneble, ke ne! Ĉar se la ŝoforo ne estus haltinta duonhoron pli longe en la oficejo en Mamurras, por skribi transportajn dokumentojn, mi estus veninta pli frue kaj ne estus trinkanta kafon kun tiu deputito ĝuste tiam, kiam li kriegis ...

„Putino” – mi aldonis, iom post iom perdante mian paciencon.

Bardho kapjesis.

– Tamen... – mi ne cedis.

– Se ne, do ne. – Bardho eksentis sin ofendita. – Dum kvar jaroj en la malliberejo mi havis sufiĉe da tempo, por vidi ĉion precize. Kaj vi ... vi, kiu neniam sidis en malliberejo, ne povas scii tion pli bone. Mi diros al vi! Se tiun tagon mi estus forlasinta la kamioneton en la centro, kaj ne ĉe la rondostrato, kaj se mi ne estus atendanta la buson, kiu veturas al la centro, sed piedirinta, mi ne estus trinkanta kafon en tiu fatala horo! Se mi estus sciinta, ke okazos al mi tia malfeliĉo, mi preferus ankoraŭ treni miajn piedojn sur tiu mallonga vojo. Aŭ se mi ne estus irinta sur tiu mallonga vojo al la centro, kaj nur elektus la ĉefan straton, kaj se mi ne estus haltinta, por aĉeti skatolon da tiuj malbenitaj cigaredoj, sed aĉetus tion en mia kafejo (nun Bardho kolere premeŝtis sian cigaredon en la cindrujo), mi ne estus veninta tien, kie tiu deputito kverelis pro la malbongusta kafo.

Mi silentiĝis. Kaj li, ŝanĝante la voĉtonon, parolis:

– Ĉu vi scias, kiel en la malliberejo turmentegis min la penso, kion tiutage faris la deputito. Kial ĝuste tiam, je tioma horo, kiam mi estis tie, li devis trinki kafon kaj kriegi „putino”? Por kompreni tion, mi analizis dum kvar jaroj, kiam mi estis malliberigita, variantojn de ĉiuj eblaj situacioj, kiujn li, deputito, povis partopreni en tiu malfeliĉa tago (komencante per la ĉiutaga okuparo de la deputito, kunsidoj en la parlamentejo, renkontiĝoj kun la nacio kaj similaj). Kompreni tion, kompreni, kial li trinkis kafon ĝuste je tioma horo, tre helpus al mi klarigi sekvon de la okazaĵoj en mia vivo.

– Vi pravas – mi diris.

– Alian direkton por miaj esploroj – li parolis kontentigita – povus doni respondon al la demando, kial ĝuste tiun tagon la kafo tie estis pli malbona ol kutime. Kaj kial en tiu tago la kelnerino estis pli laca kaj malpli indulgema por la arogantaj gastoj ol kutime. KREDU min, alian tiel paciencan virinon oni povus trovi nenie! Do, kio pikis ŝin en tiu tago, nur Dio scias.

Efektive! – mi jam ne obstiniĝis.

La sekvan direkton al miaj serĉadoj – parolis nekonfuzeble Bardho – donis la situacio de la polico ĝenerale, kaj precipe de tiu policisto, kiu min kondukis al la policejo. Do, kial tiu policisto, kiun la deputito alvokis, devis stari ĝuste en tiu momento antaŭ la podio de la kafejo, kaj ne iris, ekzemple, por cigaredoj aŭ por alio? Mallonge dirite (por jam ne plilongigi ĉi interparolon), mi konsideris en la malliberejo detale ankaŭ la aliajn, ne malpli gravajn kaŭzojn, kial estis detruita mia vivo. Ekzemple: pro kio kaj ĝis kia grado oni reagas je la pejorativa signifo de la vorto „putino” en la albana lingvo? Ĉu la saman nuancon ĝi havas en aliaj lingvoj, ĉu la saman koleregon montrus ekzemple franco aŭ ĉino? (Kvankam mi havas la impreson, ke la ĉinoj neniam koleregas pro simila okazaĵo.) Kaj kial ne ĉiuj homoj havas la samajn nazon? Kaj kial iom pli longa nazo estas mokata? Kaj kial ...

Tre sperte li klarigis la aferojn de ĉi tiu mondo.

Fine li eksilentis. Ni sidis mutaj.

Post momento liaj okuloj brilis kaj li komencis revii:

– Sincere dirite, estas la tuta feliĉo, ke tio okazis al mi.

– Kial?! – mi ekmiregis.

– Ĉar mi forpasus el ĉi tiu mondo, komprenante nenion. Sed dank’ al tiu okazaĵo kaj kvar jaroj pasigitaj en la malliberejo mi rigardas la vivon laŭ alia maniero, do mi vidas ĝin tia, kia ĝi estas kaj devus esti. Mi komprenas la esencon de la aferoj, la kernon de ĉio. Mi komprenas nun, ke ĉiu, eĉ plej malgranda, bagatelo en la vivo gravas el si mem. Kaj mi dediĉas al ĝi mian eksterordinaran atenton.

– Ah jes – mi respondis. – Ĝuste pri tio mi ne dubis.

Uzante mallongan paŭzon dum la interparolo kaj promesante al Bardho, ke ni ankoraŭ havos okazon por daŭrigi tiun interesan disputon, mi adiaŭis lin kore kaj pretigis min al foriro. Tamen li parolis kun la mieno de filozofo:

– Nu, vidu! Ke vi foriras en tiu ĉi momento – nek pli frue, nek pli malfrue – ankaŭ tio havas signifon por mi, ĉar formas la certan sekvon. Kaj ne liberigas min de la preciza konsidero, por kompreni pli bone kaŭzon kaj efikon de tia agado, do ...


– Ĝuste! – mi konsentis kaj foriris.

Mi lasis Bardhon sola, ke jam pli kviete kaj plene li analizu tiun novan fakton.



elalbanigis **Bardhyl Selimi** (Albanio)

## Fratoj Grimm



*aŭtoroj, Fratoj Grimm*

### Pajlotigo, karbo kaj fabo

En vilaĝo vivis malriĉa maljunulino, kiu miksis la ingrediencojn por fabomanĝo kaj volis kuir ilin. Tial ŝi ekbruligis fajron en sia forno, kaj por ke la fajro brulu pli rapide, ŝi ekbruligis ĝin helpe de manpleno da pajlo. Kiam ŝi ŝutis la fabojn en la poton, unu el ili – sen frapi atenton – falis planken apud la pajlotigon; baldaŭ poste saltis ankaŭ ardanta

karbo el la forno, al ambaŭ malsupren.

Jen la pajlotigo ekparolis: „Karaj amikoj, de kie vi venas?“

La karbo respondis: „Bonŝance mi saltis el la fajro, kaj se mi ne estus eskapinta kvazaŭ porforte, la morto estus certa al mi, mi estus nun cindro.“

La fabo diris: „Ankaŭ mi forglitis kun sana haŭto, sed la maljunulino estus ŝutinta min en la poton, mi estus kuirita sen kompatato en kaĉon, tiel, kiel miaj kamaradoj.“

„Sed, ĉu mi estus havinta pli bonan sorton?“ diris la pajlotigo. „Ĉiujn miajn fratojn la maljunulino transformis en fajron kaj fumon, sesdek pajlojn ŝi kaptis per unu fojo kaj mortigis ilin. Bonŝance mi glitis inter ŝiaj fingroj malsupren.“

„Sed kion ni faru nun?“ demandis la karbo.

„Mi opinias“, respondis la fabo, „ĉar ni tiel bonŝance eskapis la morton, ni agu komune kiel bonaj kamaradoj, kaj por ke ĉi tie ne okazu denove malfeliĉo al ni, ni kune elmigru kaj iru en fremdan landon.“

La propono plaĉis al la du aliaj, kaj ili kune survojiĝis. Sed baldaŭ ili atingis rojeton, kaj ĉar tie ne estis ponto aŭ ligna transirejo, ili ne sciis kiel transiĝi.

La pajlero havis taŭgan konsilon kaj diris: „Mi transkuŝigos min sur la rojo tiel, ke vi sur mi povos transiri tiel, kiel sur ponto.“

La pajlotigo do etendiĝis de unu bordo ĝis la alia, kaj la karbo, kiu havis impetan ardan naturon, paŝetis tute aŭdace sur la ĵus konstruitan ponton. Sed kiam ĝi atingis la mezon kaj aŭdis brui la akvon sub si, ĝi tamen ektimis, haltis kaj ne kuraĝis iri plu. Kaj la pajlotigo ekbrulis, disrompiĝis en du pecojn kaj falis en la rojeton. La karbo postglitis. Atinginte la akvon, ĝi siblis, kaj transmondiĝis. La fabo, kiu

ankoraŭ memgarde postrestis sur la bordo, devis ridi pri la afero, ne povis ĉesi ridi kaj ridis tiel fortege, ke ĝi diskrevis. Tiel ankaŭ ĝi estus trovinta sian finon, se ne ripozus bonŝance migranta tajloro ĉe la roĵo. Havante kompateman koron, li eltiris kudrilon kaj flikfadenon kaj kunkudris la fabon. Ĝi dankegis tre ĉarme al li, sed ĉar la tajloro uzis nigran flikfadenon, ĉiuj faboj havas de tiu tempo nigran kunkudron.

*Originalo: Strohhalm, Kohle und Bohne*

*Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam*

## Fiŝisto kaj lia edzino

Estis iam fiŝisto kaj lia edzino, kiuj loĝis kune en tielnomata pispoto proksime de la maro. La fiŝisto foriris ĉiutage kaj fiŝkaptadis.

Tiel li sidadis foje kun sia fiŝkaptilo kaj rigardadis en la klaran akvon.

Jen la hoko estis tiritaj profunde malsupren, kaj kiam li eltiris la ŝnuron, aperis granda rombofiŝo.

Jen la fiŝo diris al li: „Aŭskultu, fiŝisto, mi petas vin, lasu min vivi, mi ne estas vera rombofiŝo, mi estas ensorĉita princido. Kion tio helpus al vi, se vi mortigus min? Mi ja tamen ne bongustus al vi, metu min denove en la akvon kaj lasu fornaĝi min.“

„Nu“, diris la viro, „vi ne bezonas paroli tiom multe, parolantan rombofiŝon mi ja certe lasas fornaĝi.“

Post tio li remetis la fiŝon en la klaran akvon; ĝi iris grunden kaj postlasis longan sangostrion. Tiam la fiŝisto leviĝis kaj iris al sia edzino en la pispoton.

„Edzo“, diris la edzino, „ĉu vi kaptis hodiaŭ nenion?“

„Ne“, diris la edzo, „mi kaptis nur rombofiŝon, kiu diris, ke ĝi estas ensorĉita princido, tial mi lasis fornaĝi ĝin.“

„Ĉu vi do deziris nenion de ĝi?“ demandis la edzino.

„Ne“, diris la edzo, „ja kion mi deziru?“

„Aĥ“, diris la edzino, „tio estas ja malbona afero loĝi ĉi tie ĉiam en la pispoto, kiu stinkas kaj estas tiom naŭza. Vi estus povinta deziri malgrandan kabanon. Iru ankoraŭfoje al ĝi, voku ĝin; diru, ke ni volonte volus havi kabaneton, tion ĝi certe faros.“

„Aĥ“, diris la viro, „kial mi ankoraŭfoje iru tien?“

„He“, diris la edzino, „vi ja kaptis kaj poste liberigis ĝin. Ĝi certe faros tion. Iru tuj tien.“

La edzo ankoraŭ ne tute konsentis, sed li ankaŭ ne volis kontraŭstari al la edzino. Kaj tial li iris al la maro.

Kiam li atingis ĝin, la maro estis tute verda kaj flava kaj tute ne tiel klara kiel kutime. Tial li haltis tie kaj diris:

„Mantje, Mantje, Timpe Te,  
rombfîş', rombfîş' mara, he!  
Ilzebil, mia edzin',  
kvereleme sendis min.“

Jen la fiŝo alnaĝis kaj diris: „Nu, kion ŝi do celas?“

„Aĥ“, diris la viro, „mi ja kaptis vin, kaj mia edzino diris, ke mi devus deziri ion. Ŝi ne plu volas loĝi en la pispoto, ŝi volonte havus kabanon.“

„Iru hejmen“, diris la fiŝo, „ŝi jam havas ĝin.“

Jen la viro iris hejmen kaj la edzino ne plu sidis en la pispoto, sed staris tie malgranda kabaneto kaj ŝi sidis ekstere sur benko antaŭ la pordo. Jen ŝi manprenis lin kaj diris: „Do, envenu, rigardu, nun estas ĉi tie ja multe pli komforte.“

Ili eniris, kaj en la dometo estis malgranda trairejo kaj malgranda pura loĝoĉambro kaj ĉambreto kun du litoj por ambaŭ, kaj kuirejo kaj provizejo, ĉio plej bone ekipita per ilaroj kaj ĝisbrile purigita stan- kaj latunvazaro, ĉio, kio apartenas tien. Malantaŭe estis eta korto kun kokinoj kaj anasoj kaj malgranda ĝardeno kun legomo kaj fruktoj.

„Rigardu“, diris la edzino, „ĉu tio estas ĉarma?“

„Jes“, diris la edzo, „tiel ĝi restu, ni vivu nun tute plezure.“

„Tion ni pripensu“, diris la edzino. Kaj poste ili manĝis ion kaj enlitiĝis.

Tiel estis dum ok aŭ dek kvar tagoj. Tiam diris la edzino: „Aŭskultu, edzo, la dometo estas ja vere tro malvasta, kaj la korto kaj la ĝardeno estas tro malgrandaj; la rombofiŝo povus donaci al ni ankaŭ pli grandan domon. Mi volas vivi en granda kastelo el ŝtono. Iru al la rombofiŝo, ĝi donacu kastelon al ni.“

„Aĥ“, edzino“, diris la viro, „la dometo estas ja sufiĉe bona, kial loĝi en kastelo?!“

„Ho, ne!“ diris la edzino, „iru denove tien, la fiŝo ĉiam povas fari tion.“

„Ne, edzino“, diris la edzo, „la rombofiŝo ĵus donis al ni la dometon, mi ne jam denove iru tien, la rombofiŝo povus ĉagreniĝi pri tio.“

„Iru do“, diris la edzino, „ĝi povas fari tion tute bone kaj volonte faros; iru do al ĝi.“

La koro de la edzo fariĝis tre peza, kaj li ne volis fari tion; li diris al si mem: „Tio ne estas laŭorda.“

Sed li ekiris tamen.

Kiam li atingis la maron, la akvo estis tute violkolora kaj malhele blua kaj griza kaj tute ne plu verda kaj flava, sed ĝi estis ankoraŭ trankvila. Li haltis tie kaj diris starante:

„Mantje, Mantje, Timpe Te,  
rombfîş', rombfîş' mara, he!  
Ilzebil, mia edzin',

kvereleme sendis min.“

„Nu, kion ŝi do deziras?“ demandis la fiŝo.

„Aĥ“, diris la edzo iom afliktite, „ŝi volas loĝi en granda kastelo el ŝtono.“

„Iru hejmen, ŝi staras antaŭ la pordego“, diris la rombofiŝo.

La fiŝkaptisto ekiris kaj intencis iri hejmen, kaj kiam li revenis, staris tie granda ŝtona palaco. Kaj lia edzino ekstere troviĝis supre sur la ŝtuparo, kaj volis eniri; jen ŝi manprenis lin kaj diris „Envenu do!“

Kaj tial li eniris kun ŝi, kaj en la kastelo estis granda koridoro kun marmora planko, kaj tie estis tiom da servistoj, kiuj vaste malfermtiris la pordojn, kaj la muroj ĉiuj estis ornamitaj per belaj tapetoj, kaj en la ĉambroj troviĝis multaj oraj seĝoj kaj tabloj. Kristalaj lustroj pendis de la plafono, kaj ĉiuj ĉambroj estis kovritaj per tapiŝoj. Manĝo kaj tre bona vino staris sur la tabloj, kiuj preskaŭ rompiĝis pro ili. Kaj malantaŭ la kastelo estis granda kortego kun ĉeval- kaj bovostaloj, kun kaleŝoj, kaj ĉio tre alte kvalita. Kaj estis tie ankaŭ granda belega parko kun la plej belaj floroj kaj delikataj fruktarboj kaj plezurparko longa certe duonon de mejlo, en kiu troviĝis cervoj, kapreoloj, leporoj kaj ĉio, kion ajn oni povas imagi.

„Nu“, diris la edzino, „kaj belajoj, ĉu?“

„Aĥ, jes“, diris la edzo, „tiel ĝi restu, nun ni ankaŭ vivu en la bela kastelo kaj estu kontentaj.“

„Tion ni pripensu“, diris la edzino, „unue pasu la nokto.“ Tiam ili enlitiĝis.

Je la sekva mateno la edzino vekigis unue, ĵus mateniĝis kaj ŝi vidis ekde sia lito la belegan pejzaĝon etendiĝantan antaŭ ŝi. La edzo ankoraŭ etendis siajn membrojn; jen ŝi puŝis lin perkubute flanken kaj diris: „Edzo, ellitiĝu kaj rigardu foje el la fenestro! Rigardu, ĉu ni fariĝu gereĝoj pri tiu tuta regiono? Iru al la fiŝo, ni volas fariĝi gereĝoj!“

„Aĥ, edzino“, diris la fiŝkaptisto. „Kial ni fariĝu gereĝoj?!“

„Iru al la rombofiŝo, ni volas esti gereĝoj!“

„Mi ne volas esti reĝo!“

„He“, diris la edzino, „se vi ne volas esti reĝo, estu mi la reĝo! Iru al la rombofiŝo, mi volas esti reĝino.“

„Aĥ, edzino“, diris la edzo, „kial vi volas fariĝi reĝino, tion mi ne volas sciigi al ĝi.“

„Kial ne?“ diris la edzino, „Iru tuj al ĝi, mi devos fariĝi reĝino.“

Jen la viro foriris kaj estis tute konsternita, ke la edzino volis fariĝi reĝino.

„Tio ne estas en ordo, tio ne estas en ordo“, pensis la fiŝkaptisto. Li ne volis iri al la bordo, sed tamen li iris tien. Kaj kiam li atingis la maron, ĝi estis tute nigre griza, kaj la akvo ŝveliĝis kaj eĉ stinkis tute putra. Li haltis tie kaj diris:

„Mantje, Mantje, Timpe Te,

rombfîs', rombfîs' mara, he!

Ilzebil, mia edzin',

kvereleme sendis min.“

„Nu, kion ŝi do deziras?“ demandis la rombofiŝo.

„Aĥ“, diris la edzo, „ŝi volas fariĝi reĝino.“

„Iru hejmen, ŝi jam estas reĝino“, diris la rombofiŝo. La viro iris hejmen, kaj kiam li atingis la palacon, la kastelo fariĝis multe pli granda, kun granda turo kaj pompa ornamo kaj gardistoj staris antaŭ la pordego, kaj estis tie tiom da soldatoj, timbaloj kaj trumpetoj. Kaj kiam li iris en la palacon, estis tie multe da pura marmoro, oraj ornamoj kaj veluraj tapetoj kaj grandaj oraj kvastoj. Jen malfermiĝis la pordoj de la festohalo, kie troviĝis la tuta korteganaro, kaj lia edzino sidis sur alta trono el oro kaj diamantoj kaj surhavis grandan oran kronon kaj sceptron el pura oro kaj brilantoj, je ambaŭ ŝiaj flankoj staris ses junulinoj en vico, krom la plej granda en ĉiu vico ĉiu estis laŭvice kapon pli malgranda ol la junulino apude. Li haltis antaŭ la edzino kaj diris: „Aĥ, ĉu vi nun estas reĝino?“

„Jes“, diris la edzino, „nun mi estas reĝino.“

Li staris tie kaj rigardis ŝin dum kelke da tempo. Poste li diris: „Aĥ, edzino, kiel agrable tio estas, ke vi nun estas reĝino. Sed de nun ni ne deziru ion plian.“

„Ne, edzo“, diris la edzino kaj fariĝis tute maltrankvila, „mi enuas dum la tuta tempo, mi ne plu povas elteni tion. Iru al la rombofiŝo, reĝino mi estas, nun mi devos fariĝi ankaŭ imperiestrino.“

„Aĥ, edzino“, diris la edzo, „kial vi volas fariĝi imperiestrino?“

„Edzo“, ŝi diris: „Iru al la rombofiŝo, mi volas fariĝi imperiestrino.“

„Aĥ, edzino“, diris la edzo, „ĝi ne povas nomumi vin imperiestrino, mi ne volas sciigi tion al la rombofiŝo; imperiestro ekzistas nur unufoje en la regno. Imperiestrinon la rombofiŝo ne povas fari el vi. Tion ĝi tute ne povas.“

„Kio?“ diris la edzino. „Mi estas reĝino kaj vi estas ja mia edzo, iru tuj tien! Iru tuj. Se ĝi povis nomumi min reĝino, ĝi ankaŭ povos nomumi min imperiestrino. Mi volas nun fariĝi imperiestrino. Iru tuj!“

Sekve li devis ekiri. Sed kiam la viro survojis, li fariĝis tute timema, kaj kiam li iradis, li pensis, ke tio finiĝos tute malbone. Imperiestrino, tio estas tro impertinenta, tio fine tedos la rombofiŝon.

Kiam li atingis la maron, ĝi estis ankoraŭ tute nigra kaj kaĉece fluanta kaj komencis boli tiel, ke ĵetiĝis unu veziko post la alia al la mara surfaco. Ventopuŝoj movigis la ondojn tiel, ke ili kirligis, kaj la viro eksentis hororon. Li haltis kaj diris:

„Mantje, Mantje, Timpe Te,

rombfîs', rombfîs' mara, he!

Ilzebil, mia edzin',

kvereleme sendis min.“



„Nu, kion ŝi do deziras?“ demandis la rombofiŝo.

„Aĥ, rombofiŝo“, li diris, „mia edzino volas fariĝi imperiestrino.“

„Iru hejmen“, diris la fiŝo, „ŝi jam estas imperiestrino.“

Jen la fiŝkaptisto reiris, kaj kiam li venis hejmen, la tuta kastelo estis plena de polurita marmoro kaj alabastraj figuroj kaj oraj ornamoj. Antaŭ la

pordego marŝis soldatoj, ili blovis trumpetojn kaj batis timbalojn kaj tamburojn. Kaj en la kastelo svarmis baronoj kaj grafoj kaj dukoj tiel, kvazaŭ ili estus servistoj. Jen oni malfermis al li la pordojn el pura oro. Kaj kiam li eniris, lia edzino sidis sur trono el unu ora peco, kiu estis kvazaŭ du mejlojn alta kaj ŝi surhavis grandan oran kronon, kiu altis tri ulnojn kaj estis garnita per juveloj kaj karbunkoloj. Per unu mano ŝi tenis la sceptron kaj per la alia la regnestran globon, kaj je ambaŭ flankoj ĉe ŝi staris la honorgardistoj en du vicoj. La plej granda giganto en ĉiu vico estis du mejlon alta kaj la aliaj pli kaj pli malgrandaj. La plej malgranda nano en ĉiu vico estis tiel granda kiel unu el miaj plej malgrandaj fingroj.

Antaŭ ŝi staris tre multaj princoj kaj dukoj. Jen la edzo paŝis inter ilin, haltis kaj diris: „Edzino, ĉu vi nun estas imperiestrino?“

„Jes“, ŝi diris, „mi estas nun imperiestrino.“

Li proksimiĝis al ŝi kaj observis ŝin detale, kaj kiam li faris tion dum kelka tempo, li diris: „Aĥ, edzino, kiel agrabla tio estas, ke vi estas nun imperiestrino!“

„Edzo“, ŝi diris, „kial vi staras tie? Mi estas nun imperiestrino, sed nun mi ankaŭ volas fariĝi papino; iru al la rombofiŝo.“

„Aĥ, edzino“, diris la edzo, „ja kion vi ne volas? Papino vi ne povos fariĝi. La papo ekzistas nur unufoje en la kristanaro. Tiun li ja ne povos nomumi.“

„Edzo“, ŝi diris, „mi volas fariĝi papino, iru tuj al li, ankoraŭ hodiaŭ mi devos fariĝi papino.“

„Ne, edzino“, diris la edzo, „tion mi ne volas sciigi al ĝi, tio finiĝos malbone, tio estas tro kruda, papinon la rombofiŝo ne povos fari el vi.“

„Edzo, kia babilaĉo!“ diris la edzino, „se ĝi povis nomumi imperiestrino, ĝi ankaŭ povas nomumi papinon. Iru tuj al ĝi, mi estas imperiestrino, kaj vi estas ja mia edzo. Ek do, tuj iru al ĝi!“

Jen li ekhavis malbonan timeman antaŭsenton kaj ekiris, sed li sentis sin tute mizera, li tremis kaj skuigis kaj liaj genuoj kaj suroj baraktadis. Ventego blovegis kaj nuboj flugis tra la lando; malheligante tristiĝis la ĉielo longan tempon antaŭ la vespero. La folioj estis skuataj de la arboj kaj la akvo moviĝis kaj muĝis kvazaŭ ĝi bolus, ĝi

plaŭde ĵetiĝis sur la bordon, kaj en la foro li vidis sur la ondoj dancantajn, saltantajn ŝipojn, de kiuj oni pafis help-signalojn. La ĉielo estis en la mezo tamen ankoraŭ iomete blua, sed je la flankoj leviĝis morna ruĝo kiel antaŭŝtorma fulmotondro. La viro timiĝite haltis senkuraĝe kaj diris:

„Mantje, Mantje, Timpe Te,  
rombfîș', rombfîș' mara, he!  
Ilzebil, mia edzin',

kvereleme sendis min.“

„Nu, kion ŝi deziras?“ demandis la fiŝo.

„Aĥ“, diris la viro, „ŝi volas fariĝi papino.“

„Iru hejmen, ŝi jam estas papino.“

La fiŝkaptisto foriris, kaj kiam li revenis hejmen, estis tie granda preĝejo ĉirkaŭata de multaj palacoj. Tie li premiĝis inter la popolo antaŭen. Interne ĉio estis lumigata per miloj da kandelaj lumoj, kaj lia edzino estis vualita tute en oro kaj sidis sur ankoraŭ multe pli granda trono kaj surhavis tri grandajn orajn kronojn kaj ĉirkaŭ ŝi estis tiom da ekleziuloj, kaj je ambaŭ flankoj de ŝi staris po unu lumvico, la plej granda estis tiom larĝa kaj alta kiel la plej granda turo, kaj la plej malgranda estis tiel eta kiel la plej eta kuireja lumo; kaj ĉiuj imperiestroj kaj reĝoj antaŭ ŝi surgenuis kaj kisis ŝian etenditan pantoflon.

„Edzino“, demandis la fiŝkaptisto kaj rigardis ŝin observeme, „ĉu vi nun estas papino?“

„Jes“, ŝi diris, „mi estas papino.“

Li proksimiĝis ankoraŭ iom pli, haltis kaj rigardis ŝin observeme, kaj tiumomente li havis la senton, kvazaŭ li vidus ŝin en la plej hela suno. Kaj li rigardis ŝin dum kelka tempo kaj diris: „Aĥ, edzino“, kiel agrabla tio estas, ke vi estas papino.“

Sed ŝi sidis tute rigida kiel arbo kaj ne moviĝis kaj ne etendiĝis.

Jen li diris: „Edzino, nun estu kontenta, ke vi estas papino. Nun vi fine ne plu povos fariĝi pli.“

„Tion mi pripensu“, diris la edzino. Post tio ili enlitiĝis, sed ŝi ne estis kontenta, kaj la avido ne lasis dormi ŝin. Ŝi cerbumis, kion ŝi ankoraŭ povus fariĝi.

La fiŝkaptisto dormis bone kaj profunde, li multe iradis en tiu tago; sed la edzino tute ne povis dormi kaj ĵetadis sin dum la tuta nokto alterne de unu flanko al la alia kaj senĉese ŝi cerbumis, kion ŝi ankoraŭ povus fariĝi, kaj tamen ŝi ne trovis ion. Intertempe la suno komencis leviĝi, kaj kiam ŝi vidis la matenruĝon, ŝi rektiĝis en la lito kaj rigardis tien, kaj poste vidis el la fenestro la sunon, kiu grimpis supren, kaj ŝi pensis: „Ha“, „certe ankaŭ mi povus ordoni la leviĝojn kaj de suno kaj luno.“

„Edzo“, ŝi diris, puŝante lin per kubuto je la ripoj. „Vekiĝu, iru al la rombofiŝo, mi volas fariĝi tiel, kiel la kara Dio.“

La edzo ankoraŭ parte endormis, sed li ektimis tiom, ke li falis el la lito. Li opiniis, ke li misaŭdis kaj frotadis siajn okulojn. Kaj li diris: „Aĥ, edzino, kion vi diras?“

„Edzo“, ŝi diris: „Ke mi ne povas ordoni leviĝi la sunon kaj la lunon kaj devas rigardi tion sen potenco, ke suno kaj luno leviĝas, tion mi ne povas elteni, kaj mi ne

plu havos trankvilan horon, ĝis kiam mi povos ordoni mem la leviĝon de ambaŭ.“

Dum tio ŝi rigardis lin tielasure, ke lia haŭto horore hirtiĝis.

„Ekiro tuj, mi volas fariĝi tiel, kiel Dio.“

„Ah, edzino“, diris la edzo kaj falis antaŭ ŝi sur la genuojn. Tion la rombofiŝo ne kapablas fari, imperiestron kaj papon ĝi povis nomumi; mi petegas vin, rekonsciiĝu kaj restu papino.“

Jen ŝi malice ekfuriozis, la hararo flugadis tiel sovaĝe ĉirkaŭ ŝia kapo, ke ŝi disŝiris sian korsajon, ŝi piedbatis la edzon kaj kriis: „Mi ne eltenas tion, mi ne eltenas tion plu. Iru do al ĝi!“

Jen li surtis la pantalonon kaj forkuris kvazaŭ freneziĝinto.

Sed ekstere blovegis ŝtormo kaj muĝis tiel, ke li apenaŭ povis teni sin sur la piedoj. La domojn kaj la arbojn la ŝtormo renversis, la montoj tremis kaj la rokopecoj ruliĝis en la maron, la ĉielo estis nigra kiel peĉo, fulmis kaj tondris, kaj la maro moviĝis kun nigraj ondegoj tiom alte, kiom preĝejturoj kaj montoj kaj la ondegoj havis ĉiuj blankan ŝaŭmkronon. Li ekkriis kaj ne povis aŭdi siajn proprajn vortojn:

„Mantje, Mantje, Timpe Te,

rombfiš', rombfiš' mara, he!

Ilzebil, mia edzin',

kvereleme sendis min.“

„Nu, kion ŝi deziras?“ demandis la rombofiŝo.

„Ah“, li diris, „ŝi volas fariĝi tiel, kiel la kara Dio.“

„Iru hemejn, ŝi jam sidas denove en la pispoto.“

Tie ili ankoraŭ sidas ambaŭ eĉ ĝis hodiaŭ.

*Originalo: Von dem Fischer und syner Frau*

*Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam*



*tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)*

*lingve kontrolis Vladimir Türk*

## Henri Barbusse (1873-1935)



*Tiu kruela, sed vee tiom vera, novelo estas de Henri Barbusse, plej konata pro lia komunisteco, kaj lia libro «Le Feu» (Sub pafado) pri 14-18-a milito ; sed ne justas ĉar liaj plej valoraj kaj inde senmortaj verkoj estas lia **dua** primilita romano «Clart é» (Eklumo) kaj lia antaŭmilita novelaro, «Nous autres» (Ni) kies parto estas tiu-ĉi teksto.*

aŭtoro, Henri Barbusse

### Patrino

La tagon postan je la entombigo, ŝi revenis en la malsanulejon, por preni la vestaĵojn de la infano Adrian. Ĉe l'vesperiĝo ŝi puŝmalfermis la dekstran kradon, kiu surhavas skribitan tabulon, kaj laŭiris la aleon, kiun estis laŭirinta kontraŭdirekte la ĉerkoveturilo ŝargita per l'blanka ĉerko, tiom malgranda kiom puposkatolo.

Ŝi eniris la vestiblon, bone konatan de ŝi. S-ino Izabela, en blanka antaŭtuko, trapasis, kaj trapasante ridetis al ŝi ĝenmiene. Ŝi aldirektis al la flegistino mallongan saluton, obtuzan, por ne krii. Tiu peno igis ŝin preskaŭ falŝanceliĝi ĉe eniro de l'koridoro. Ŝi iris en ĝin, sidiĝis en la ĉambron, leviĝis kiam venis ŝia vico. Fine tra ĝiceto ŝi ricevis la pakon. La viro, kiu ĝin enmanigis al ŝi, ne aŭdacis levi al ŝi la okulojn, kaj ŝi ne pensis pri rigardo al li: ŝiaokule plu estis en la mondo nur tiuj malmultaj vestaĵoj. Malmulte por teni: paketo granda kiel mano, volvita en papero, kaj cetere la helblua robo de la bebo, pura kaj gladita. Si fuĝe foriris.

Ĵus alveninta sur la sojlo de la ĉefa konstruaĵo, ŝi ne povis ne halti, malfaldi la robon, ĝin rigardadi.

Inter la fingropintoj la robo aspektis ege, strange hela, ĉar ĉe vesperlumo bluo pli blankas ol blanko. La virino blindetiĝis pro la apero de l'vestaĵo, la ununura aĵo viva, kiu plurestos de l'infano, nun orfo en Paradizo. Ŝi sentis teruregan singulton leviĝi al ŝi en la gorĝo.

Homoj plenigis la elir-aleon. Por ilin eviti, dum tiu minuto da suferego, ŝi sin turnis, haste malproksimiĝis al la ĝardeno, preteriris la brikan domegon, la

pavilonojn, diversajn konstruaĵojn. Finfine aero kvietigis ŝin, abortigis la novan ĉagrenkrizon.

Ŝi ĉesis paŝi. Kie ŝi estis? En kiu distrikto de tiu malsanulejo, vastega kiel tombejo? Ŝi ne povis determini, kredis returniri, vojiris pavimitajn aleojn, inter kraditaj fenestroj, kaj atingis trans korteto, konstruaĵon izolitan tian, kia insulo.

—Kio estas tio?

Antaŭ ŝi, ĉepiede de l'muro, amasiĝis strangaj formoj kuŝantaj. Ŝi proksimiĝis: kadavroj.

Tio estis la restaĵoj de la bestoj oferitaj en la vivsekoĉambro. Ĉiutage oni ĵetis en tiun angulon tiujn humilajn bestorestojn uzitajn, traserĉositajn kaj malplenigitajn, stumpigitajn dispremitajn, laŭ la diverso de la lecionoj kaj esploroj, funebrece aliigitaj, ĉiu el ili pro la apartaj necesigoj de ĉiu eksperimento.

Ŝi tremetis, abrupte flankenpaŝis por ree fuĝi, ŝanceladis al la krado.

Sed, jen, ĝuste ĉe angulo de la kadavrejo, lasite dise de l' funebraĉa amasiĝaĵo, ŝi ekvidis malgrandegan kadavron, streĉiĝinta kaj terurege sanga.

Tio estis kateto, kiu, de ne pli ol kelkaj semajnoj, estis naskiĝinta. Metita surdorse, ĝi ŝajnis tirlongigita, maldikigita; ĝiaj malantaŭaj kruroj rektaj tiel, kiel du bastonetoj kunigitaj plilongige de ĝia korpo, ĝiaj antaŭaj kruroj refalditaj sur peceto da brusto. La kapo, buntita de malfermaj vundoj, el kiuj unu estis la makzelo duonmalfermita, ne pli dikis ol infanpugneto.

La virino ekhaltis. Ŝi estis sentinta skuon koran, kaj almetis manon al tiu vundo. Ŝi antaŭeniĝis, pli kliniĝis, plibone rigardis. Oni povis distingi la spuron far la spiralaj stringadoj, kiuj estis kvaronumintaj, sur la martiriĝtablo, la delikatan organismon. La faŭko, malkunligita, vidigis fajnajn dentojn viciĝantaj kiel pinglopintoj; kaj ankaŭ la ventro senhaŭtigita, nigra kaj glima, kuŝis malferma eksterenvidigante maldikegajn intestojn kiel fadenvolvajojn.

Ŝi estis konsideranta, kun tiom da krueleco kaj tiom da diligenteco, buĉitan etegan kreaĵon. Ŝi diris: « ha! » kaj skuiĝis de l' kapo ĝis la piedoj, kun okuloj vualitaj, sensentigita de tro da obtuzaj pensoj.

Ŝi konis la aferojn de l'malsanulejo, kiun ŝi estis vizitinta ekde la tago, kiam tien oni portis kun singardo, sur piedpintoj, la junan Adrian-on, kaŝitan en kovrilo. Ŝi aŭdis interbabili unujn kaj aliajn. Ŝi sciis, ke se la kuracistoj ekkaptis tiun etan katidon, ja freŝan, ja silkecan, plenfeliĉan per ludoj, mem ravetan kiel ludileton, kaj ke se ili disŝiris ĝin, tio estis por bono. La turmentado, kiu estis detruinta la besteton, utilis konjekteble, por pruvi la medicinon, por trovi medikamentojn, kuracojn – ĉar estas, onidire, homoj, kiuj havas la bonŝancon havi seriozajn malsanojn, kiujn oni kuracas! – sed spite tiujn informojn ŝi ŝvingis la kapon, tremis pli kaj pli, snufis, dorsapogis sin al krado, kaj tutmalvenkita eksingultis.

Post kiam ŝi estis plorinta, post kiam ŝi estis suferinta eĉ iom pli ol antaŭe, ŝi pli kliniĝis al la malgranda malvarmega estaĵo, soifanta ekscii kial ŝi tiom bedaŭris, ke oni ĝin mortigis.

Ŝi ja sentis, ke tio estis kaŭzita de ĝia eteco.

Antaŭ la brikoj de l' muro, la eta korpo sterniĝis, simile al la kuŝantaj homoj, kaj ĝi eĉ bildigis la figuron timege kvietan de la mortintaj beboj. Vidante preskaŭ krucigitaj sur ĝia apenaŭ perceptebla brusto ĝiajn krurojn ornamitaj per delikataj fadenecaj ungegoj, la unue vojkrucita virino pensus: «kiom malgrandaj brakoj! »

Ha! malgraŭ la kialoj, kiujn dirus la sciencistoj, se tiujn oni petis de ili (Kiel Dio dirus siajn, se, fine, oni scipovus lin pridemandi pri la malfeliĉo), kiel oni ja povis dispecigi, trapiki, dispremi tiom malgrandan aĵeton? Vestitaj en siaj blankaj kiteloj ili estis ligintaj sur la tablo la besteton, kies animo estis streĉigita pro doloro kaj droninta en emociego, havante kiel nuran ŝancon pri savo la facilecon per kiu probable ĝi ĉesis spiri! Kaj ĉu eble, ke ekzistis iu eksterordinara, ke li donis al ĝi la unuan tranĉon?! Kaj dum estas monstraĵoj, kiuj krueladas je la luliloj, povis ke ekzistis pluraj kuracistoj, kiuj torturis ĝin ĝis la maksimumo, tiun etegan vivulon, tiun estaĵon, senhelpa ĝis tio, ke ĝi ne kapablis forte krii! . . .

Jes, tiu kondamnita estis ja tro malgranda; tial estis tro malbone cikatriĝinta koro remalfermiĝanta antaŭ ĝi — kaj precipe ĝi estis tro novnaskita. Apenaŭ ĝi estis turmentata, kiam ekkomencis ĝi ludscipovi, hejmeciĝi je la vivo, kapriolante kaj dancante por tiun soleni. En ĝi estis la pureco, la naiveco de anĝelo . . .de anĝelo . . .

Abrupte ŝi kriis, skuis sian frunton, vekite el sonĝo: tamen, besto, infano, kiom da malegaleco!

Sed ĉar la vespero estis venanta grizigi ĉion per sia neviŝebla ombro, mildigi la liniojn formdisigantajn, forigi la dekoraciojn de la mondo, malpli ŝi atentis pri tiu malsameco. Spite ŝi preteratentis ĝin, en la obtuza revado per kiu ŝi fiksstaris, streĉe malfermante la okulojn kaj prove silabante aferojn, aferojn . . .

Ŝi ekkomprenadis, ege lante. Nokto pli kaj pli densiĝis, mallumigante la funebrantan patrinon, tro malriĉan por esti nigrevestita dumtage. Ŝi ne plu kuraĝis forlasi per la okuloj la veindan mortrestaĵon, kiu, lokita tutapud ŝi, tamen estis en la nenieco kaj eterneco.

— Ha ! ŝi murmuris, ĝi estas mortinta!

Ŝi diris tion tiel, kiel tio estus rivelito: «ha! ĝi estas mortinta! » kaj efektive tio estis tia.

La besto, ĵetita sur la kadavrejo, estis nur nenio pli ol svaga makulo sen limoj ... Nenio el la ĉarma kreitaĵo ritma, riĉa je delikataj detaloj. Nenio alia ol aperaĵo profunda, tragika, kaj tiel nigra de sango kaj senforma kiel la koro kiun oni havas.

Kaj ĝuste, tio estis la rivelaĵo: ĝia senmoveco estis multe pli grava, ol iam estis ĝia gracieco, malpurigita de la homoj; la silento, kiu eliĝis de tiu neelĉerpebla fonto kiu estis ĝia buŝo frakasita kaj neniigita de la sciencistoj, estis ege pli grava ol la malfortaj vokoj, kiujn ĝi estis dissemataj dum sia vivo. Ĝi inte tiom malproksima de ni, tiom frenezeta, tiom malmulte homa, nun estis superhoma, kiel iu ajn alia mortinto ... Estas, ĉu ne vere, mil kaj mil da ekzistadoj vantaj kaj nuancaj, kompleksaj kaj diversaj, sed unu morto al ĉiuj?

Tial la malgrandaj estaĵoj estas similaj laŭmezure de sia suferado, laŭmezure ke ili kontraŭmetas al la turmentistoj aŭ al la malsano sian malfortan dian kontraŭstaron, kaj precipe laŭmezure ke ili agonias; tiel, ke **ĉiuj malgrandaj mortintoj iĝas parencoj**.

Tiel, kiam oni estas patrino tre funebra, kiel ŝi, oni emas malkovri, ie kaj tie, iel, strangajn kompatindajn nekonatajn infanojn, iajn malgrandajn mortintojn, kiujn oni adoptas.

Tio pruvitis, tial ke ŝi iom agnoskis tiun ĉi, kaj tial ke, antaŭ ol disiĝi el ĝi, ŝi treme superlevis la bluan robon – la aĵon en mondo, kiu estis plej ŝia – kaj metis ĝin sur la mizeran kadavron, kiun la robo kovris ĝuste laŭ mezuro tiel, kiel ĝi estis farita tiucele.

*\*Henri BARBUSSE – «Ni» - novelaro – 1914*

*(Henri Barbusse estis favoranto de Esperanto, Li iĝis fama ĉefe pro la romanoj, kiujn li verkis pri la mondmilito, de 1914-1918, li poste iĝis komunisto)*



*elfrancigis R. Platteau (Francio)*

# Anonima

## La kordono de la profesoro

Profesoro havis kutimon: ĉe diplomitiĝo de siaj studentoj: li donacis al ili purpuran kordonon, sur kiu skribiĝis orkoloraj vortoj:

“Ĉirkaŭaj homoj alportas al mi grandegan diferencon.”

Profitante de ĉi tiu okazo, li diris al ĉiu studento ties meritojn kaj eksplikis, kial tiu fariĝis malsama pro la kurso, kiun li donis.

Iun tagon li volis apliki ĉi tiun metodon al la komunumo kun postulo al liaj studentoj, ke ili transdonacu la kordonojn al tiuj, kiujn ili konis kaj kiuj povis alporti al ili ŝanĝiĝon.

Li donis al ili po 3 kordonojn kaj diris al ili:

“Donu purpuran kordonon al tiu, kiun vi elektis, kaj sciigu al li, kial li alportis al vi ŝanĝon. Poste donu al li du aliajn kordonojn kaj postulu, ke li agu laŭ via sama maniero... Kaj post tio prezentu raporton al mi.”

Unu el la studentoj donis kordonon al sia mastro, ĉe kiu li labori partatempe dum sia studado. Kvankam la mastro estis flamiĝema, la studento aprezis lin.

“Mi tre admiras ĉion, kion vi faris. Al mi vi estas vere genia kaj justema. Ĉu vi povas permesi, ke mi alligu ĉi tiun purpuran kordonon al via jako kiel mian dankemon al vi?”

Tre surprizite, la mastro tamen respondis: “Nu, bone, kompreneble...”

La studento daŭrigis: “Ĉu vi do povas ankaŭ konsenti redoni aliajn du purpurajn kordonojn al iu, kiu povas kunpreni al vi ŝanĝon, kiel mi ĵus faris? Ĉi tiu estas enketo, kiun nia universitato estas faranta.”

“Konsentite.”

Vespere la mastro revenis hejmen, kun la kordono sur la jako. Salutinte sian 14-jaran filon, li diris: “Hodiaŭ mi renkontis strangan aferon. Mia dungito donacis al mi purpuran kordonon, sur kiu skribiĝas ‘Ĉirkaŭaj homoj alportas al mi grandegan diferencon’. Jen vidu. Li ankoraŭ donis al mi alian kordonon kaj petis al mi transdoni ĝin al tiu, kiu estas multe grava por mi. Kvankam mi estas tre laca hodiaŭ, mi, sur la revena vojo, pensis, ke mi transdonos ĝin al nur unu homo. Nu, mi ofte vin riproĉas pro tio, ke vi ne diligente lernas, nur volas eliri kun viaj kunuloj kaj malordigas vian ĉambron... sed ĉi-vespere mi volas diri al vi, ke vi estas grava por mi. Vi kaj via patrino alportis ŝanĝon al mia vivo, kaj mi esperas, ke vi akceptu ĉi tiun purpuran kordonon, kiu montras mian amon. Kvankam mi malmulte interparolas kun vi, vi tamen estas brila junulo.”

Tuj kiam li finis sian parolon, lia filo ekploregis, tremante tra la tuta korpo. Ĉirkaŭprenante lin per siaj brakoj, la patro diris: “Nu, nu... ĉu miaj vortoj vundas vin?”

“Ne, paĉjo... sed... mi jam decidis min mortigi morgaŭ, kion mi jam planis. Ĉar, kvankam mi faris grandajn penojn por plaĉi al vi, mi kredis, ke vi ne amas min. Nun ĉio ŝanĝiĝis...”

El tiu ĉi rakonto ni povas eltiri la jenan revelacion:

Se oni oferas sian propran amon, la tuta mondo ankaŭ ŝanĝiĝos pro la amo.

## Elektado de sintenoj je ĉiu momento

Jerry estas direktoro en restoracio en Filadelfio. Li ĉiam havas bonan humoron kaj estas plena de espero pri la vivo.

Ĉiufoje kiam li ŝanĝis sian laboron kaj moviĝis al alia restoracio, pluraj gekelneroj ankaŭ rezignis sian laboron por sekvi lin, simple ĉar ili admiris lian sintenon. Li estas moviĝema denaske. Kiam komizo troviĝis en malbona situacio, Jerry ĉiam kuraĝigis lin vidi la bonan flankon de la afero. Iutage, pro scivolemo, mi iris vidi Jerry por demandi lin: Mi ne vere komprenas, ĉar oni neeble ĉiam kaj ĉie tenas sin pozitivaj en traktado pri aferoj. Kiel vi povas sukcesi fari tion?

Kaj Jerry respondis: “Ĉiumatene kiam mi vekiĝis, mi diris al mi, ke hodiaŭ mi povis elekti bonan humoron aŭ malbonan. Mi do elektas ankoraŭ bonan humoron! Mi ĉiam elektas bonan humoron. Kiam malfeliĉo falos, mi povos elekti aŭ esti viktimo aŭ ĉerpi lecionon el tio. Kiam iu sin turnas al mi por plendi, mi povas elekti aŭ aŭskulti lin aŭ fari lin vidi la brilan flankon de la afero.”

“Sed tio ne estas ĉiam tiel facile farebla,” mi diris al li. Kaj Jerry respondis: “Vivo estas elekto. Oni elektas sian manieron de reago al situacioj. Oni povas elekti la manieron influitan de aliaj, bonan aŭ malbonan humoron, aŭ la manieron konvenan al sia vivo.

Plurajn jarojn poste mi aŭdis, ke Jerry faris la plej teruran aferon en la rondo de restoracioj: Malriglante la malantaŭan pordon, li foriris, sed li forgesis ŝlosi ĝin. Tiam tri armitaj rabistoj neatendite aperis antaŭ liaj okuloj. Li provis malfermi la ŝtelimunan monkeston por ili, sed pro tio, ke liaj manoj tremis pro nervozeco, li ne povis alĝustigi ĝian sekretan kodon. Unu entrudinto faris pafon en paniko. Feliĉe Jerry estis senprokraste sendita al hospitalo. Post dek ok horoj da urĝa savado kaj kelkaj semajnoj da zorgema flegado, li elhospitaliĝis kunportante la splinton de kuglo, kiu sukcese eltiriĝis el lia korpo.

Ses monatojn post la okazaĵo mi renkontiĝis kun li. Kaj mi demandis al li, kiel li alfrontis la situacion tiam. Li respondis: “Se mi estis en pli bona sano ol mi estas, mi fariĝus du personoj: mia ĝemelfrato kaj mi. Ĉu vi volas pririgardi la cikatron?” Mi

ne emis vidi lian vundon, sed mi demandis al li, kio fulmis lian kapon dum la momento kiam la rabistoj aperis.

Kaj Jerry diris: “La unua ideo, kiu venis al mia menso, estas, ke mi devus ŝlosi la malantaŭan pordon de la restoracio. Kiam mi estis trafita de kuglo kaj kuŝis sur la planko, mi memoris, ke mi povas ankoraŭ fari alternativon: vivo aŭ morto. Kaj mi elektis vivon.”

“Tiam vi ne timis?” Mi demandis al li. Kaj li respondis: “La sukuristoj alprenis konvenajn rimedojn, dirante senhalte al mi, ke ĉio estas en bona ordo. Sed enirinte en la operaciejon de la hospitalo, mi estis timigita de la vizaĝesprimoj de kuracistoj kaj flegistinoj. El iliaj okuloj mi povis vidi, ke mi estas mortinto, kaj mi konsciis, ke mi devas fari rapidan reagon.”

“Kion do vi faris?”

“Nu, mia amiko, grasega flegistino senĉese metis demandojn al mi, ŝi volis scii, ĉu mi estas alerga al io. Mi diris jes, kaj ili haltis por aŭskulti kion mi estis dironta. Profunde ekspirinte, mi diris al ili, ke mi estas alerga al kugloj! Post ilia kelktempa ridado, mi diris al ili, ke mi faris elekton por vivi, kaj ke pli bone ili faros operacion sur mi kiel vivanto anstataŭ mortinto. Ilia brila kuracarto savis la vivon de Jerry, kaj same efikis lia miriga sinteno. El tio mi komprenis, ke ĉiutage ni devas fari elektojn: aŭ plene ĝui la vivon aŭ laŭplaĉe malŝpari ĝin. La sola afero, kiu apartenas al ni mem kaj kiun neniu povas preni de ni, estas nia sinteno. Do kiam ni povas kulturi pozitivan sintenon, ĉio alia estas bagatelo.

Filozofoj rigardas la rakonton kiel penseron de stoikismo. Iuj aferoj ekzistas ne depende de nia volo: la progreso de sorto kaj la realo antaŭ niaj okuloj. Aliaj aferoj povas esti deciditaj de li, ekzemple: la utiligado de niaj vidpunktoj, niaj decidaj elektoj kaj nia sinteno al la mondo. Tion Jerry komprenis. Vizaĝe al objektiva realo li prenis la sintenon de akcepto, kaj klopodis adapti sian sintenon, sed ne volis ŝanĝi la realon.

Li venis al la kompreno, ke oni ĉiam povas trovi unu pli konstruivan manieron, en kiu ekzistas rifuzo kaj kontraŭdiro unuflanke kaj akcepto aliflanke. Li aldonis, ke ni povas sukcesi trovi pozitivan manieron por alfronti situacion, nur se ni pritraktas la problemon laŭ la opinio konstruiva al ni. Sed ĉi tiu ĉionspita sinteno ankaŭ havas sian limitigitecon.

Eble tio estas la sinteno rifuzi alfronti la malpuran, mizeran kaj seriozan situacion, kaj la maniero devigi sin resti en sia komforta nesto. Pli ol tio oni devus preferi la pozitivan kaj senpartian sintenon por kapklare alfronti la realaĵon, la sintenon, kiu eble estas pli reala. Akceptado de la realo estas pli grava ol pozitiva alfrontado al la realo, ĉar tio estas la malo de negativa alfrontado al la realo kaj la sorto de plejparto de ni. La akceptado de la realo devas esti senpartia kaj konforma al la faktoj. Tio

estas nek la problemo pri boneco kaj malboneco nek la problemo pri pozitiveco kaj negativeco. La fakto estas fakto. Ĉi tiuj alternativoj originas de la homa juĝo. Kaj la senpartia rigardo signifas, ke oni devas sobre trakti problemon.

Sed kiam ni alvizaĝas la gravajn situaciojn, tiu ĉi pozitiva sinteno havas grandan valoron por ni kaj aliaj. Ni povas diri, ke traktado pri problemo ne ekskluzivas la klaran kapon, kun kiu ni povas ekhavi pozitivan sintenon. Tio estas la sinteno de bonkora kaj grandanima homo, kiu sin esprimas al aliaj kaj la mondo. Ne estas ke li rifuzas vidi realon, sed en sia koro li jam decidas oferi sian plej bonan parton. Se ni ne trompas nin, estas eble vidi la pozitivan flankon de la aferon en ia senco. Do, ĉu la samo okazas, kiam ni enamiĝas al iu? Kiam ni amas iun, ni dediĉas specialan atenton al la amato, kiu montras sin la plej bela en niaj okuloj.

El tiu ĉi rakonto ni povas eltiri la jenan revelacion:

En kia ajn malfacila situacio ni troviĝas, se nur ni havas optimismen kaj pozitivan sintenon, ni povas venki ĉiujn malfacilojn kaj akiri la feliĉon propran al ni mem.



elfrancigis **Leming Lin** (Ĉinio)

# Wa Xijie

## Mi preferas ordinaran vivon

Iam franca knabo petis manon de ĉina knabino.

Tio okazis ĉe la bordo de la Okcidenta Lago, kie ruliĝis ondetoj glimaj. Tiun tagon, la suno disŝutis siajn varmajn kaj softajn radiojn sur la teron, kaj zefiro blowetis, skuante salikbranĉojn, hirtigante lian blondan hararon kaj levante la baskon de ŝia laktblanka jupo. Li fiksitis, tra siaj pupiloj hele ĉielbluaj, sian atenteman rigardon al ŝiaj okuloj.

Kun unu genuo falanta sur la tero, li leĝere sed firme tenis la blankan manon.

"Edziniĝu al mi, ĉu bone?" Lia voĉo kun iom da ekzotika tono ŝvebis en la aero. Fakte, ŝi jam enamiĝis al li, sed kun kelkaj skrupuloj.

La longaj branĉoj de salikarbo sin svingadis en la vento. Tiumomente tempo kvazaŭ senmoviĝis por eterne.

Finfine, la knabino iome kapjesis. Kiam la knabo ekstaze brakumis ŝin en sian sinon, la knabino kvazaŭ demandis, "Ĉu vi amas min dumvive?"

Mi memoras ke la respondo estis jes.

Ĉio estis tre feliĉiga. Post geedziĝo, la knabino reiris kune kun la knabo al la franca bieno, kie kreskis sur vasta terspaco orecaj sunfloroj kaj hele purpuraj lavendoj forte allogaj al ŝi. Ĉiufoje kiam vento blovis, starante sur kampeĝo nudpiede kun etenditaj brakoj, ŝi sentis atakon post atako da ondoj de orkoloro kaj purpuro en la varma sunlumo. Ŝi estis sorĉita en tia sento.

Kun rideto, la knabo fikse rigardis ŝian dorsfiguron. Li silente konstruis purblankan dometon — kiel blanka anĝelo — preĝante por ŝi.

En la domo plena je ama etoso estis ĉambro speciale preparita por la knabino — la ĉambro kiu enlasis sunlumon brili en ĝia ĉiu angulo. Ŝi ornamis la ĝisplankajn fenestrojn per purblankaj aĵuraj kovriloj, kiujn ŝi zorgeme elektis. En la mezo de la ĉambro metiĝis ronda vitra tableto kun blanka apogseĝo oblikve metita tuj apud ĝi, fronte al la senlima maro ekster la fenestro. Tia aranĝo estis pro tio, ke ŝi ŝatis ĵeti sian distran rigardon eksteren de tiu angulo kun siaj iom malfermitaj okuloj, kiam ŝi estis laca. Ĉe la muro staris malalta vico da libroŝrankoj, en kiuj estis libroj amataj de ŝi en ŝia vivo.

Memstara, ŝi ne bezonis lin vivteni ŝin. Ŝi povis verki, kaj karesemon kaj delikatan triston elspiris ŝiaj verkoj, kiuj kortuŝis legantojn. Post publikiĝo de ŝiaj verkoj en ŝia lando, ŝi neniam konsideris tion grava, kiel legantoj reagis al ili.

Ŝi nur serĉis tion, de kio ŝi povas dependi en la menso, kaj la veron kial ŝi

pluvivos.

Tio jam sufiĉis.

Ĉiun frumatenon, kiam la unuaj sunradioj el la horizonto penetris en ŝian ĉambreton, ŝi, kiu ĉiam lasis sian longan brile nigran hararon nekombita, nudpiede eniris la ĉambron speciale preparitan de li al ŝi, en larĝa laktblanka piĵama jupo kaj kun taso da densa kafo en la mano. Tie jam ŝin atendis ĉarma kaj freŝa rozo sur la vitra tablo, elsendante delikatan aromon.

Tie ŝi legis kaj verkis, atendante lian revenon. Tiun tason da densa kafo ŝi neniam trinkis, ĝuste kiel ŝi nur legis vortojn presitajn sur papero, sed obstine tajpis per portebla komputilo. Ŝi nur ŝatis la iom amaran guston de kafo. Kaj ŝi trinkis maldensan teon senescepte.

Ili jam geedziĝis tri jarojn. En lia amo, ŝi sentis sin feliĉa, sed maltrankvila. Ŝi diris al li, "Kiam ni aĝos tridek jarojn, ni naskos infanon, ĉu bone? Mi volas, ke vi havas nur min en la koro antaŭ mia aĝo de tridek jaroj." Liaj okuloj estis ankoraŭ tiel bluaj kiel la ĉielo. Li ridete brakumis ŝin en sian sinon. "Estos tre danĝere, se vi naskos infanon je la aĝo de tridek jaroj." Ŝovante sian kapon sur la bruston de la knabo, ŝi diris, "Do, ni neniam havigos al ni infanon." El ŝia ŝajne arbitra voĉo spiris iom da sennoma kaj senhelpa tristo, kiu pikis lian koron. "Bone." Karesante ŝian longan brile nigran hararon, li ankoraŭ ridete diris, "Mi nur vin amas por ĉiam." En la okuloj estis iom da malespero, ĉar ŝi ne plu estis la knabino antaŭ tri jaroj, kiu nur ĉasis ion eternan, nun ŝi jam konsciiĝis iom post iom, kia pala esprimo estas "eterneco", kiam oni parolas pri la vorto.

"Se iutage vi ne plu amos min, do donu al mi infano, ĉu bone? Mi... ne volas... esti tiel sola... kiel solulino."

## I.

Tempo povas konkeri ĉion. Finfine li perfidis ŝin kaj enamiĝis al alia virino. Li diris al la knabino, "Vere, mi petas vian pardonon." Ŝi estis tre trankvila, tiel trankvila, ke ĉio ĉi ŝajne havas nenian rilaton kun ŝi. Ŝi nur diris senemocie, "Mi volas nenion krom ĉi tiun dometon. Se vi ne permesus, mi povus pagi kontraŭ ĝi. Krome, naskigu al mi infanon."

Li foriris, lasante la gravedan knabinon kaj la dometon blankan kiel anĝelon. Nur amo jam malaperis.

Ŝi venigis siajn gepatrojn por kune loĝi. Post dek monatoj, la infano naskiĝis. Ne gravis ĉu la infano estas vira aŭ ina. Kiel kutime, kun taso da kafo, kiun ŝi neniel tuŝis, ŝi legis kaj verkis en tiu ĉambro plena je sunlumo ĉiumatene kaj, krome servis al gepatroj kaj vartis la infanon.

Laŭ ŝi, en la mondo, krom amo, estas fakte multaj specoj de sentoj, kiuj bezonas nian flegadon.

## II.

La knabo eltenis la provon de tempo. Je la aĝo de tridek jaroj, ŝi naskis la unuan infanon dum lia vivo. Li fariĝis patro, kaj ŝi patrino.

Ŝi venigis siajn gepatrojn por kune loĝi. Vivante kun la junulo, ŝi servis al siaj gepatroj kaj vartis sian infanon ĉiutage. Kompreneble, ŝi, kiel kutime, iris al la sunlumluna ĉambro por legi kaj verki.

Ŝi diris al li, "Jam sufiĉas por mi vivi tiom da jaroj. Nun mia centro estas vi, mia infano kaj miaj gepatroj."

En la subiranta sunlumo, antaŭ la senlima orita maro staris ŝia dorsfiguro firmiĝinta tagon post tago.

elĉinigis **Long Dong** (Ĉinio)



esperantigita de **Alain Roze Courbou** (Francio)

# Chen Yongquan

## Forto de Patrino Amo

Tiujare, mia malpliĝa frateto enhospitaliĝis pro vundiĝo, kaj mi prizorgis lin tie. En la sama ĉambro estis knabino, kiu vundiĝis pro trafika akcidento. Ŝi neniam rekonsciiĝis de duonsveno ekde enhospitaliĝo.

En duonsveno ŝi senĉese vokis, “Panjo! Panjo!”

Sidante ĉe ŝia lito, ŝia patro malĝojmiene rigardis ŝin baraktanta en doloro, kaj povis trovi nenian metodon por helpi ŝin. Nur aŭdiĝis lia senĉesa petado al kuracisto, “Savu mian filinon, bonvolu savi mian filinon!”

Li tute ne sciis, ke la kuracisto jam uzis ĉiajn eblajn medikamentojn. Kaj ĉe la flanko de pacientoj, kelkfoje ili bezonas sian propran memsavodon. Ĉu ŝi povas postvivi, tio dependas de ŝia soifo al plua vivo en tiu ĉi mondo.

Juna flegistino demandis la viron, “Kie estas ŝia patrino? Kial vi ne alvenigas ŝin?”

Li mallevis sian kapon kaj diris mallaŭte, “Ni jam eksedziĝis delonge, kaj mi neniel kapablis trovi ŝin.”

La flegistino kuntiris siajn brovojn kaj sidiĝis silente ĉe la knabino. Prenante la malvarman maneton de la knabino en la sia, ŝi diris tenere, “Mia kara, jen panjo estas ĉe vi.”

La viro levis sian kapon kaj ekrigardis mirigite al la flegistino. Tuj poste, kun dankemaj larmoj sur la vizaĝo, li diris, “Dankon, Dankegon al vi!”

Ĉiufoje, kiam la knabino vokis “Panjon”, la flegistino respondis al ŝi, kvankam ŝi estis preskaŭ tiel aĝa kiel la knabino kaj ankoraŭ ne edziniĝis.

La knabino firme tenis la manon de la flegistino kvazaŭ dronanto kaptus pajlon. Iom post iom ŝia spiro egalritme normaligis.

Ekde tiam, la flegistino kondukis vere kiel ŝia patrino, ĉiam restis ĉe ŝi, prenis ŝian manon en la sia, senĉese alparolis, rakontis kaj kantis tenere al ŝi...

Tio daŭris ĝis tiam, kiam la knabino rekonsciiĝis el la duonsveno.

La kuracisto diris, “Vere mirakle, ke ŝi povas rekonsciiĝi.”

La knabino diris, “Mi sentis, ke mia panjo kondukas, kondukas min ĉiam per siaj varmaj manoj kaj eltiris min el la putiga malvarma kaj malluma...”

Ĉiuj turnis sian laŭdan rigardon al la amema flegistino. Ŝi diris kun iom ruĝiĝantaj vangoj, “Mi memoras, ke mi iam legis maksimumon: Ĉion la patrino amo povas savi!”

Jes, prave. Ĉu la fragila homa vivo ne fortiĝas pro la kondukado kaj flegado de la plena patrino? La forto de patrino amo ja estas forto por nia vivo.

Kiam mi laŭdas la grandecon de la patrino amo, mi des pli admiras al la flegistino ŝian kuraĝon oferi sian patrinan amon.

*elĉinigas Miaohui (Ĉinio)*

# Xue Yusi (vivanta en Tang-dinastio)

## La Tria Ino de Banqiao-gastejo

En Tang-dinastio, okcidente de Bianzhou troviĝas hotelo de Banqiao. La mastrino, Tria Ino, kies devenon neniu scias, estis vidvino pli ol 30-jara, sen ido kaj parencoj. Kun kelkaj domoj, ŝi okupis sin per mastrumado de la hotelo, sed sufiĉe riĉa, kun multaj azenoj en la stalo, kiujn ŝi ofte vendis je malkara prezo al la veturigistoj, ĉu ofica aŭ privata, al kiuj nur se mankas forta ŝarĝbruto. Per tio ŝi akiris al si bonan famon. Tial pasaĝeroj ofte emas viziti al ŝia hotelo.

Dum Yuanhe-erao (806-820), Zhao Jihe, pasaĝero de Xuzhou, dum sia vojaĝo al la Orienta Ĉefurbo restis tie tranokti.

Ses aŭ sep gastoj venis jam pli frue kaj okupis respektive la pli oportunan liton. S-ro Zhao, la malpli frua, ricevis liton plej internan, tuj apud la muro najbare de la ĉambro de la mastrino.

La Tria Ino regalis la gastojn per tre abunde da manĝaĵoj. En malfruaj horoj ŝi prezentis vinon kaj ili kune ĝuis la drinkadon tre ĝoje. S-ro Zhao, kvankam maldrinkema, ankaŭ partoprenis en la gaja babilado. En la horo malpli frua ol la dua nokta gardoperiodo, la gastoj ebriiĝintaj ĉiuj iris al sia lito. Ankaŭ la Tria Ino revenis al sia ĉambro, fermis la pordon kaj estingis la kandelon.

Ĉiuj dormis profunde, nur s-ro Zhao neniel povis endormiĝi. Aŭskultante susuron el la najbara ĉambro de la Tria Ino, li sentis, kvazaŭ ŝi ion movis. Hazarde li subrigardis tra fendeto kaj vidis ke la Tria Ino prenis kandelon el sub kovrilo kaj ĝin lumigis.



Poste, ŝi prenis el kesto plugilon, lignajn bovon kaj pupon, kun grandeco respektive nur de ses aŭ sep coloj. Metinte ilin antaŭ la forno ŝi ŝprucigis per plenbuŝo da akvo kaj la du lignaĵoj ekmoviĝis. La ligna pupo jen plugis malgrandan terpecon antaŭ la lito, bridante la lignan bovon ir-revenen. Dume la Tria Ino prenis ree de la kesto sakon da fagopirsemoj, kion ŝi donis al la ligna pupo ke li semu. Dum palpebruma momento la semoj ekfloris, kreskis kaj maturiĝis fagopiroj, kion la ligna pupo rikoltis. Tiam la Tria Ino starigis etan muelilon. Farinte farunon, ŝi remetis la pupon, lignaĵon k.c. en la keston, kaj per la faruno ŝi faris kelkajn dabingojn.

Baldaŭ kokerikis. La gastoj ekvojaĝos. La Tria Ino ellitiĝis la unua. Ŝi lumigis la kandelojn, aranĝis manĝotablon, sur kiu ŝi metis la novbakitajn dabingojn kiel manĝaĵojn de la gastoj. Tiam ekfulmis ideo ĉe s-ro Zhao. Li subite foriris haste, sed fakte nur embuskis sin ekstere de la domo kaj subgvatis. Li vidis ke la gastoj kunsidis

ĉirkaŭ la tablo kaj manĝis la dabingojn. Apenaŭ fininte la manĝon, subite ili falis teren kun azena heno kaj dum palpebrumo ĉiuj jam transformiĝis en azenojn, kiujn la Tria Ino senescepte pelis al la stalo en la posta korto de la hotelo kaj kies riĉaĵojn ŝi alproprigis ĉiom.

Tion s-ro Zhao malsekretigis al neniuj. Post pli ol unu monato, li revenis de la Orienta Ĉefurbo. Antaŭ ol atingi la hotelon de Banqiao, li faris anticipe fagopiran dabingon, same grandan kiel tiu de la mastrino. Atinginte li ree loĝis en la hotelo. La Tria Ino varme bonvenigis lin kiel lastfoje. Tiun vesperon estis neniuj aliaj gastoj kaj la regalo estis pli abunda. En malfrua nokta horo, ŝi afable pridemandis kion la gastoj deziras. S-ro Zhao petis ke la mastrino preparu iom da matenmanĝo la sekvantan matenon antaŭ lia ekveturo. La Tria Ino respondis al la gastoj ke estu trankvila pri tio. Noktmeze, s-ro Zhao subrigardis ke ĉio okazis kiel antaŭe. Je matenkrepusko, la Tria Ino preparis manĝopladon kun manĝaĵoj, fruktoj kaj kelkaj dabingoj. Fininte tion, ŝi foriris por alia objekto.

Profitante tiun ŝancon s-ro Zhao tuj aliris kaj ŝanĝis unu per sia antaŭpreparita dabingo. Tion la mastrino sciis neniom. Antaŭ sia ekveturo s-ro Zhao iris al matenmanĝo. Li diris al la Tria Ino:

"Okaze mi mem havas dabingojn, do, forprenu la viajn por regali aliajn gastojn." Li ekprenis sian dabingon manĝi. Ĝuste kiam li manĝis, la Tria Ino venas kun teo, s-ro Zhao diris: "Kara mastrino, bonvole gustumu mian dabingon." Li donis al ŝi la interŝanĝitan kaj ŝi ekmanĝis. Ĝus ĉe la ektuŝo de la manĝaĵo la Tria Ino ekfalas teren kun azena heno, kaj transformiĝis en azenon, eĉ tre fortan.

S-ro Zhao do rajdis ĝin ekveturi. Li ankaŭ prenis ĉiom la lignajn pupon, bovon, plugilon k.c., sed, ĉar ne posedante la sorĉarton, li ne povas disponi ilin. Tre glate s-ro Zhao vojaĝis multajn lokojn rajdante sur la transformita azeno, kiu povas iri po cent liojn ĉiutage...

Post kvar jaroj li vojaĝis al la trapasejo Tongguan. Atinginte lokon kvin aŭ ses liojn oriente de la Templo de Huashan-monto, li renkontis apudvoje maljunulon kiu ridegis manklakante, dirante:

"Ho, la Tria Ino de Banqiao, kial en tia formo?"

Ekkaptante la azenon li diris al s-ro Zhao: "Kvankam ŝi estas kulpa, tamen vi ja sufiĉe punis ŝin. Bonvole liberigu ŝin ekde nun!"

La maljunulo do ekdisŝiris de la muzelo kaj el la azena felo eksaltis la Tria Ino, tute sama kiel en la malnova tempo. Riverencinte al la maljunulo, ŝi foriris kaj malaperis neniuj sciis kien.



elĉinigis **Guozhu** (Ĉinio)

## Chiung Yao (1938-2024)



*aŭtorino, Chiung Yao*

Chiung Yao, 86-jara, je la 4-a de 2024, metis finon al sia propra vivo pro nekuracebla malsano en sia hejmo. Ni esprimas sinceran kaj profundan kondolencan pri ŝia forpaso.

### En profunda korto (12)

Kuŝante sur la lito en sia ĉambreto, Hanyan stupore rigardis la plafonon, kun siaj manoj sub la kapo. Vaporeca varma aero saturiĝis en la ĉambreto. La sunsubira rebrilo oblikve prilumis la dekoloriĝintan fenestrokurtenon el blua tolo. Sen ajna ventblovo en la aero, la ĉambreto varmege sufokis kiel granda bakkesto. Ŝiaj nuko kaj mallongaj haroj ĉe la frunto malsekiĝis de ŝvito. La kotona matraco sub ŝia korpo elspulis varmon kiel fajreto. Turninte sin sur alian flankon, ŝi ĵetis la longajn harojn de nuko al verto kaj faris longan elspiron, kiu ankaŭ estis varma. Ekster la fenestro staris alta muro de alia fabriko. La griza kaj malnova muro punktitaj per kafokoloraj makuloj kaj pluvaj postsignoj prezentis nenian estetikan belecon. Tiu posttagmezo estis longa kaj laciga, sekigita de la suno, senodora, sengusta kaj senkolora.

Hodiaŭ ŝi ne iris al laboro, kaj kiel ŝi povis pasigi la sekvajn tagojn? Ne labori, ne. Bai Peiwen jam diris, ke ŝi ne estas taŭga kiel laboristino. Se ŝi daŭrigos sian laboron en la fabriko, ŝi nur pliigos ŝarĝon. Ŝi absolute ne utiligas la simpation de viro kiel la ŝtuparon supren. Ŝi ne povas akcepti la laboron proponitan de li, kaj krome, ŝi ne plu povas labori en tiu te-prilaborejo kaj devas elserĉi alian elirejon. Jes, alian elirejon! Kiel simplaj la du vortoj! Sed kie estas ŝia elirejo? Antaŭ la pordo kuŝas nur la sakvojo.

Ŝi sidiĝis el la lito, ŝvitmalseka tra la korpo, multe suferante. Ŝi rememoris pri la poemo de Su Shi “kun glacieca haŭto kaj jadecaj ostoj, ŝi malvarmeta sen ŝvito”. Ŝajnas, ke tiu “ŝi” ne restis en ĉi tiel sufoka ĉambro, alie ŝi ne havis “glaciecan haŭton kaj jadajn ostojn”. Ŝi eksuspiris. Ĉiu ajn poezieca ĉarmo bezonas subtenon de ekonomia forto! Realo estas kruela vipo, kiu povas forpeli ĉiujn poeziecajn ĉarmojn. Stariĝinte, ŝi malfermis la malantaŭan pordon, kiu kondukis al malgranda

korto, kie troviĝis pumpilo por eltiri akvon, ĉar oni ne disponis kranakvon ĉi tie. Malantaŭ la korteto staris la domo de la luanto, de kiu ŝi luis la ĉambreton kontraŭ 200 dolaroj ĉiumonate. Fakte, ŝia ĉambreto estis konstruita de la luanto, kiu utiligis la spacon de la korteto. Je ŝia ĝojo, la ĉambreto havis du pordojn: unu kondukanta la la korteto, kaj la alia al strateto, tiel ke ŝi povis libere en-kaj eliri. Enirinte la korteton, ŝi pumpis pelvon da akvo kaj portis ĝin en la ĉambreton. Ŝi trempis siajn tutan vizaĝon kaj brakojn en la malvarmetan akvon, kio donis al ŝi friskon. Rektiginte sin, ŝi prenis la speguleton el la tablo (ĉar ne troviĝis tualeta spegulo en la ĉambro) kaj explore rigardis sin. Sub distaŭzitaj haroj elmontriĝis ŝia pala vizaĝo kaj de soleco plenis ŝiaj senbrilaj grandaj okuloj. Demetinte la spegulon, ŝi eligis longan suspiron. Sidiĝinte ĉe la tablo, ŝi elprenis plumon kaj skribis sur papero, “Ju pli malriĉa mi estas, des pli mi devas min respekti. Ju pli humila mi estas, des pli alte mi devas min taksi. Ju pli sensignifa mi estas, des pli mi devas min domaĝi.” Finskribinte, ŝi sentis sin multe refreŝigita kaj eĉ la sufoka varmo ŝajne nemalmulte malaperis. Kombinte siajn harojn kaj ŝanĝinte helbluan veston, ŝi decidis eliri por kelka tempo. Antaŭ ol eliri, ŝi aŭdis frapadon je la pordo. Ŝi ekmiris. Kiu faras viziton al ŝi? Al ŝia ĉambro neniam venis gasto.

Kiam ŝi malfermis la pordon, ŝi ankoraŭ pli ekmiris. Ĉe la pordo staris ridetanta viro, rekta, alta kaj ordema... Li estis eĉ Bai Peiwen!

“Ho,” ŝi kriis surprizite. “Mi ne atendis... mi vere ne pensas, ke vi...”

“Ne tre facile por mi trovi vian loĝejon,” li diris ridete. Sen ŝia invito, li jam memvole envenis kaj senzorgeme okule mezuris ĉi tiun simplan ĉambron. Li daŭrigis, “Mia aŭto ne povis atingi ĉi tien, kaj mi nur parkis ĝin ĉe la fino de la strateto.”

“Kiel vi sciiĝas pri mia adreso?” ŝi demandis. Ferminte la pordon, ŝi iris al la tablo kaj verŝis tason da akvo. “Pardonon, mi nur havas simplan boligitan akvon.”

“Ha, ne tre facile,” li diris, oblikve apogante sin kontraŭ la tablo kaj rigardante ŝin. “Mi turnis min al Cai Jinhua por informo, kaj ŝi turnis sin al Yan Lili...” Li fikse rigardis ŝin. “Kial vi ne venis al la fabriko?” li demandis kun mallaŭta sed peza voĉo. Rideto malaperis de sur lia vizaĝo kaj en liaj okuloj brilis premanta lumo, kiu rekte fiksiĝis sur ŝian vizaĝon.

“Ho!” Ŝi eksentis strangajn korbategojn kaj lia rigardo igis ŝin retiriĝema. “Mi eksiĝis el la laboro, sinjoro,” ŝi diris mallaŭte.

Senparole li rigardis ŝin, riproĉe, exploreme kaj iom malkontente. Sin turninte kaj vidinte la paperon sur la tablo, li ekprenis ĝin kaj fikse rigardis la skribaĵojn. Post longa tempo, li demetis la paperon, kaj, levinte la kapon, rigardis ŝin kviete. “Ni interbabilu, ĉu bone?”

“Jes, sinjoro Bai,” ŝi diris iom streĉite.

Sidiĝinte sur la seĝon ĉe la tablo, li direktis sian rigardon al ŝi. Senrimede malpeze suspirinte, ŝi ankaŭ sidiĝis sur la litrandon kontraŭ li, ĉar troviĝis nur unu seĝo en la ĉambro. Levinte palpebrojn, ŝi renkontis lian rigardon, kun pasiva mieno.

“Kial vi eksiĝis el la laboro?” li demandis.

“Vi jam diris, ke tiu laboro ne taŭgas al mi.”

“Mi havas laboron taŭgan por vi.”

“Sinjoro!” ŝi ekkriis peteme.

Li prenis de sur la tablo la paperon en la mano kaj ekbalancis la kapon.

“Tio estas, kion vi volas esprimi, ĉu ne?” li demandis, fiksrigardante ŝin. “Kia homo mi estas, laŭ via opinio? Ĉu mi volas venigi vin al mia oficejo kiel ornaman florvazon? Ĉu vi, pro via memrespekto, povas rifuzi aliulan favoron laŭplaĉe? Mi volis doni al vi helpon, sed tio rezultigis vian senlaborecon. Ĉu via ago ne embarasas min? Ho, fraŭlino Zhang,” li preme rigardis ŝin kun brilantaj okuloj. “Ĉu vi ne agas iom troe?”

Ŝi fiksrigardis lin tiom mirplene kaj senhelpe. Movetante siajn lipojn, ŝi balbutis, “Ho, sinjoro Bai, vi... vi ne devus diri tiel. Tio, kion vi... vi tiel diris, simple estas... kulpigi min!”

“Mi ne volas kulpigi vin,” li diris seriozmiene. “Vi donis al mi senton, ke mi erare faris tion.”

“Do, kion mi devu fari?” ŝi rigardis lin, kun la kompatinda mieno de senhelpeco.

“Akceptu la laboron, kiun mi aranĝis por vi,” li diris serioze, penante regi sin, ke li ne prezentu en sia voĉo la mildan senton de simpatio el la korprofundo.

“Ho, sinjoro Bai!” Ŝia voĉo tremetis. “Mi ne deziras, ke vi maltrankviliĝu, sed... sed, sinjoro Bai...”

“Se vi ne deziras, ke mi maltrankviliĝu,” li interrompis ŝin, “do, ne diru ‘sed’!”

“Sed... sed...”

“Ha, vi tuj diris ‘sed’ denove!” dirante, li penis reteni la ridon. Li devis per la plej granda forto regi la muskolojn sur la vizaĝo por ne vidigi siajn sentojn. Ŝi fikse rigardis lin, ne sciante, kion fari. Ĉi tiu viro donis al ŝi la senton de premado, tiel ke ŝi preskaŭ perdis sian spiron. Li aspektis tiom gigante, tiom memfide kaj tiom agreseme. Antaŭ li ŝi sin montris liliputa, febla kaj sendecida. “Nu, ni decidiĝu, ĉu?” Li aldonis premon al ŝi, “Venu labori en la oficejo morgaŭ!”

“Ho, sinjoro, ŝi hezitis. “Ĉu vi vere bezonas helpanton?”

“Ĉu vi timas, ke mi ne povas doni al vi taskon, aŭ ke vi havas malaltan salajron?” li demandis. “Ho, jen, mi ankoraŭ ne diris al vi pri via salajro. Nun vi estas sekretariino. Kompreneble vi ne povas esti pagita laŭ salajro. Ni difinu du mil dolarojn ĉiumonate, ĉu bone?”

Ŝi mallevis sian kapon silente.

“Kio pri tio?” li sin montris iom maltrankvila. Sur lia frunto eksudis ŝviteroj pro varmego kaj sufokeco en la ĉambro. Vespera krepusko invadis la ĉambron. Sidante ĉe litrando, ŝi iom klinis la kapon. La krepuska lumo borderis per brila orkoloro ŝiajn frunton kaj nazspinon, kaj ŝi aspektis kiel malgranda statuo, fajne farita artaĵo. Tio igis, ke li ekhavi simpatian senton kaj ne povis ne reteni la rampantan pasion en sia koro. Tuj poste li senpacience urĝis, “Kio pri tio?” Ŝi daŭre tenis sin silenta. “Kio pri tio? Kio pri tio?” li elmetis kaskadon da demandoj.

Subite levinte sian kapon, ŝi rekte rigardis lin. Ŝiaj okuloj brilis kaj tiuj nigraj okulgloboj stele flagris. Ŝia tuta vizaĝo estis vualita per neordinara lumo kaj prezentis mirindan belecon. Kun milda kaj obeema voĉo, ŝi softe diris, “Vi jam penis konvinki min per tiom da vortoj, kion mi povus fari krom akcepti?” Li retenis sian spiradon kelke da sekundoj. Tuj poste lia sango akcelis sian kuradon tra la korpo kaj lia koro ekbatis forte kaj rapide, tiel ke li ne povis regi sian ravitecon. Estis la unua fojo dum lia tuta vivo penetreme rigardi ŝin. Li trovis, ke antaŭ li sidas centprocenta virino, kaj li mem centprocenta viro. Allogite, forte allogite de ŝi, li eĉ timis, ke ŝi forglitos el liaj manoj. Dum momenteto li jam faris tian decidon, ke li neniel forlasu ŝin! Ŝia malgranda kapo kaj febla animo estos la trezorejo, kiun oni ne povas prifosi ĝis elĉerpiĝo. Li volas esti tiu prifosanto kaj li volas investi ĉion lian por prifosi la riĉan ercfonton.

En la sekvantaj tagoj ĝusta pruvigis lia prikalkulado, ke la animo de tiu junulino vere estis neelĉerpebla trezorejo. Krom ŝia animo, ŝiaj saĝeco kaj cerbo estis ankaŭ la unuaklasaj. Ŝi komencis helpi al li ordigi la dokumentojn. La kontraktoj, kiujn ŝi ellaboris, estis bone konstruitaj, la leteroj, kiujn ŝi respondis, koncizaj, kaj la kontoj, kiujn ŝi kopie skribis, netaj kaj bonordaj... Li mirplene trovis, ke ŝi vere fariĝis lia helpanto kaj plenumis multajn taskojn asignitajn al ŝi. La taskoj, kiuj ofte prokrastiĝis nefinitaj dum unu aŭ du monatoj, estis plenumitaj dum kelke da tagoj en ŝia mano. Ĉiutage, li esploris ŝin per tute nova rigardo kaj povis eltrovi ŝian alian bonan kvaliton nemalkaŝitan.

Li formis la emon iri al la fabriko. Li gratulis sin mem, profunde gratulis sin mem, ke li ne maltrafis ŝin. Kaj Hanyan? Ŝi jam fariĝis en la fabriko legenda figuro, kiu promociiĝis unupaŝe de laboristino al sekretariino. Ĉiuj laboristinoj babilis pri tio malantaŭ ŝia dorso, kaj ĉiuj superaj oficistoj, kiaj direktoro Zhao kaj kontisto Zhang, direktis novan rigardon al ŝi. Tamen ili ne estis kritikemaj al ŝi kaj ili nur interŝanĝis komprenan rideton. Kiel la juna mastro povus rezisti kontraŭ la allogo de bebulino? Kvankam Zhang Hanyan ne estis tiom ĉarma kaj bela kreitaĵo, ŝi tamen estis delikata kaj gracia, afabla kaj milda, ĝuste kiel blanka kaj delikata majfloro. Ili ĉiuj povis rimarki, ke li pli kaj pli ŝatas resti en sia oficejo tagon post tago, kaj lia rigardo ĉiam aŭtomate sekvas ŝin. Kiu scias, kiel tio disvolviĝos en estonteco?

Ŝajnas, ke la laboristino, kiu svenis sur la te-sunuma tereno, fariĝos la fama Cindrulino en la fabelo. Nu, oni nomis ŝin Cindrulino sekrete. Precipe, post kiam ŝi demetis la laborveston de la laboristino, ŝi elmontris sian elegantecon kaj noblecon en temperamento, kaj pro tio la nomo Cindrulino cirkulis tra la tuta fabriko. Bai Peiwen sciis, ke oni certe havas multajn babilojn pri lia konduto malantaŭ lia dorso, sed li donis nenian atenton al ili. Dum la komencaj tagoj, Hanyan vere sentis sin singena kaj maltrankvila, sed poste ŝi al kutimiĝis al tio trankvile. Ŝi kondukis tre afable kaj milde al laboristinoj kiel siaj egaluloj, kaj respektoplene al direktoro Zhao kaj aliaj. Pro tio, ĉiuj homoj, de supre al malsupre, tre ŝatis ŝin kaj volontis fari ion por plaĉigi ŝin. Eĉ Cai Jinhua, la laborestrino diris al aliaj laboristinoj, "Frue mi jam sciis, ke ŝi ne estas nia egalulo. La unuan tagon, kiam ŝi venis al la fabriko, mi konsideris ŝin nesimpla. Vidu, eble iun tagon, ŝi fariĝos nia mastrino!" Nun ke ekzistis tia ebleco, kiu povus ŝin malestimi? Kaj plie, ŝi mem estis tiel milda kaj aminda, ke ŝia pozicio fariĝis subtila en la fabriko. Ankaŭ la rilato inter Bai Peiwen kaj Hanyan iris en subtilan staton.

Tiun tagon, pro okupiĝo pri pli da aferoj en la fabriko, Bai ĉesis labori preskaŭ ĝis la sesa, kaj li diris al Hanyan, "Mi invitas vin al vespermanĝo, ĉu bone?"

Kiam ŝi hezitis, li tuj diris, "Ne penu serĉi pretekston por rifuzi min!" Ne povinte reteni la ridon, ŝi diris, "Vi ne invitas min, sed ordonas al mi! Bone, Kien ni iru por vespermanĝo?"

"Do sekvu mian aranĝon!" Ŝi ekridetis senparole. Dum ĉi tiuj tagoj, ŝi jam konis lin. En kia ajn okazo, li ĉiam estis la viro, kiu fariĝis la fokuso, kaj cetere, senkonscie li fariĝis ordonanto, gvidanto kaj "mastro".

Ili enaŭtiĝis kaj li stiris la aŭton en la direkto al la antaŭurbo, malproksimiĝante de la urbo. Ekster la aŭta fenestro iom post iom prezentiĝis la verdaj ebenaĵoj kaj kampoj, kiujn ŝi rigardis tra la fenestro. Friska vespera vento enbloviĝis tra la apertita fenestro kaj distaŭzis ŝiajn harojn. Apogante sian kapon sur la seĝo, ŝi, kun duonfermitaj okuloj, profunde enspiris la malvarmetan venton miksitajn kunodoro de la ebenaĵoj, lasante sin baniĝi malstreĉite en la vespera vento.

Stirante la aŭton, li ĵetis ekrigardon al ŝi trans la ŝultro. Ŝi ĝoje kaj memkontente apogis sin sur la dorso kun siaj longaj haroj flirtantaj. Ĉe ŝiaj lipoj videblis nedistingebla rideto kaj ŝiaj okulharoj duonfermitaj lasis duoncirklan ombron sub la palpebroj. Ŝia figuro sin montris delikata, febla kaj ensonge leĝera.

"Ĉu vi ne demandis al mi, kien mi kunportas al vi?" li diris.

"Certe al bona loko," ŝi malklare respondis kun pliiĝanta rideto.

Li eksentis rapidajn korbatojn. "Mi deziras, ke vi tiel fidu min por ĉiam. Mi vere soifas kunporti vin al mia kampo."

"Via kampo?"

“Jes,” li diris mallaŭte. “Ĉiu havas sian kampon, la kampon en la koro.”

“Ĉu vi mem kredas, ke via kampo estas bona loko?” ŝi rigardis lin el la duone mallevitaj okulkharoj.

“Jes. Ĝi estas fekunda virga tero.” Li rigardis la antaŭan vojon. “Mankas al mi bona kultivisto.”

“Kia domaĝo!” ŝi klakis per la lango. “Mi ne estas kampulo, sed se vi bezonas kultiviston, mi helpas al vi serĉi lin.”

“Dankon pro via zorgemo,” li diris el inter dentoj. “Kaj via kampo? Ĉu kultivisto iris en ĝin?”

“Mi ne havas fekundan virgan teron, sed aridan grundon netaŭgan por disflorado kaj fruktodonado.”

“Jes?” aŭdiĝis lia peza voĉo.

“Jes.”

“Do, ĉu vi voluntus doni vian grundon al mi kaj lasi min esplori, ĉu ĝi vere ne taŭgas por disflorado kaj fruktodonado?”

“Dankon pro via zorgemo,” ŝi imitis lian parolmanieron.

Ĵetinte tuj ekrigardon al ŝi, li vidis ŝin milde rideti. Ŝi malfermis siajn okulojn duonfermitajn antaŭe kaj rigardis absorbite la senliman verdan pejzaĝon tra la fenestro de la aŭto. Ĉe la rando de la ĉielo pleniĝis la koloraj nuboj kaj la subira suno estis falanta al la horizonto. Nur post momento, krepusko vualiĝis, kaj la montoj kaj arboj en malproksimo baniĝis en nebulo, svagaj kiel tiuj en ĉinstila pentraĵo de pejzaĝo.

Ili haltis ĉe antaŭurba restoracio, kiu portis la ŝildon kun eleganta nomo “Loĝejo en Monto”. Situante ĉe la monttalo de Baitou Pitoreskejo, ĝi estis konstruaĵo duonĉina kaj duon-japana kun zigzagaj koridoroj, delikataj balustradoj kaj elegantaj salonetoj frontantaj al la montvalo. Ili elektis saloneton, kie la tablo staris antaŭ pordofenestro, ekster kiu kuŝis koridoreto kun balustrado. En duonluma krepusko, la rigardado malproksimen ĉe balustrado povis ĉirkaŭpreni la ennebulan montpejzaĝon kaj la sunon duonkaŝitan de smeralda monto.

“Kiel?” li demandis.

“Tre bela!” Ŝi profunde enspiris, apogante sin sur la balustrado. Nereteneble ŝi disetendis siajn membrojn, starante renkonte al la vento, kiu pufigis ŝian vestaĵon kaj distaŭzis ŝiajn harojn. Ŝi mallaŭte recitis kelkajn versojn verkitaĵoj de antikva poeto, “Salikoj flirtas en nebula palo, tegoloj glimas en krepuskvualo, ĉe balustrado spektas mi en staro, subira suno glitas al montaro.” Li rigardis ŝin sen palpebrumado. Hodiaŭ ŝi estis en pure blanka tali-svelta bluzo kaj mallonga jupo, starante en vento kiel feino. Ĉu ŝi estis la laboristino volvita per indiga tolo, kiu svenis sur la tesunuma tereno? Li eksentis konfuzitecon kaj distriĝemon. Aŭdinte ŝin softe reciti

“ĉe balustrado spektas mi en staro, subira suno glitas al montaro” mildvoĉe, li spertis ankoraŭ pli grandan ravitecon. Starante apud ŝi, li nereteneble ĉirkaŭprenis ŝian sveltan talion per la mano.

“Ĉu vi legis multe da poemoj?”

“Jes, mi ŝatas ilin,” ŝi diris. “Tagoj estas amaraj por mi, kaj mi legas poemojn. Kiam mi afliktiĝas, mi laŭtvoĉe legas ilin. Ju pli multe mi legas, des pli profunde mi dronas en la bela imago, tiel ke mi povas teni min ekster vulgaraj aferoj kaj ekhavi klaran animstaton, kaj ĉiuj ĉagrenoj kaj afliktoj forlasas min.”

Li penetreme rigardis ŝin. Kiel delikata kaj kortuŝa junulino ŝi estas! Ĉu ŝia kampo estus arida? Kiel fekunda tero ĝi devas esti! Li devas eniri, nepre okupi ĝin kaj esti la nura mastro de la fekunda tero!

“Hanyan!” li ameme vokis.

“Jes?”

“Ĉu vi opinias, ke mi estas tre vulgara?” li demandis, sentante, ke li fariĝis triviala kaj sensignifa antaŭ ŝi.

“Kiel vi povus esti tia? Vi estas firma, zorgema kaj ĝuema pri la homa vivo. Viaj pensoj estas super ĉiuj vulgaraj. Vi estas la homo kun la plej profundaj pensoj, kiun mi iam vidis antaŭe.”

Lia koro ŝveliĝis plene pro tiuj vortoj, sango rapide fluis tra lia korpo, lia menso vagis tien kaj reen, kaj lia spirado rapidemis.

“Ĉu vere?” li demandis.

“Jes vere,” ŝi respondis serioze.

“Do, ĉu vi povus malfermi la pordon de via kampo al mi?” li demandis kun retenita spiro.

“Mi ne komprenas, al kio vi celas.” Deturninte sian kapon, ŝi montris la ĝardenon kun prosperaj floroj kaj arboj kaj diris, “Jen estas rozoj. Ĉu vi jam flaras la aromon de rozoj? Mi tre ŝatas rozojn, precipe la flavajn. Mi ĉiam revas, ke mi havus grandan ĝardenon plenan de rozarbustoj.”

“Ke vi havos grandan ĝardenon, mi promesas tion al vi. Tamen vi ne deturniĝu de nia konversacio. Vi ankoraŭ ne respondis al mi la demandon.” Ŝi ĵetis al li strangan rigardon.

“Mi jam diris, ke mi ne komprenas, al kio vi celas.”

“Do, mi klarigu pli klare...”

Antaŭ ol li finis sian parolon, kelnero alportis pladojn. Rapide turninte sin, ŝi iris al la fenestropordo, dirante, “Oni alportas pladojn. Ni manĝu! Mi estas malsata.”

Kun kolereto li rigardis ŝin, kiu la unua residiĝis ĉe la tablo kaj bele ridetis al li. Eliginte longan spiron el la nazo, li vole nevole reiris al la tablo. Kiam li sidiĝis, ili komencis manĝadon. Lia rigardo karesadis ŝian vizaĝon, sed ŝi ŝajne ne konsciigis pri tio kaj nur silente kaj dolĉe ridetis. Post longa tempo, li rompis la silenton kaj

diris subite “Vi ŝatas poemojn. Ĉu vi konas tiun poemon?”

“Kiun poemon?” ŝi demandis, levante la paron da naivaj okuloj.

Rigardante ŝin, li malrapide recitis, “Spite al frida flor-pejzaĝo, mi serĉis primaveron jam malfrue pro domaĝo. Mi scias ne en nuna vivo, kien mi fine povus vidi vin en efektivo? Perfekta kreitaĵ’ vi estas, neniom da kompren’ pri mia korinklin’ ne restas. Kun vera korinklino al vi, mi certe staros kun vi sur la sola branĉ’ kun pi’!” Ŝi rigardis lin, iomete ebria pro drinketado. Ŝiaj okuloj brilis akvece, ŝiaj vangoj ete ruĝiĝis pro ioma ebrico, kaj malseke karmiziniĝis ŝiaj lipoj, ĉe kiuj ankoraŭ restis rideto, naiva kaj infaneca.

“Mi ne scias, kion ĝi esprimas.”

Li fikse rigardis ŝin, iom kolera, sed ŝia figuro ne kolerigis. Enspirinte, li diris, “Vi mistifikas min, Hanyan. Mi sentas, ke vi ĝuas mian suferon. Mi ne povas distingi, ke vi eĉ estas tiel kruela bubineto!”

Ŝiaj okulharoj malleviĝis kaj la rideto malrapide fadis el ĉe ŝiaj lipoj. Rigardante la tason kaj pleton antaŭ si, post longa tempo, ŝi eklevis sian kapon malrapide. Sur ŝia vizaĝo ne plu restis la rideto kaj naiva mieno, sed anstataŭe trista kaj petema vizaĝesprimo, kaj en ŝiaj okuloj glimis larva brilo.

“Mi ne volas mistifiki vin, sinjoro. Mi ne suferigu vin, sinjoro. Se vi demandas pri mia sento al vi, mi malkaŝe diru al vi, ke mi admiras kaj adoras vin! Sed ne babilu kun mi pri aliaj temoj. Ni povas amikiĝi. Iun tagon, vi renkontiĝos kun junulino pli bona ol mi...”

“Kion vi volas diri?” Rigardante ŝin, li subite kompreneme diris, “Ho, mi komprenas. Ĉu vi pensas, ke mi nur amuziĝas kun vi? Tio kulpigas min, ke mi ne bone esprimas, kion mi volas. Hanyan, mi malkaŝe demandu al vi, ĉu vi iom ŝatas min?”

Ŝi deturnis sian kapon kaj diris mallaŭte, “Ni ne babilu pri tio, mi petas!”

“Hanyan!” Li tuj aldonis, “Vi devas respondi al mi!”

“Ne, sinjoro Bai,” ŝi surprizite ekskuis sian malgrandan kapon. “Ne devigu min, mi petas!”

“Hanyan...”

“Mi petas!” Ŝi supren rigardis lin. Ŝia rigardo kun pliiganta tristo retenis liajn sekvantajn vortojn. Li gapis al ŝia vizaĝo paliĝinta pro paniko, ŝiaj tristaj nigraj okuloj kaj tremetantaj lipoj... Li ne plu havis koron eldevigi ŝin. Vesupirinte, li deprimito mallevis la kapon, dirante, “Bone! Ŝajnas, ke mi ne havas bonŝancon hodiaŭ! Nu, ni ne babilu pri tio, sed, ne pensu, ke mi forlasu vin, Hanyan, mi neniam forlasu vin dum mia tuta vivo.”

“Sinjoro!” ŝi vokis alfoje.

“Sufiĉe! Mi ne ŝatas aŭdi vin nomi min per tiu titolo,” li parolis al si mem, kuntirante siajn brovojn. “Ŝajnas, ke ŝi ne konas lian nomon.” Returninte sian kapon, li direktis sian vizaĝon al ŝi, “Bone, ĝoju. Almenaŭ ni devu havi ĉi tiun manĝon kun plezuro!” (**daŭrigota**)

*elĉinigas Vejdo (Ĉinio)*

## La lastaj vortoj de Chiung Yao

Karaj ĉiuj miaj amikoj kaj intimaj konatoj:

Ne ploru, nek malĝoju, nek ĉagreniĝu pro mi. Mi jam foriris 'ŝvebe'!

'Ŝvebe' estas mia plej ŝatata vorto, kiu signifas "memvolan, senĝenan kaj liberan flugon", elegantan sed leĝeran. Mi liberiĝis de la korpo, kiu iom post iom kaŭzis al mi doloron, kaj transformiĝis en neĝflokon kaj forflugis ŝvebeme!

Tio estas mia deziro. Morto estas neevitebla vojo por ĉiuj kaj ankaŭ la lasta "grava afero". Mi ne volas submetiĝi al la sorto kaj la volo de la Ĉielo, nek volas velki kaj putriĝi malrapide. Mi volas esti la mastro de tiu lasta "grava afero".

La Ĉielo ne tre bone desegnis la procezon de la homa vivo. Kiam homoj maljuniĝas, ili devas sperti la dolorplenan tempdaŭron de kadukeco, malfortiĝo, malsaniĝo, en- kaj elhospitaliĝo, kuracado kaj nesavebleco. Kvankam tiu tempdaŭro longas aŭ mallongas, tamen ĝi ebligas tiom grandan turmenton al tiuj, kiuj mortos pro maljuneco! Kaj se okazos io malfeliĉa, ili fariĝos "maljunuloj kroĉiĝantaj al malsanlitoj, kaj vivantaj pere de klinikaj tuboj". Mi propraokule vidis tian tragikan scenon, kaj mi ne volas tian morton!

Mi estas 'fajrero', kiu penegis bruliĝi. Nun, antaŭ ol la flamo estingiĝos, mi elektas tian manieron: ŝvebe foriri. Ĉion, kion mi volas diri, mi registris en mia filmeto *Kiam Neĝflokoj Falas*. Mi esperas, ke miaj amikoj rigardu ĝin kelkfoje por kompreni ĉion, kion mi volas esprimi.

Amikoj, ne malĝoju pro mia 'morto', ridetu por mi! La beleco de la vivo kuŝas en tio, ke oni kapablas "ami, malami, ridi, plori, kanti, paroli, kuri, moviĝi, vivi kun kunuloj en la homa mondo por ĝui la senĝenan kaj elegantan vivon, kovi malamon kontraŭ ĉiaj malbonoj kaj vivi vigle kaj pasie...". Ĉion ĉi mi posedis kaj spertis dum mia vivo, sed ne vanigas ĉi tiun vivon!

Tio, kion mi plej domaĝas, estas forlasi miajn familianojn kaj vin ĉiujn. La amo en mia koro firme ligiĝas kun vi ĉiuj, kiujn mi plej malvolontas forlasi. Por ke mia animo (kvankam mi ne scias, ĉu homoj havas animon) povu flugi ŝvebe, bonvolu rideti por mi, kanti por mi, danci por mi! Mi, en la ĉielo, dancos kun vi!

Adiaŭ, miaj plej karaj! Mi ĝojas, ke en ĉi tiu vivo mi povis renkontiĝi kaj konatiĝi kun vi.

Atentu, la maniero de mia morto estis efektivigita ĉe la fina haltejo de mia vivo! Vi junaj homoj neniam facile rezignu pri via vivo pro portempaj malsukcesoj kaj batoj aŭ provoj de la bela vivo. Mi esperas, ke vi eltenos tiujn provojn, kiel mi, por vivi ĝis la aĝo de 86 aŭ 87. Tiam, kiam via forto ne plu subtenos la korpon, vi povos elekti, kiel alfronti morton. Mi deziras, ke tiam la homaro jam trovu tre humanan manieron helpi maljunulojn ĝoje foriri!

Karaj, estu kuraĝaj por vivi kun forta memo. Ne vanigu la ŝancon vivi foje en ĉi tiu mondo! Kvankam la mondo ne estas tiom perfekta, ĝi havas diversajn neatenditajn ĝojojn kaj malĝojojn! Ne maltrafu tiujn mirindajn momentojn, kiuj apartenas al vi!

Ne eblas ĉion diri per vortoj. Fine, mi bondeziras al vi ĉiuj sanon, feliĉon, kaj senĝenan kaj elegantan vivon!

**Chiung Yao**

Verkite en la Domo Shuangying ĉe Tamshui

04-12-2024

*elĉinigis John Huang (Kanado)*

## Chiung Yao

### Kiam Neĝeroj flirte falas

(teksto de filmeto)

Kiam neĝeroj falas silente,  
mia koro kantas milde kaj belsone.  
Finfine venis la tago, kiun mi longe sopiris,  
la neĝa sezono de la vivo ne plu havos bedaŭron.  
Ho, la vojo plenplenas je malglataĵoj kaj sufero,  
sed ĝojo kaj kanto ofte donis al mi konsolon.  
Serpentuman montvojeton mi sukcesis transgrimpigi,  
kaj kuraĝe alfrontis la muĝantajn ondojn en akvaro.  
Mi jam lasis... lasis...  
mian sinceron inter frazoj kaj vortoj,  
ĝi estas la fajro bruligita de mi por la amo en la vivo.  
Kiu sur neĝon freŝan floron metis?  
Sunradioj prilumas rozon kun vigla viveco.  
Ĝuste kiel neĝo kaj fajro en mia koro,  
ĉu bonajn ĉu malbonajn, mi al ili kovas vervon kaj esperon  
Tiu mia memo... tiu mia memo...  
ĉiam ĉasas sunleviĝojn kaj sunsubirojn,  
kredas je la amo ĉiam konstanta en la homa mondo,  
kaj gardas la sinceron, sed neniam ĝin ŝanĝis.

Ĝi estas mia elekto, la lastfoja sed la plej valora.  
Tempo jam alvenas, mia vivo ne plu pliboniĝos.  
Dum mi ankoraŭ povas ridi kaj kanti,  
mi ne volas kompromiti la plejkarulojn, kaj liberiĝi el malsanaj  
ĝenoj.

Mia koro flugu gaje en libero,  
jen ĉi momento... ĉi momento...  
brile disfloras kiel fajrero kaj neĝero  
mi flugu al la galaksio, kie mi povos danci senĝene.



elĉinigis **John Huang** (Kanado)

## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



*poeto, Mikaelo Bronŝtejn*

### Al Tatjana Georgievna

#### Loskutova

Ni ne scipovas transsalti  
la kelkjardekan abismon,  
ni ne kapablas reveni  
al nia hela junec',  
kaj mankas tempo por halti  
l' tempo fuĝas ja tra l' prismon

de la imago, eĉ sen ni  
nin mem trompadas sen dec'.

Sed dum la pensoj kapturnaj  
nin ĉagrenigas kuraĝe,  
dum nian dormon trankvilan  
mave mornigas maljun',  
niaj konvinkoj maturaj  
flustras, ke estus ne saĝe  
lasi en int' okulbrilon,  
kiu ĉeestas ĝis nun.



Do same batu la kor' en  
brustoj de ni, impetante,

restu por vivo motivo,  
regu nin la opini',  
ke ni l' instruan laboron  
faras ne vane konstante,  
kaj daŭros plu nia vivo  
en la lernantoj de ni.

\*\*\*

Jen miaj infanoj –  
pinetoj, kiujn mi plantis  
en la diafanaj  
matenoj. Kaj pasis kvin jaroj.  
L'odoro kaj ĉarmo,  
pri kiuj mi iam kantis,  
denove kun varmo  
ekfluas en miaj arbaroj.

Ne gravas do, kiom  
da jaroj donos l' destino –  
ja iom post iom  
la pinoj kreskos eĉ sen mi,  
kaj do post jardekoj,  
eble, mia nepino  
l'arbaron revenos  
por ĝui kaj novajn semi.

\*\*\*

Gurdita temo pri l'folia oro  
ne rampu en poemon mian pene.  
Sed kial maltrankvilas mia koro,  
spektante tion, komprenante ke ne  
plu daŭros ben' de tiu ĉi aŭtuno?

Mi tuŝas la foliojn multkolorajn  
klininte min, kaj kaptas min kapturno.  
Aŭtunojn intajn, rememorajn – plorajn,  
fascine ĝojajn, amoplenajn, tristajn –  
retrovas mi en la kolora bunto.

La agojn de la sorto, plej kapricajn,

mi vidas kvazaŭ en realo. Nun do  
komprenas mi l'kialon de ripeta  
aŭtuna emo per poem' prilumi  
la foliaron: ŝatas kor' poeta  
eventojn de l' iamo foliumi.

\*\*\*

En mia oktobra arbaro,  
for de ĉiutagaj kvereloj  
flavetas en musko helverda  
kantantaj por mi kantareloj.

La kant' de odoro kaj gusto  
Ektentas, ĝojigas kaj ravas,  
Ne lasas mi ilin en musko,  
Por bona frandaĵo forrabas.

Kaj paŝas mi plu kun la kanto,  
Donaco de l'fungoj aŭtunaj,  
sendube bonŝanca paŝanto  
kun revoj, multpli ol mi junaj.

\*\*\*

La malnova tombej' kaduka en Sankt-Peterburgo.  
Tomboŝtonoj pace ĝuas funebran aŭtunan oron.  
Flugis for en Leteon kelkaj jarcentoj nur, do  
sun' la sama varmon malavare ofertas, por en  
tiu lasta varmo oktobra de la kuranta jaro  
trovu eĉ la ŝtonoj humile konsolan benon  
ĉe la ora katuno kaj kupro de la foliaro,  
kiu pompe nobligas la teron kaj la matenon.

Triangule flugantaj gruoj super la krucoj krias,  
kaj la krio trista sopiron semas al foro suda,  
al la marĉoj afrikaj fremdaj, al ŝvita ĝangalo, kies  
karesema gastamo voka aŭdeblas ja eĉ por surda.  
Mi la polmon lante levas al mia frunt' viziere  
por rigardon ĵeti sor al la grua vokanta krio,  
dezirante ke, dum mi daŭre restadas surtere,  
post sezonaj ŝanĝoj rapidaj por mi ripetiĝu ĉio.

## Tiberio Madonna (Italio)



*poeto, Tiberio Madonna*

### **La soldateto kaj la dancistino**

La soldateto el ligno  
kun la rigardo fiera  
laŭ la ritmo de l' milito  
marŝis tra la strato;

tra la strato dancis  
laŭ la muziko de l' animo  
kun romantika rideto  
la dancistino el ŝtofo.

La fadenoj de l' amo  
interligis iliajn rigardojn  
kaj la paŝoj saltetis  
sur la notoj de l' koro.

La ligno faris breĉon  
en la delikata ŝtofo  
varma kaj morbida  
de la dolĉa dancistino.

Sub la uniformo  
la fiera soldateto  
kaŝis koron  
kiu ekdancis kun la ŝia.

Kaj dancadis graciaj  
la paŝoj de li kun la paŝoj de ŝi  
kiu estis pli kaj pli malpeza  
dum ŝia koro flamiĝis.

Sub la vesteto  
el velur' flava kaj roza  
estis koro el vato  
dancanta en la dancistino.

Sub la uniformo  
la fiera soldateto  
kaŝis koron  
lignan, duran kaj pintan.

En brakum' la koro-pinto  
senmovi el ligno  
pikis ŝin en la vato  
konfuzita en la doloro.

La soldateto el ligno  
kun la rigardo fiera  
ridetis frostan rideton  
dum li foriĝis de ŝi.

Kaj li marŝis tra la strato  
forportante kun si  
la vaton elŝiritan al ŝi  
kiu dronis en la trompo. ※

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



*poetino, Maria Nazaré Laroca*

### Konkero

*Al Dirce Sales*

La kiraso de l' animo  
de batalanto duras,  
kaj delonge daŭras  
en solecaj monaĥejoj,  
kaj mornaj dezertoj  
aŭ dum bruegaj luktoj  
tute sensignifaj ...

Sed la batalanto iam,  
kiel poeto renaskiĝas,  
kaj l' animo laca  
de pezo liberiĝas, kaj  
la malpezon konkeradas  
per l' armiloj de poezio.

## Supersemajnfino en Recife

En la sama semajnfino,  
jen tri radiantaj dimanĉoj  
en la brazila Venecio:  
literatura Recife de Clarice,  
Manuel Bandeira, João Cabral...

Recife tiel simpla, kaj tiel rafinita,  
senkompara sindona Recife:  
akceptema patrino koro!

Mi konfesas, ke mi travivis  
(pardonon, Neruda!)  
momentojn de fajna ĝojo kaj ĉarmo,  
kronitajn ĉe l' Esperanta Simpozio,  
kiu kunigis dekojn da koroj

de gajaj brazilanoj senaĝaj,  
en festo de frateco kaj kulturo!

## Dankemo al la patroj

Per ĉipreskaŭa poemo,  
mi dankas al ĉiuj patroj,  
kiuj ame min akceptis  
en la migrad' de l' miljaroj.

Kaj plej akras la sopiro  
pri tiu en la memoro,  
kiu homo faris min  
dum l' alfrontoj de la vivo.

Mia koro multe dankas,  
per ĉisenvorta pulsado,  
en tute silenta preĝo  
al Patr' de ĉiuj animoj!

## Rifuĝejo

Pilgrimantoj el la steloj,  
ni alvenis en la mondon  
por mallonga vivsezono  
je la servado de Amo.

Tamen baldaŭ ni forgesas,  
ke la reveno vidiĝas  
sur l' agendo de l' Kreinto.

En la poezialiro  
flora, dolora, ĥimera,  
l'animo sin fortikigas  
meze de gaja oazo  
inter soleco el plumoj.

## Kristnaska petego

Post ĉi senfina tempo,  
l'anim' fine renoviĝas,  
kaj volas petegi donacon  
nealireblan ĝis nun:  
ke mia koro ŝanĝiĝu  
en staltrogon el amo,  
vivantan sanktejon el lumo,  
kaj vin akceptu, Jesuo!

## Repaciĝo

Okazis la 4an de junio,  
meze de pandemio,  
la sennoma akcidento  
rompinta ostojn  
animon, sonĝojn: koŝmaro  
plej bone priskribita  
de Machado de Assis  
en la brila ĉapitro "La deliro"  
de famkonata ĉefverko.

Sed kun dolor' mi repaciĝis,  
kiam finfine mi eksciis,  
ke mi ne plu bezonas  
demandi kial, sed kiel,  
kiamaniere bridi  
senzorge la suferon...

Kaj mi eklernis tiam,  
ke mi ankoraŭ malnetas  
el nefinita poemo,  
kiu sin rekreas sentime  
en la poezio de l' Vivo. ※

## Liven Dek (Hispanio)



*poeto, Liven Dek*

### SOLA SUB LA STELOJ

(Kantoteksto)

Sola en la nokto,  
meze de kamparo,  
paŝas infaneto  
plorante kun amaro.  
Portas liajn ĝemojn  
eta milda vento.  
Super li, la steloj  
brilas en silento.

Larmoj sen demando,  
ĝemoj sen respondo,  
li ne scias kie  
restis lia mondo.  
Eta pupo estis  
lia lasta ĝoj',  
sed ĝi malaperis  
ie sur la voj'.

\*

Sola sub la steloj,  
meze de kamparo,  
paŝas infaneto  
plorante kun amaro.  
Ne plu estas hejmo,  
bombo rompis ĝin,  
malaperis muroj,  
frato kaj fratin'.  
Larmoj sen demando,  
ĝemoj sen respondo,  
li ne scias kie  
restis lia mondo.  
Foren el la strato,  
Paĉjon oni trenis,  
faris lin soldato,  
kiu ne revenis.  
Larmoj sen demando,  
ĝemoj sen respondo,  
sub la steloj iras  
eta vagabondo.  
Ie sur la vojo,  
aŭ ĉe la landlim',  
perdis li la pupon,  
falas la patrin'. ※

## Ulrich Matthias (Germanio)



poeto, Ulrich Matthias

### Aŭtuna vespero

Stratoj, placoj forlasitaj,  
el la domoj milda lum'.  
Kaptas min impresoj noktaj,  
mi haltas korte kun cerbum'.

Ŝajne estas hejme ĉiuj,  
mankas varm' de proksimul'.  
Mankas, kio donas ĝojon,  
kaj kun larmo en okul'

mi plu vagas el la muroj  
ĝis libera horizont'.  
Ĉio dormas en trankvilo,  
vastas la silenta mond'.

Hejmeniri mi decidas.  
Sidas mi ĉe komputil'  
Kaj ĉe Vizaĝlibro vidas  
fotojn de amikoj mil.

En la virtuala mondo  
malpli tristas mia sort'.  
Ĝuas mi amikajn sentojn,  
ĝojas pri afabla vort'.

Vortoj en amata lingvo,  
kantoj super lingva lim',  
fotoj de amataj homoj,  
filmoj el la malproksim'.

Kaj min ravas rememoroj  
pri kunvenoj en pase'.  
Homoj, kiujn mi renkontis,  
kiujn mi ŝategis tre.

Super miaj songoj dolĉaj  
ŝvebas iu sorĉa son'.  
Kia brilo, kia belo.  
Gracoplana, ĉi-sezon'. ※

## Feri Floro (Hungario)



### La vento de aŭtuno

La vent' de aŭtuno forte blovas,  
volon al ŝanĝo ĝi nun alportas,  
sezono ŝtorma, la folioj tremas,  
la tempo por disiĝi tuje alvenas.

Kio ajn vin ĝenas, lasu ĝin for,  
kiel sekaj folioj, morta, sen valor'.  
Grizas la ĉielo, septembro blovas,  
tio, kio vin pezas, la tempo ĝin solvas.  
La veter' aŭtuna forportas ĉion,  
kun pluvo kaj vent', ŝanĝas la vivon,  
la agrabla varmo subite malaperas,  
kun forta mano la naturo regas.

La vento de aŭtuno krias forte,  
ne venas trankvile, nek komforte.  
Kio min vundis, mi lasos ĝin for  
mi iros kun paco en mia kor'.

### Silento

En tiu brua, furioza mondo,  
estu la silent', la trankvil', la voĉo.  
Kiel flor' sovaĝa sur la kampo,  
floru kviete, en certa kanto.

Parolu profunde, kun silento,  
via anim' en fekunda eĥo,  
vekiĝu ĉiam kun amo en vi,  
plena de espero, bona energi'.

Se la silent' diras pli ol la bru',  
protektu la vivon, varmecon inspiru.  
En la kviet' la anim' resaniĝas,  
kun pacienco la pac' riĉiĝas.

La ĉiel' en la nokto malluma  
atestanto de pac' la plej pura.  
Do, en via silento, brilu sen timo,  
via anim' estu, via interna lumo.

La vento flustras tra la montaro,  
kanto sen hasto, sen ia tromparo.  
Sur la herbej' floroj balanciĝas,  
al la mond' aromon disdoniĝas.

## Paco

Sur la mond' kie la paco regas,  
sian lokon nur la bono posedas.  
Brakumoj plenaj de vera konfido,  
por la intersanĝo en trankvilo.

Vortoj sinceraj, veraj kaj tute klaraj,  
ne karesas la senton, la amaraj.  
Solvoj serenaj, brilantaj tuj vide,  
honesta manpremo, certigas efike.

Aŭdu voĉon de la beno,  
kreditu je la rozo en la ĝardeno,  
sen malamo, ĝi floras en paco,  
ni sopiras mondon plenan de graco.

Preferu voĉon de la bono,  
ni kreditu ĉiutage en la bonvolo.  
Sen kolero, ĝui la tagon,  
ni sopiras nur pacon, ne batalon.

## Koro

Por protekti mian koron,  
mi min malgaje retiras,  
kovras la spurojn kun rezon',  
triste, en malĝoj' foriras.

Sentu vin bone, pensu do!  
diras ĉiam mia koro,  
nenion malbonon vi faros,  
se am' ripozos sen ploro.

Miaj pezegaj memoroj,  
nun ne lasas min ripozi,  
la temp' pasas, ni silentas,  
kaj streĉo komencas boji.

Kaj poste kio okazos?  
la tago kion ofertas?  
Ĉu restos nur la sufero?  
Kia vivo sen raviĝo!

jam dum horoj mi pripensas,  
pri ni kaj pri miaj duboj,  
resti ĉe vi jes mi volas  
ni estas ĝemelaj nuboj.

## Revigu min

Mi volas ke vi min revigu,  
kiel vi faris en viaj brakoj,  
mi petas ke vi min nun veku  
kun kare' de viaj manoj.

Mi perdis la nostalgion  
pro via pacplena rideto,  
forgesante pasintecon,  
plenigis min la feliĉo.

·  
Mi bezonas la saman aeron,  
kiun vi enspiris,  
kiu forigis mian angoron  
kaj ĝojo min plenigis.

·  
Vian ĝemon mi volas ĝui  
dum vi sentas la karesadon,  
vian “koron” tenere tuŝi,  
ke vi spertu la amadon.

·  
Ekzistas revo pli ŝatata  
ol senti sin, sen lim’, amata?  
kiam vi ekflamigas fajron,  
kaj malsekigas la kusenon?

·  
Mi bezonas, ke vi min revigu  
ke mia songo la vero fariĝu,  
ke mi vin havu, karulino,  
ĝis venos la eterna fino. ※



## Erika Godó (Hungario)



*poetino, Erika Godó*

### Oktobro

Oktobro venas, vento malvarma blovas,  
sur branĉoj de arboj flavaj folioj dancas.  
Kavalkado de koloroj, naturo lumas,  
la magio de aŭtuno ĉion malbonan forpelas.  
Matena roso kiel perloj sur la herbo,  
malgrandaj sekretoj kaŝitaj inter branĉoj.  
La tero sopirigas iom ripozon post somero,  
ĉiu folio flustras adiaŭon pri la bona vetero.

Vestita en belaj koloroj, naturo floras,

dum sunradioj tra nuboj milde brilas.  
La kampoj silentas, rikolto finiĝas,  
sub la ĉielo griza, la mondo trankviliĝas.  
Vesperoj longiĝas, tagoj iom mallumiĝas,  
kaj ĉe la fajro, nia animo pli varme sentiĝas.  
Oktobro alportas al ni la pacon en nia koro,  
la naturo jam prepariĝas por ĝia vintra dormo.

### Kiu estas mi?

Mi estas nur vaganto en la mondo,  
mi flugas sur la flugiloj de miaj revoj.  
Mi serĉas mian vojon, malkovras la lumon,  
ĉiu paŝo estas nova, ekscita malkovro.  
Sekretoj, deziroj kaj esperoj profunde en mia koro,  
memoroj brilantaj en la spegulo de mia pasinteco.

Mi estas kuraĝa, sed foje mi estas neseкура,  
mi marŝas la vojon de la vivo, foje mi blokiĝas.  
Mi bataligas la venton, kontraŭ la tajdo,  
estas miraklo kaj ebleco en ĉiu mia defio.  
Kiu estas mi? Mi estas rakonto, sonĝo, mistero,

mi estas homo, kun sekretoj de la estonteco.

## La flamo de la forno

La flamoj de forno dancas, hele,  
la koro malsatas pro ĝia varme.  
Flamo brilas en flava, oranĝa, ruĝa,  
rakontas pri sekretoj de fajro.  
La ligno flustras, ardaĵoj kraketas,  
silento ĉirkaŭ, nur magio restas.  
La fajro varmigas mian animon,  
en malvarma nokto mia rifuĝejo.  
La flamo de la forno, mia fidela amiko,  
en ĝia lumo, mi trovas ĉiam pacon.

## Mia patrujo

En la brakumo de verdaj montetoj,  
kaŝita malnovaj malgojaj rememoroj.  
En la malvarmeta akvo de riveroj,  
speguliĝas bildo de mia infaneco.  
Neĝaj montpintoj estas senfinaj,  
kiuj konservas miajn sekretojn.  
En ĉiu freŝa vento, en ĉiu silento,  
mi aŭdas la vokon de mia patrujo.

Memoro de flaviĝantaj tritikaj kampoj,  
laodoro de floroj, oraj dolĉaj revoj.  
En la malvarmeta ombro de verdaj arboj,  
la vento flustras rakontojn malnovajn.  
Vi estas mia valora trezoro por mi,  
mia animo kaj koro vivas ĉiam en vi.  
En mia tuta doloro kaj ĝojoen vivo,  
vi estas mia hejmo, mia eterna koro.

## La maljuna vagabondo

La tagiĝo kreviĝas, nova tago komenciĝas,  
la sunradioj tra la malhelaj nuboj brilas.

La celo de la vagabondo estas nekonato,  
lia vaganta koro estas kiel libera birdo.  
Ekblovo de devaga vento karesas lian vizaĝon,  
lia sako estas plena de timaj gardataj sekretoj.  
Malantaŭ lia pasinteco, nur rememoroj ekbrilas,  
kun lacaj kruroj sed feliĉa animo migras.

Ĉiu paŝo nova aventuro dum lia vojo,  
li migras sur la bordoj de riveroj, sur valoj de montoj.  
Li serĉas sian propran vojon en tuta sia vivo,  
sub fajra suno, inter la steloj en la mallumo.  
Li trovas novajn amikojn, foje li adiaŭas,  
sed li ĉiam trovas hejmon, kien ajn li iras.  
Vaganto, kiu elektas la vojon de scio de la mondo,  
kaj la vento de libereco blovas sian kanton.

## Kanto pri Esperantujo

Ekzistas lando, kaŝita en la koro.  
Tamen vi ne trovos ĝin sur la mapo.  
Esperantujo, la mondo de la revoj.  
Kun verda espero, plena de amikaj vojoj.

Esperantujo, nia hejmo sen limo.  
Lando de amo, ligas nin kun amikeco.  
Sub la suno brila, vortoj flugas libere.  
Ĉi tie niaj verdaj koroj restas kune.

Buntaj vilaĝoj, montetoj en la vento.  
Bluaj riveroj kantas kun la sento.  
Homoj promenas, ridetoj ĉie brilas.  
Nia celo estas paco en la mondo.

Esperantujo, nia hejmo sen limo.  
Lando de amo, ligas nin kun amikeco.  
Sub la suno brila, vortoj flugas libere.  
Ĉi tie niaj verdaj koroj restas kune.

Ne nur lando, sed sento en la koro.

Esperanto gvidas nin al la feliĉa estonta.  
Kie ajn ni iras, ni trovas la vojon,  
Esperantujo, vi estas nia lando.

Esperantujo, nia hejmo sen limo.  
Lando de amo, ligas nin kun amikeco.  
Sub la suno brila, vortoj flugas libere.  
Ĉi tie niaj verdaj koroj restas kune.

## Nokta silento

Nokta silento, vualo,  
fine mondo estas kvieto.  
Steloj brilas hele,  
sonĝoj flosas en aero.  
Sekretoj kuŝas nokte,  
luno dancas sur arboj.  
Freŝa vent' blovas ekster,  
rakontas historion.

Ĉiu ombro mistero,  
forvelkas en nebulo.  
Malkovru regnon de sonĝoj,  
ili ligas homojn kiel steloj.  
Pordego de sonĝoj malfermas,  
alia mondo, animo flugas.  
Sono de silento ludas,  
pacaj momentoj, magio.

## La voĉo de la koro

La voĉo de la koro rakontas silente,  
ĝi kaŝas sekretojn kiel la noktaj steloj.  
Danco de emocioj, mola kaj profunda,  
ĉiu korbato estas nova espero.  
Amo spicas la tagon,  
la ombro de doloro foje restas.  
Sed la koro, se ĝi vere volas,  
ĝi trovas solvon eĉ sur vojo malfacila.

Do aŭskultu, kion ĝi diras al vi,  
ĉar la voĉo de la koro ĉiam gvidas.  
Velura tuŝo, klara lumo,  
la plej bela melodio, ĝi neniam finiĝas.

## Sidu ĉi tie apud mi...

Sidu ĉi tie apud mi,  
ni kune rigardu stelojn.  
Trovu nun nian lokon,  
en la lumo de ĉiel’.  
En la kvietaj noktoj,  
kunbatas niaj koroj.

Sidu ĉi tie apud mi,  
rakontu pri viaj revoj.  
Pri viaj deziroj,  
kaj la celo de vivo.  
Via voĉo, milda muziko,  
estas kara al mi ĉiam.

Sidu ĉi tie apud mi,  
ni sentu la silenton.  
Malproksime de bruo,  
nur ni du sur la tero.  
La magio de momente,  
estas kiel sonĝo, eterne. ※



## Jadranka Miric (Serbio)



*poetino, Jadranka Miric*

### Dankokiso

Vi, filo mia,  
kiel anĝelo-gardanto  
jam dekoj da jaroj  
estas mia animsavanto.  
Viaj okuloj ne ĉiam brilaj  
parolas multe ol vi kapablas,  
tenas min ke mi ĉiam fortas

kvankam en mi pluvas.  
Kiel proksimiĝas mia maljunec'  
kaj senzorgaj tagoj pasis,  
pli ofte mi pensas pri vi ,  
pri via necerta estontec'.  
Tiaj pensoj timigas min.  
La infano en vi  
kaŝigas timon. Kune ridetas ni.  
Brakumante mi kisas vin.

### Aŭtuna preĝo

Ĉielo kun nubo griza  
similas al aranea reto.  
Surtere okulfrapas piza  
koloro de la lasta herbejeto.

Tra ŝanĝo de farboj  
de jam falinta foliar'  
ekas novaj sezono-aventuroj.  
Sama al bestar' kaj malsama la homar'.

Milda venta tuŝo  
sankta vorto sur buŝo  
ofte benita preĝo  
al Dio, nia reĝo:  
"Faru ke homo al homo ne estu lupo!"

## La unua renkontiĝo

En la ĉefa strato  
ekvidis mi vin, ho, amato!  
En homamaso mi perdita  
kvazaŭ mi estus de homoj izolita.

Animo flamiĝanta,  
kaj genutremas,  
kaj okuloparo  
fajrere brilanta.

La subiranta suno ruĝiĝas  
kiel vangoj miaj.  
La korflameco malpermesis al mi  
ekparoli. Tiam alproksimiĝis vi.

La manoj viaj plektiĝis  
honte sed forte kun la miaj.  
La korbatoj forte aŭdiĝis,  
kaj niaj lipoj ekridiĝis.

Vi foriris al kino,  
via amiko insistis.  
Al mi plaĉis via inklino.  
Morgaŭ niaj vojoj reinterkruciĝis.

## Malfrua aŭtuno

Sur blua vasta ĉielo  
la blanka aviadilospuro ŝajnas en hasta elpelo.  
Li sur motociklo kun brunulino  
dolĉa similas al bombono aŭ sorĉistino.

Suno ankoraŭ oriĝas.  
Tamen la ĉiela koloro ŝanĝiĝas  
dum lasta sunradio  
droniĝas en malhelo, laŭ volo de Dio.

Eĉ freneza norda ventaĉo kvietiĝis.  
Sufiĉe ĝi kaŝe gvasis sub inaj jupoj kaj laciĝis.  
Tamen ĝi sukcesis ridojn ellogi  
de inoj estinte tia forta kaj fivalora.✂

# Bedo de Ĉinesko

## Vejdo (Ĉinio)



poeto, Vejdo

*La jenaj ĉinstilaj poemoj estas verkitaj laŭ la ĉinesko Sopir-al-sudo, kies skemo konsistas el 5 verslinioj de 3, 5, 7, 7, 5 silaboj respektive kun rimaranĝo xaxaa (x=senrima).*

## Sindefendo kontraŭ ŝtelistoj

(rakonto pri Afanti)

Afanti

preter la palac’

paŝis kaj vidis onin

konstrui pene sen lac’

laŭ la reĝa plaĉ’

muregon

ĝian alten pli.

“Kial ĝin plialtigi?”

al vokto demandis li

kun scivola kri’.

La vokto

iom oldaĝa

respondis en moka ton’,

“Kian stultaĵon, saĝa

vi vir’ kuraĝa,

diraĉas!

Estas nia cel’

sekurigi l' palacon  
kontraŭ la ŝtelistoj de l'  
fia malfidel',

kiuj ja  
volus trudi sin  
por rabi valoraĵojn.  
Tiel oni ja sen tim'  
vivas laŭ rutin'."

"Vi pravas,"  
Afanti sen ĝen'  
diris, "sed kion fari,  
se ili troviĝas en  
palaca teren'?"

## Admono de Alaho

(rakonto pri Afanti)

Afanti,  
ofte de malsat'  
suferis pro malriĉec'.  
foje sur la bazar-strat'  
kriadis en laŭt':

"Sendito  
de Alaho mi  
estas! Mi de Alaho!"  
La reĝo jen sciis pri  
tio kun envi'.

Venigis  
li lin al palac'  
kaj demandis: "Vi diras,  
ke vi devenas de Alah',  
diru al mi, aĥ'

do, kion  
Alah' admonis?"  
"Lia admon' riĉigos,"  
Afanti tion donis,  
ŝajne friponis.

"Rakontos  
mi al vi plue,  
kiam mi ja satiĝos.  
Jen alportu unue  
manĝon senbrue."

La reĝo  
pensis pri la bon'  
alportota de Alah',  
aranĝis jen per ordon'  
manĝon en salon'.

Post manĝad'  
Afanti diris:  
"Alaho min admonis:  
'la reĝ' de vi rab-ŝiris  
monon kaj tiris

vin al marĉ'  
de povra stat'.  
Vi rajtas sate manĝi  
ĉe l' reĝo laŭ via ŝat'  
kiel lia frat'!"

## Mandareno en boato

(rakonto pri Afanti)

Mandaren'  
foje per boat'  
veturis kun Afanti,  
ektimis sub onda bat'  
sur flua malglat'.

Tremante,  
li tiris forte  
la baskon de Afanti,  
petante: “Timas morte  
mi, malbonsorte.

Mia kor’  
elsaltos pro tim’.  
Bona Afĉjo, bonvolu  
ja eldanĝerigi min  
de morta ruin’.

Afanti  
respondis lante:  
“Via moŝto, rimedo  
ekzistas sendemande,  
sed ĉu marĉande

akceptos  
ĝin vi aŭ nee?”  
“Certe vian konsilon  
mi ja sekvos obee,  
fidele tree”

Insistis  
la mandareno:  
“Mi volonte konsentas  
ion ajn kun kompreno,  
tuje sen ĝeno!”

“Bonege,”  
Afĉjo admiris,  
“do en akvo vi spertu  
unue,” dum li diris  
akven lin tiris.

Post pluraj

subakviĝoj jen  
Afĉjo kaptis je l' haroj,  
enboatigis per tren'  
lin kun plor-mien'.

En boat'  
li timis ne plu.  
Afanti ĉuis ruze:  
"Kiel vi vin sentas, fu?  
Tre komforta, ĉu?"

"Ha, jes, jes!"  
la mandareno  
respondis rapidege,  
treme en korpa pleno  
pro malvarm-ĝeno.

Meditis  
Afanti mute:  
"Tiu, kiu neniam  
subakviĝis, jen tute  
ne, absolute

ne ajne  
sekurecon de  
boato. Kiel vi  
kapablas kompreni tre  
malsaton, ho ve,

de tiuj  
povruloj klare,  
se vi ĉiame manĝas  
frandaĵojn joviale,  
tute malŝpare!"

## Ardo (Ĉinio)



*poeto, Ardo*

### Primaveraj Elegioj

vi jesis  
ke vi foriros  
konfirmis onidiron  
vi pri la hast-foriro  
kun firma spiro

refoje  
tre tre tremante  
mi premas vian manon  
senvorte rigardante  
vin ŝtoniĝanta

ne diru  
korŝirajn vortojn  
ankoraŭ ne la tempo  
por tranĉi la aorton  
difini l' sorton.

.....

ne haltis  
susura pluvo  
ĉijare ne ŝanĝiĝis  
la rivereta fluo  
korŝira pluvo.

zefiro  
kun flirta pluvo  
en frida primavero  
mi vidis vin en rufo  
kun pasi-fluo

## Kruela disiĝo

Printempo  
ankoraŭ frida  
vi diris, ke vi iros  
kun adiaŭ' perfida  
Ĵaluzo rida

Ĉu vere?  
vi ne diris foriri  
dum lasta amrenkonto  
vi hastas ja foriri?  
mi jam kapgiris.

Jam palas  
vizaĝo via  
Kapklino mi amsopiras  
vin kun amkoro pia  
jam tre ebria.

Matene  
mi vokis ne vin  
neniu diris al mi  
al kie mi vidus vin  
Mi vokas plu vin

Sendanke  
kaj senkompate  
Vi trafas mian koron  
per glavo sangobata  
Sen spur' korbata.

**Viktoro Li (Ĉinio)**

## Lanc' kaj Ŝildo

(ĉina antikva fablo)

Antaŭe  
en la bazaro  
persono estis, kiu

ofertis per komparo  
de sama varo

la lancon  
kun akra piko  
kaj la ŝildon solidan.  
Li blagis al publiko:  
“Kia efiko!

Jen lanco  
mia ja povas  
trapiki ajnan ŝildon,  
kiun oni ja trovas  
kaj vere provas

enmonde!”  
Kaj post momento,  
li laŭdis fanfarone:  
“Sen fieraĉa sento,  
sen komplimento,

jen ŝildo  
mia solida  
plej estas sub la suno!  
Kia ajn lanc’ insida,  
akre rapida

ne povas  
trapanetri ĝin!”  
Apudstaranto ĉuis:  
“Ki’ okazos en la fin’,  
se, jen kun obstin’,

fortulo  
pikos senpere  
per via propra lanco  
al via ŝild’ severe?”  
Stupora vere

vendanto  
jen kiel ŝtono  
sin tenis senrimede,  
sen klariga rezono  
sen respond-dono.

## Knabeco

knabeco  
la suno ora  
prilumas mian koron  
kristalan kun favora  
la lumo glora

knabeco  
ondanta maro  
alportas al mi larmojn  
pri pasintaj koŝmaro  
kaj petol-faro

knabeco  
floro aroma  
beligas l' ordinaran  
vivon kun ĝojo doma  
kaj lud' riddona

knabeco  
nubero blanka  
levas min al la ĉiel'  
profunda kaj blu-planka  
ĉagren-senmanka

knabeco  
gajplena roĵo  
forfluis malproksimen  
kun mia plend-malĝojo  
fojon post fojo ※

# Henryk Zbierzchowski (Pollando):

## La laŭdo al libro

Mi ŝatas la bibliotekan kvieton kaj mallumon.  
La homan spiriton de temploj imponaj,  
Kien ne penetras la ĝena vivzumo  
Kun ĉiutagaj zorgoj ne tre bonaj.  
Kie min ombroj gvas el bretaroj,  
Silentogarda staras anĝelaro.  
Mi ŝatas librojn dormantajn enŝranke,  
Saĝe silentajn, ĉar jam ĉionsciaj.  
Kio surtere estas kaj subplanke  
Kaj kio okazas ekster Tero mia,  
Kie stelmiriadoj, kometoj kaj sunoj  
Vagadas en spaco sen videblaj limoj.  
Mi ŝatas librojn, kiujn dum jarcentoj  
Kolektis zorge ĉiu bibliofilo.  
Vizaĝojn ili havas diferencajn.  
Kun ĉiam propra spirita profilo.  
En ili rekte, klare reaperas  
Ĉio eterna - kio ne pereas.  
Kolapsos amikec' post ebrio,  
Finiĝos amo dormanta en fibroj.  
Ofte mallongas renkonto-serio,  
Do la plej trafajn trovos ni per libro,  
Al kiu dum tristo, manko kaj ĝojpleno,  
Ĉiam amike certe ni revenos.  
Libro! Vi estas la profunda fonto,  
De homa penso senmorta rivero.  
La tempo fluas, restas ruinmontoj,  
Sed via esto neniam pereos,  
Ĉar el spirito venas potencaĵo!  
Forpasas homoj - postrestas legaĵoj.

*Fonto: H.Zbierzchowski, Pochwała książki, [en:] S.Dippel, O księgarzach, którzy przeminęli, Zakład Narodowy im. Ossolińskich - Wydawnictwo, Wrocław 1976, p. 6.*



esperantigita de

**Przemysław**

**Paweł Grzybowski (Pollando)**

## Rovere Emanuele (Italio)



### La ĉielo en unu ĉambro

*Esperantigo: (Manŭel)  
Muziko / vortoj: Gino Paoli*

Se vi estas kun mi,  
mia ĉambro ne plu havas vandojn sed arbojn,  
arbojn multenombrajn.  
Kiam vi estas apud mi,  
ĉi tiu griza plafon' min ne subpremas plu,  
mi vidas super ni l'ĉielon,  
dum tie ĉi ni restas forlasitaj  
kvazaŭ ekzistus plu nenio, nenio en mondo...

Ludas akordion',  
ŝajnas al mi orgen'  
vibranta por vi, por mi  
en la senlimec' de l'ĉielo,  
por vi kaj por mi en ĉiel'.

### La vivo rozkolora

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)  
Teksto esperantigita / verkita de Manŭel Rovere*

Hela rigard', kvazaŭ knabin',

rideto dolĉa sur la buŝ',  
jen la portreto sen retuŝ'  
de l' virin', kiu ravas min.

Kiam ŝi brakumas min  
kaj flustras el la sin',  
la viv' rozkoloriĝas.

Ardajn vortojn el la kor'  
ŝi diras sen pudor':  
la sensoj ekscitiĝas.

Sentas mi, en la anim',  
feliĉon preter lim',  
neniam eĉ revitan.  
“Nur vi por mi, mi por vi en la mond’”

ŝi diris kore en ĵur' por la vivo.  
Kiam mi pensas pri tio,  
akceliĝas la puls'  
de mia kor'.  
Noktoj de am' kvazaŭ sen fin'  
dum regas plena harmoni',  
penojn forigas la pasi':  
la temp' de ĝoj', ĝoj' sen lim'.

Se ŝi estas apud mi,  
mi vidas dank'al ŝi  
la vivon rozkolora.

Ŝvebas ĉirkaŭ mi muzik',  
la mond' estas amik'  
kaj ĉiu hom' bonkora.

Ŝiaj vortoj, ŝia spir',  
samkiel eliksir',  
min igas sendolora.

Elstaras ŝi en la plej bela rev'  
kaj mi sopiras surlipen ŝin kisi.  
Se mi estas apud ŝi,  
la vivo ĉiam brilas,  
ho jes, por mi.

## En foiro de la oriento

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)*

*Muziko / vortoj: Angelo Branduardi*

En Foiro de l' Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.  
Kaj venis kato, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.  
Kaj venis hundo, kiu mordis la katon,  
kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.  
Kaj venis bastono, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon,  
kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient', per du groŝoj, museton paĉjo aĉetis por mi.  
Kaj venis fajro, kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon,  
kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient'...

Kaj venis akvo, kiu estingis la fajron, kiu bruligis la bastonon,  
kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson,  
kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l'Orient'...

Kaj venis bovo, kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron,  
kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon,  
kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient'...

Kaj venis buĉisto, kiu buĉis la bovon, kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron,  
kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon,

kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient'...

Kaj l' angelo de la morto, super la buĉisto, kiu buĉis la bovon,  
kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron, kiu bruligis la bastonon,  
kiu batis la hundon, kiu mordis la katon, kiu manĝis la muson,  
kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient'...

Kaj fine la Sinjoro, super l' angelo de la morto, super la buĉisto,  
kiu buĉis la bovon, kiu trinkis la akvon, kiu estingis la fajron,  
kiu bruligis la bastonon, kiu batis la hundon, kiu mordis la katon,  
kiu manĝis la muson, kiun en bazar' paĉjo aĉetis por mi.

En Foiro de l' Orient', per du groŝoj, muŝeton paĉjo aĉetis por mi.

## Mi estas kredanto

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manüel)*

*Muziko / vortoj: Neil Diamond*

Kredis mi, ke amo estas nur fabel',  
neatingebla revo, kiel stel',  
afero iom stulta, malfidinda vort'.  
Ĉu ŝanĝiĝos iam mia sort'?

Serĉis mi en preskaŭ ĉiu mondopart',  
enketis eĉ per divenista kart'.  
Fariĝis mi skeptika, certa pli kaj pli,  
ke neniam trovos amon mi.

Sed nun mi vidas vin, vian vizaĝon,  
ricevas mia kor' tre belan mesaĝon.  
Mi amas vin, fariĝas kredanto,  
kredanto je la amo.

Kredis mi, ka amo estas altruism',  
sed vidas mi, ke regas l'egoism'.  
Ĉar mi donacis multon, sed mankis la eblec'

por trovi iom da reciprokec'.

Kredis mi, ke amo estas fantazi',  
ekzistas por aliaj, ne por mi.  
La amo, tiu vera, ne troviĝas plu,  
ĝis ĉi tiu kun vi rendevu'.

Kaj, se rigardas mi vian vizaĝon,  
leviĝas tuj la sun' en mia ĉiel'.  
Mi amas vin: mi estas kredanto,  
kredanto je la amo.

## Mia kato

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)*

*Muziko kaj vortoj: Emanuele Rovere (Manŭel)*

Havas mi nigran katon  
inteligentan kaj simpatian.  
Mi trovis lin, iun tagon,  
ĉe l'enirejo de l'hejmo mia:  
timema kaj malsata,  
de iu malbonulo forlasita;  
miaŭoj min igis pli ol kortuŝita.

Donis mi bonajn manĝojn  
kaj lin regalis per ĝentilo mia.  
Ŝufiĉis du semajnoj:  
li reakiris tutan forton sian,  
fariĝis li la reĝo  
de la ĝardeno kaj de l'ĉirkaŭaĵo.  
Nun li surprizas per tiu ĉi strangaĵo:

Mia kato, mia kato ŝatas tre fortajn karesojn.  
Li pensigas min pri l'homoj, kiuj celas la ekscesojn,  
ekstremajn sensaciojn, plenen de adrenalino,  
kontraŭ baroj, preter limoj, por aventur' sen fino.

Kiam mi ekbalaas, li tuj kuŝiĝas apud piedoj miaj.  
Karesojn de mi li petas,

ĉu mi konsentu al postuloj liaj?  
Mi lasu balailon,  
prefere prenu akran ferrastilon.  
Ĉu iam vidis vi pli strangan scenon?

Mia kato, mia kato, ŝatas tre fortajn karesojn.  
Li pensigas min ...



*esperantigita de Alain Roze Courbou (Francio)*

## Qu Yuan (ĉ. 340 a. K.-ĉ. 278 a.K.)



*Qu Yuan (ĉju-jŭan) estas patriota poeto de la Chu-regno dum la periodo de la Militantaj Regnoj en la ĉina historio, kaj fondinto de la romantisma poezio en Ĉinio. Li iniciatis la stilon de Chuci (ĉuci)-poemoj kiel ties reprezentanto, tiel ke li gajnis al si la titolon “prapatro de Chuci-poezio”. La famaj poetoj, kiaj Song Yu (song ju), Tang Le, Jing Chai (ĝing ĉaj), estis influataj de li. Li kreis la novan epokon de kolektiva ĉantado de poemoj al individua poemkreado.*

### Vojaĝo al la foro

En ĉi kaosplena kaj malpura mondo  
volus mi vojaĝi fluge al la foro.  
Sed, ho, kiel mortemulo senrimeda,  
per kio mi povus flugi en izolo?

Ho, vivante en ĉi mava mond'sordida,  
al kiu mi plendus pri mia ĉagreno?  
Mi sendormas tra la nokto en la lito  
kaj solece kaj enue ĝis mateno.

La ĉielo kaj la ter' senlime vastas,  
ve, la homa vivo plenas je sufero.  
Pasintaĵojn mi jam ne atingi povas,  
la futuro al mi estas ja mistero.

Mi vagadas, ho, kun konfuzitaj pensoj,  
afliktiĝas mi ja des pli en despero.  
Mi en tranco flosas en la riverakvo,  
mia tristo pliiĝas sub ĉagren-pelo.

La anim' vanuis ja subite el mi,  
ĉe mi restas nur velkinta korpo vere.

Mi persistas en konduto kun bonvirto,  
por eltrovi juston en la mond' prefere.

Mi plezuron ĝuas en kviet' malplena,  
senagado al mi trankvilecon donas.  
Senas vera la saĝul' je mondaj zorgoj,  
tian animstaton plene mi bezonas.

Mi admiras ties virtojn kaj noblecon,  
kaj feiĝon al ĉielo, kun sincero.  
Kvankam mia korpo tute neniigās,  
mia bona nomo brilas sur la tero.

Miras mi pri steliĝo de Fu postmorte,  
kaj feiĝo de Han muta en medito.  
Ili malaperis foren kun soleno,  
soris al ĉielo iliaj spiritoj.

En aer' mi flugu alten kun rapido,  
tiel ke l' diaĵoj gapas jen en miro.  
En nebul' vidiĝas svage ĉielanoj,  
ire-reirantaj flagre en stelbrilo.

Mi transcendas la vulgaran mondon supre,  
mi ne plu, ho, hejmeniros pro sopiro.  
Mi ja liberiĝu de suferoj homaj,  
mi vojaĝu kien ajn ja kun trankvilo.

Zorgas mi, ke la sezonoj alternadas,  
nun la suno sinkas uesten oblikve.  
Minca prujno falas, kuŝas sur la tero,  
aromherboj velkis frue ja senvive.

Mi promenu tien kaj tien libere,  
spite malsukceson en la kariero.  
Kiu volus ĝui kun mi florojn ĝoje?  
Malstreĉiĝas mi matene en ventpelo.  
La epok' de l' saĝa reĝo malproksimas,

kiel agu mi kun lia virta helo?

Mi aldonu:

Primavero kaj aŭtun' sinsekve pasis,  
kial mi ja alkroĉiĝas al hejmltero?  
Mi ne povas min amuzi kun prareĝo,  
do mi ludu kun la princo en libero.

Mi enprenas spirojn de l' natur' kaj roson,  
min gargaras per sunlumo de mateno.  
Mi spiriton mian tenas pura, klara,  
per enspiroj novaj kaj fetor-elpremo.

Mi vojaĝas en agrabla suda vento,  
kaj ripozas ĉe la suda Birda Nesto.  
Mi renkontis Princon jen por kunnoktiĝo,  
mi konsultis lin pri unuiĝ-ekesto.



Princo diris:

“Unuiĝo nur sentatas en la koro,  
sed ne diskuras per buŝo kaj l' orelo.  
Povas malgrandiĝi ĝi, ho, eĉ sen kerno,  
kaj grandiĝi ekster via konsidero.

Ja magia l' Unuiĝo povas esti,  
ĝi sentatas nur dum nokta la malhelo.  
Tenu vin kvieta vere en la menso,  
ĝi nature sin prezentas kun sereno.

Ĝin renkontu kun senvanta, pura koro,  
al vi avantaĝon gajnu ne kun peno.  
Lasu ĉiujn aĵojn tiele formiĝi,  
trovos pardon al ĝi, ho, vi en kompreno.”

Aŭskultinte tiujn liajn vortojn mi tuj  
min preparas por vojaĝo sen hezito.  
Kune kun flugantaj feoj mi atingas  
fean landon por ripozi en zenito.

Mi matene lavas harojn en Di-Valo,  
mi sekigas mian korpon sub sun’ vespere.  
Suĉas mi saltantajn saŭmojn de la fonto,  
Mi brakumas gemojn belajn tre brilhele.

Baldaŭ miaj vangoj lumradias bele,  
mia korpo fortikiĝas kun sangvino.  
Suplan belon montras mia malgrasiĝo,  
mankas sinĝenem’ jam en mia spirito.

La varmego ’stas laŭdinda en la sudo:  
tie belas laŭro vintre en prospero,  
mankas bestoj sur preskaŭe kalvaj montoj,  
homoj ne sin trovas en vasta kampetero.

Rajdas mia anim’ per buntaj nuboj,  
kaj ĝi flosas supren, ho, al la ĉielo.  
Mi ordonas ovri la ĉielan pardon,  
la pordisto gapas al mi kun tenero.

Mi alvokas Tondrodion por min gvidi,  
ho, al la lokalo de la fea sfero,  
por viziti la naŭan volbon kaj la  
ĉielan palacon vere en mistero.

Frue mi ekiras de l’ Plejsupra Halo,  
kaj atingas Jadan Monton en vespero.  
Mil kaj mil kaleŝoj kune marŝas brue,

flank' ĉe flanko en impona atmosfero.  
Ho, ok drakoj tiras veturilojn pene,  
nubflagoj sur ĉaroj flirtas en leĝero.

Flagoj ĉielarkaj staras sur la ĉaroj,  
kvin koloroj mikse buntas en sunbrilo.  
La ĉevaloj onde trotras kun kapklino,  
la stalonoj flanke kuras kun trankvilo.

Ĉaroj kaj ĉevaloj marŝas en pelmelo,  
sed sin tenas ja direkte al la celo.  
Mi mantenas bridon firme kun vipsvingo,  
por viziti Arbar-dion kun sincero.

Post vizito al Eosta Dio dekstren  
mi min turnas kun Vent-dio por voĵvido.  
Antaŭ ol la suno ekradios lumon,  
mi transflugas ĉiel-sojlon kun rapido.

La Vent-dio flugas kiel pioniro  
por purigi la aeron per blovpelo.  
La feniksoj portas flagojn perflugiloj,  
mi Or-Dion vidas sur uesta sfero.

Kaptas, svingas mi kometon kiel flagon,  
levas stelojn flirti flage en aero.  
Flagoj malfaldiĝas supren kaj malsupren,  
en nubmaro mi vojaĝas kun leĝero.

Malheliĝas kaj vidiĝas ĉio svage,  
mi alvokas nordajn stelojn sep aliri,  
kaj ses stelojn kiel mian arieron  
kaj elektas diojn por marŝe defili.

Vojo etendiĝas longe al la foro,  
mi veturas alten kun brido enmane.  
Dekstraflanke Pluva Di' min akompanas,

Tondra Di' livflanke min eskortas same.

Volus mi transcendi l' vulgaran mondon  
kaj forgesi hejmeniron pro plezuro.  
Sentas mi delicon dum la flugvagado,  
mi konsolas min mem en nubmara lulo.

Kiam mi promenas en nubaro blua,  
vidas mi hejmlokajn kampojn sur la tero.  
La lakeojn kaj min kaptas hejmsopiro,  
la ĉevaloj ankaŭ haltas sen akcelo.

Mi sopiras al gepatroj kaj gefratoj,  
viŝas larmojn mi lamente kun suspiro.  
Mi daŭrigas vojon foren kun leĝero,  
regas mi la tristan senton kun korŝiro.

Rekte min direktas mi al Fajro-dio  
kaj al Jiuyi-Monto bela en la sudo.  
Mi satĝuas scenojn en malhela spaco,  
kvazaŭ flosus mi, ho, sur la mara ludo.

Fajro-di' min deadmonas ne plu iri,  
sed por renkonti Diinon de l'rivero.  
Muzikaĵojn ludas ŝi pri lag' kaj nubo,  
du princinoj kantas kantojn en libero.

Lasu mi Riveran Feon ludi citron,  
Mar-dion kaj River-dion danci kune,  
Nigran Drakon kaj diversajn akvajn monstrojn  
tordi korpojn la zigzagajn ja komune.

Ĉielarko bunte volvas nin gracie,  
Blubirdoj magiaj flirtas kun leĝero.  
La muzikaj tonoj ŝvebas jen spirale,  
kaj mi daŭre ekvojaĝi kun libero.

Mi galopas sen malstreĉi bridon vole  
ĝis la Frosta Pordo de Norda Ekstremo.  
Mi pervente venas al la Klara Font' kaj  
Nordan Reĝon sekvas al glaci-tereno.

Sur zigzaga vojo al la Akva Dio  
mi rigardas tra la tero kaj ĉielo.  
Mi alvokas la Kreinton veni al mi  
por pavimi l' vojon por vojaĝa celo.

Mi vojaĝis jam en kvar direktoj trae,  
kaj traŝvebis ĉien, ho, en vasta spaco.  
Supre mi atingis fulman eksplodejon  
kaj malsupre l' profundejon kun minaco.

Al submondo ŝajne mankas vasta tero,  
supre jen malplenas eĉ sen la ĉielo.  
Kun hastem' mi vidas pene, sed nenion,  
nek mi klare aŭdas en vasta malhelo.  
Mi transcendas neniecon en trankvilo  
kaj alproksimiĝas al korpura sfero.



*elĉinigis Eto (Ĉinio)*

## Jouko Lindstedt (Finlando)



aŭtoro, Jouko Lindstedt

batalojn sed neperfortemon, kaj demandas, ĉu la homaro entute meritas esti savita. Kaj Montagut estas talenta versfaranto, kiu enhejmigis en Esperanton novan metrikon, samfunkcian sed ne identan kun la antikva heksametro. La plivastigitaj komparoj (nomataj, duse, “abelaj komparoj” de Probal Dasgupta) estas bela ennovaĵo (por uzi iom arĥaikan Zamenhofan vorton).

Abel Montagut

### POEMO DE UTNOA



Aliflanke, la scienc-fikcia flanko ne plene funkcias, laŭ mi. La priskriboj de la vivo de la aliplanedanoj ne atingas la nivelon de la priskribo de la teranoj, sed estas kelkloke eĉ iom tedaj, kun amaso da elpensitaj nomoj kaj terminoj. La socio de la “gobanoj”, kun siaj administraj strukturoj kaj moroj (ekzemple geedziĝo), estas nekredeble simila al tiu de la teraj homoj. Kaj mokas la racion tio, ke la aliplanedanoj, evidente evoluintaj tute sendepende de la homoj, povas tamen koiti kun tiuj kaj eĉ generi komunajn idojn! Kia estas la probableco, ke en du planedoj evoluas tiom simila DNA – aŭ io, kion oni entute povas nomi DNA en ambaŭ lokoj? Do, ne temas pri scienca fikcio. La aliplanedanoj en la verko estas propre kvazaŭ antikvaj grekaj gedioj, al kiuj oni disdonis iom da modernaj teĥnikaĵoj kiel rekvizitojn. Eble la aŭtoro celis ĝuste ion tian.

Mi konsentas, ke “Poemo de Utnoa” estas unu el la mejloŝtonoj de nia literaturo, kreita de enviinde talenta verkisto, sed ĝi ne estas plene harmonia tutaĵo. Kiel medito pri la valoro kaj stato de la homaro ĝi ne atingas la nivelon de “La Infana raso”. Veran scienc-fikian epopeon ĝi ne donas al ni (de tiu ĝenro oni prefere legu la tradukon de “Aniara” de Harry Martinson). Aliflanke, iuj scenoj restas profunde en mia memoro, kaj la porpaca kaj kontraŭperforta mesaĝo de la verko estas freŝa kaj klara kiel montara aero. ※

## Iom pri “Poemo de Utnoa”

Mi legis “Poemon de Utnoa”. La sperto estis iom konfuza. En multaj lokoj mi avide suĉis la bonegan tekston – en iuj aliaj (pli malmultaj) mi kvazaŭ pene puŝis min tra ĝena arbeto.

La ĝenerala ideo de la verko estas bonega: epopeo de epopeoj, kun abunda interteksteco, kiu gloras ne

## John Huang (Kanado)



aŭtoro, John Huang

## Turisma vojaĝo tra Tanzanio (3)

*Esplorante la Sovaĝan Belecon kaj Kulturecon Diversecon de Tanzanio: Vojaĝo al la Serengeti-Stepo kaj la Vilaĝo de la Masajoj*

Komence de aŭgusto 2024, mi kun grupo de esperantistoj daŭrigis esplori la faman Serengeti-stepon en Tanzanio. Ni ĝuis la mirindan naturon de ĉi tiu vasta regiono. Poste, ni vizitis vilaĝon de la masajoj por sperti ilian tradician kulturon. Ĉi tiu vojaĝo montris al mi la naturan belecon de Afriko kaj ankaŭ helpis min pli bone kompreni la lokan kulturon. Mi estis la fotisto de ĉi tiu ekskurso kaj uzis mian Nikon-fotilon por kapti ĉiun specialan momenton. Tiel mi konservis ĉi tiun sperton en bildoj. Jen la rakonto de ĉi tiu nekutima vojaĝo.

### Unua Parto: La Sovaĝa Aventuro en la Serengeti-Stepo

La Serengeti estas fama natura rezervejo de Tanzanio en orienta Afriko. Ĝi estas konata pro multaj sovaĝaj bestoj kaj la senfine vastaj stepoj. Ĉi tiu granda tero ĉiujare allogas dekmilojn da turistoj. Plej multaj venas dum la granda migrado. Tiam milionoj da gnuedoj, zebroj kaj antilopoj kuras tra la stepoj por serĉi akvon kaj freŝan herbejon. Por mi, ĉiu momento tie estis plena je mirindaĵoj.

La 2-an de aŭgusto 2024, nia vojaĝo komenciĝis en ĉi tiu vasta stepo. Frue matene, ni forveturis de la kampadejo per terenveturilo. Ni sentis la freŝan aeron kaj la trankvilon de la mateno. La radoj ruliĝis sur la sablo kaj levis etajn polvojn. Ekster

la fenestroj etendiĝis senfinaj stepoj kaj malproksimaj arboj. La suno leviĝis malrapide kaj sendis varmajn radiojn sur la teron, kvazaŭ kovrante la pejzaĝon per ora lumo.

**\*\*la unua foto\*\*:**



Sur la vojo frumatene, afrika bubalo trankvile trapasis la polvan vojon. Fone, nia terenveturilo haltis, atendante ĝis ĝi trankvile preterpasis. La bubalo estis granda kaj paŝis malrapide kaj solide, kiel la vera mastro de la stepo. Liaj nigraj haroj ŝajne brilis sub la lumo de la mateno, kaj lia nigra korpo estis aparte videbla kontraŭ la nebula fono. Ĉi tiu bildo montras la sovaĝan belecon de la Serengeti: tie, la bestoj vere ĝuas sian liberecon, vivante sen interrompoj. Per mia fotilo, mi sukcesis kapti la trankvilon kaj forton de ĉi tiu momento, transdonante la ĉarmon de la naturo.

**\*\*la dua foto\*\*:**



Ni daŭrigis nian vojaĝon kaj vidis grupon de zebroj. Ili trankvile manĝis herbon sur la vasta stepo. La zebroj staris en grupoj, kaj iliaj nigro-blankaj strioj brilis en la sunlumo. La strioj ne nur belis, sed ankaŭ protektis ilin kontraŭ predantoj. Iuj zebroj klinis la kapojn por manĝi herbon, dum aliaj rigardis ĉirkaŭen por certigi sekurecon. La stepo ŝajnis senlima kaj montris la grandan belecon de la naturo. Kapti ĉi tiun

bildon estis kvazaŭ senti la venton tra la herboj kaj la pacan vivon de la bestoj sur ĉi tiu tero.

La Serengeti estas paradizo por bestoj. Riĉa vegetaĵaro kaj vastaj terenoj faras ĉi tiun lokon ideala hejmo por multaj sovaĝaj bestoj. Kiam la zebroj kuregas, la tuta stepo ŝajnas moviĝi kaj vigliĝi, kio kreas belan naturan pejzaĝon.

**\*\*la tria foto\*\*:**



Pli profunde en la stepo, ni vidis pli grandajn grupojn de bestoj. Gnuoj, zebroj kaj antilopoj miksiĝis. Iuj staris, aliaj ripozis sur la tero, ĝuante la trankvilan posttagmezon. Pli fore, ni povis vidi malgrandajn grupojn moviĝi malrapide. Ĉi tiuj densaj grupoj de bestoj simbolas la mirindan spektaklon de la Granda Migrado en Serengeti. Dum mi fotis ĉi tiun scenon, mi volis kapti la senliman vaston de la stepo kaj la diversecon de la vivo. La trankvilo de la bestoj montris la grandan skalon de la naturo.

La Granda Migrado en Orienta Afriko estas unu el la plej mirindaj naturaj spektakloj en la mondo. Ĉiujare, ĉirkaŭ 1,5 milionoj da gnuedoj, 200.000 zebroj kaj centmiloj da antilopoj migras inter Serengeti en Tanzanio kaj Masai Mara en Kenjo. Ili migras pro sezonaj pluvoj kaj akvofluejoj. La bestoj komencas sian longan vojaĝon por trovi pli riĉajn paŝtejojn kaj akvon. Dum ĉi tiu vojaĝo, la bestoj devas trairi centojn da kilometroj de stepoj, riveroj kaj danĝeraj teritorioj. La migrado estas plena de danĝeroj, kiel krokodiloj en la riveroj, leonoj kaŝitaj en la herboj, kaj laceco kaj soifo dum longaj marŝoj. Ĝi estas ne nur mirinda vida spektaklo, sed ankaŭ simbolo de la forto de la ekosistemo. Dum ĉi tiu ciklo, la vegetaĵaro de la stepo renoviĝas, kaj predantoj trovas manĝaĵon, kio tenas la ekvilibron de la Serengeti-ekosistemo.

**\*\*la kvara foto\*\*:**



Ĉi tio estas proksima fotangulo de la dorso de zebro, kie kelkaj ruĝbekaj bufagoj kvazaŭ staras sur "zebratransirejo," trankvile okupante siajn proprajn poziciojn kaj respektante nevideblajn "trafikregulojn." Ili aspektas kiel disciplinaj piedirantoj, ĉiu staranta sur sia linio, perfekte montrante harmonian kunekzistadon. Fakte, inter tiuj bufagoj kaj la zebro ekzistas reciprok-utila rilato: la bufagoj nutras sin per la parazitoj sur la zebro, kaj la zebro profitas de ĉi tiu purigado por resti sana. Kiam mi kaptis ĉi tiun bildon, mi elektis malaltan angulon por emfazi la striojn de la zebro kaj la sintenojn de la bufagoj, por ke la spektanto povu ĝui ĉi tiun trankvilan "interparolon" inter malsamaj bestoj. Ĉi tiu sceno ne nur ilustras la subtilan ligon en la naturo, sed ankaŭ elmontras la simplan belecon de harmonio en la sovaĝejo.

**\*\*la kvina foto\*\*:**



En nia veturila konvojo aperis speciala kaj kortuŝa sceno. Sidanta en la terenveturilo estis la vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA), profesoro Amri Wandel, kaj lia edzino. Amri, fama astrofizikisto kaj mia bona amiko, portis ĉapon kaj verdan ĉemizon, kies koloro simbolas la verdon de Esperanto kaj la

naturon. Li koncentriĝis pri fotado per sia poŝtelefono, fascinite rigardante la ĉirkaŭajn sovaĝajn bestojn. Scivoleme, li elŝovis sian langon, provante kapti ĉiun mirindan detalon de la Serengeti-ebenaĵoj. Ĉirkaŭ ili, en la vasta savano, kelkaj zebroj trankvile paŝtiĝis kaj ripozis, aldonante naturan fonon al la sceno.

Apude, lia edzino sidis kun milda rideto, esprimante trankvilan ĝojon kaj pacon. Ĉi tiu sceno ne nur reflektis la interagon inter homoj kaj naturo, sed ankaŭ montris la fortan ligan inter homoj dum komuna esplorvojaĝo. Mi klopodis kapti per mia fotilo la fokuson kaj la kompreneman rigardon de Amri kaj lia edzino, por ke oni sentu la harmonion kaj ĝojon de ĉi tiu unika vojaĝo en la sovaĝejo.

**\*\*la sesa foto\*\*:**



Krom grandaj mamuloj, la Serengeti estas ankaŭ paradizo por birdoj. En ĉi tiu foto, du grizaj kronogruoj gracie serĉas nutraĵojn sur la herbejo. Iliaj kapoj estas ornamitaj per okulfrapa ora krono, kaj la nigro-blankaj plumoj kreas elegantan konturon. Ili ne nur estas reprezenta specio de Afriko, sed ankaŭ simbolas

elegantecon kaj graciecon en la loka kulturo. Kapti tian momenton estas omaĝo al la biodiverseco de la Serengeti. Vidi kronogruojn estas sufiĉe malofta, kaj tiu sperto donas profundan komprenon pri la riĉeco kaj delikateco de la naturo.

**\*\*la sepa foto\*\*:**



Mi fotis ĉiujn sur la stepo. Oni tenas la Esperantan flagon kun ridetoj brilantaj sur siaj vizaĝoj. Inter ili troviĝas UEA estraranoj kiel Amri Wandel, Arko Gong Xiaofeng kaj Aleks Ka. Ni venis al Tanzanio por partopreni la 109-an UK en Aruŝo. La fono estas senlima stepo kaj vasta ĉielo, kio donas senton de senfina spaco kaj libereco. Ĉi tiu sceno restas en la memoro kiel momento de pura ĝojo, kaj ĝi montras kiel la esperantistoj el diversaj kulturaj fonoj povas trovi specialan ligon inter si en la naturo. Dum ĉi tiu vojaĝo, ni ne nur malkovris la belecon de la naturo, sed ankaŭ sentis profundan amikecon kaj unikan unuiĝon inter la esperantistoj. Kiam mi fotis ĉi tiun scenon, mi klopodis kapti la ridetojn de ĉiuj kaj la vastan fonon, por memori tiun belan, specialan sperton de amikeco kaj kuneco.

## **Dua Parto: La Kultura Sperto en Vilaĝo de la Masajoj**

Post la ekskurso en la Serengeti, la 5-an de aŭgusto, ni alvenis al masaja vilaĝo en Tanzanio. Male al la grandiozaj pejzaĝoj de la naturo, ĉi tie troviĝis varma homa kaj kultura diverseco. La masajoj estas konataj pro sia tradicia paŝtista vivmaniero kaj unikaj kulturaj kutimoj, kaj ĉi tiu tago donis al mi profundan sperton pri ilia gastamo kaj rezisto.

**\*\*la unua foto\*\*:**



Ĉe la enirejo de la vilaĝo, ni renkontis kelkajn masajajn infanojn, kiuj tuj kaptis mian atenton per sia ĝojo kaj sentemaj esprimoj. Iliaj senkulpecaj ridetoj kaj buntaj

vestoj brilis en la varma sunlumo. Ili ne montris eĉ iom da timemo pro nia ĉeesto; anstataŭe, ili rigardis nin per scivolaj kaj gajaj okuloj. Ĉar mi estis la fotisto de nia grupo, mi singarde preparis mian fotilon por kapti ĉi tiun unikan momenton. Unu knabeto, portanta bluan ĉemizon kun la vorto "Italia" kaj numeron "10," ekscitite levis sian manon kvazaŭ en saluto, dum la knabineto en ruĝa robo ridetis ĉarme.

Fotante ĉi tiun scenon, mi penis enkadrigi iliajn esprimojn tiel, ke la spektantoj povu senti la senkaŝan amikecon kaj liberan spiriton, kiuj radias el ili. Mi deziris, ke tiu momento, plena de viveco kaj senco de komuneco, povu reflekti la plej puran esencon de ĉi tiu lando kaj ĝia popolo. La masajoj tre alte taksas familion kaj komunumon. Ĉi tiuj infanoj kreskas lernante gravajn tradiciojn de siaj gepatroj. Ili lernas prizorgi brutaron, krei manfaritaĵojn, kaj konservi la kulturecan riĉecon de la masaja heredaĵo.

**\*\*la dua foto\*\*:**



En la centro de la vilaĝo, ni spektis la tradicion saltodancadon de masajaj viroj. Ĉi tiu danco estas ne nur formo de distro, sed ankaŭ simbolo de forto kaj kuraĝo. La masajaj viroj estis vestitaj per buntaj tukoj, formis rondon kaj unu post la alia saltis supren, montrante sian lertecon kaj forton. Ĉi tiu danco estas grava ceremonio en la masaja kulturo, ofte prezentata ĉe geedziĝoj kaj plenkreskiĝaj ritoj. Dum mi fotis, mi celis kapti la momenton de la salto por elmontri la dinamikon kaj forton de la ago.

La koloraj vestoj de la masajoj ankaŭ estas simbolo de ilia kulturo. La ruĝa, blua kaj purpura ne nur beligas, sed havas simbolajn signifojn. Ekzemple, la ruĝa estas simbolo de kuraĝo kaj estas la plej ofta vestaro de la masajoj.

**\*\*la tria foto\*\*:**



Kelkaj masajaj virinoj staris en vico, iuj el ili kun siaj infanoj ĉe sia flanko, kaj prezentis siajn manfaritaĵojn. Ili portis buntajn vestojn, kiuj reflektis la kolorojn de sia kulturo. La virinoj etendis siajn manfaritajn juvelojn kaj ornamaĵojn sur koloraj tukoj, kiuj estis metitaj sur la seka grundo. Ĉiu objekto estis zorgeme kreita kaj montras la tradician masajan metiarton. Tiuj manfaritaĵoj ne nur estas maniero por ili perlabori, sed ankaŭ esprimas la masajan kulturon kaj virinan saĝon. Dum mi fotis ilin, ili ridetis kaj kun fiero kaj ĝojo montris siajn verkaĵojn, esperante veki intereson ĉe la turistoj.

**\*\*la kvara foto\*\*:**



Ĉi tie estas simpla, sed varma klasĉambro en la vilaĝo. Infanoj sidas ĉe la muro de pajlejo, atente aŭskultante la klarigojn de la vilaĝanoj. En la antaŭa vico, kelkaj infanoj estas atentplenaj, aliaj iom scivolaj, dum la malantaŭaj infanoj mallaŭte interparolas kun siaj amikoj. La leciono ne havas oficialajn materialojn aŭ lernolibrojn, ĉio estas transdono buŝe kaj kor-voĉe. La enhavo inkluzivas kiel prizorgi brutojn, identigi herbojn, rekonii ŝanĝojn en la vetero kaj rakonti pri la tradicioj de la masajoj. Ĉi tie, la edukado estas ne nur teoria scio, sed vivspertoj, kiuj transdonas saĝon tra la generacioj.

Per mia fotilo, mi provis kapti ĉi tiun edukscenon, kiu simbolas la kernon de la kulturo de la masajoj. Kvankam la edukado en la vilaĝo estas simpla, la lumo en la okuloj de la infanoj montras ilian avidon al scio kaj kompreno. Kiam mi fotis, mi intence elektis angulon, kiu montras la esprimojn kaj interagojn de la infanoj, por kapti tiun sinceran kaj puran lernan etoson.

**\*\*la kvina foto\*\*:**



Knabineto rajdis malnovan biciklon laŭ la vojo de la vilaĝo. Ŝi portis rozkoloran ĉemizon, kun serioza mienesprimo kaj firmaj manoj tenantaj la stirilon. Ĉi tiu sceno montras la simplan, sed realan ĉiutagan vivon de la masajoj. Kvankam la kondiĉoj estas simplaj, la infanoj tamen trovas sian propran ĝojon kaj ĝuas la belecon de sia infanaĝo. Dum mi fotis, mi klopodis kapti la koncentriĝon kaj memfidon en ŝia rigardo.

Ĉi tiu vizito al la masaja vilaĝo montris al mi ilian unikan vivmanieron, kaj la varma gastamo de la masajoj lasis min kun profunda impresio. Ni interagis kun la vilaĝanoj, komprenante ilian kulturon kaj sperti ilian ĉiutagan vivon. Ĉi tiu kontakto donis al mi pli profundan komprenon kaj respekton pri la diverseco de Afriko.

**\*\*Konkludo\*\*:**

Bazite sur ĉi tiuj du fotoj, en kiuj mi interagas kun la masajaj vilaĝanoj, mi volas aldoni kelkajn pensojn:

Ĉi tiu vojaĝo al Tanzanio ne nur permesis al mi intime sperti la sovaĝan belecon de la Serengeti-steparo, sed ankaŭ profunde senti la riĉan kulturen heredaĵon de la masajoj. Ĉi tiuj fotoj vivece registras mian interagadon kun la masajaj vilaĝanoj – iliaj tradiciaj vestoj, varmaj ridetoj, kaj unika vivmaniero. Tiuj du tute malsamaj spertoj, unu montranta la grandiozecon kaj potencon de la naturo, kaj la alia prezentanta la profundecon kaj diversecon de la homa kulturo, restis profunde en mia koro.

Ĉi tiuj fotoj kaj memoroj ĉiam memorigos min pri la beleco kaj unikeco de ĉi tiu afrika tero. Kiel fotisto dum ĉi tiu vojaĝo, mi ĝojas povi per mia fotilo disvastigi tiujn neforgeseblajn momentojn al pli vasta publiko. Ĉu temas pri la liberaj bestoj kurentaj sur la stepo ĉu pri la varmaj ridetoj de la masajoj en la vilaĝoj – ĉio donis al mi senton de la unika ĉarmo de Tanzanio kaj la harmonio inter homoj kaj naturo.

*(daŭrigota)*